

# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :  
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :  
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj  
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 67 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 januaro 1926

## ESPERANTO OFFICIALLY RECOGNISED.

Esperanto has just gained its greatest victory. The International Conference of the Universal Telegraphic Union at its sittings in Paris during September and October decided to give effect to the desire expressed by the League of Nations that Esperanto should be recognised in telegraphic communications as a "clear" language. This means that, (after a statutory delay of ten months), Esperanto may be used in telegraphic communication between one country and another at ordinary language, not code, rates. The decision shows that Esperanto is considered to be an auxiliary language sufficiently extensively known and used throughout the world as to be worthy of the right accorded to it. The technical commission of the Conference specially considered the claims of Ido but refused to make a similar recommendation in its favour. This would seem to put Ido out of court as a possible world language and it is to be hoped that its adherents can read the writing on the wall and will devote their energies to the support of Esperanto, without whose existence there could have been no piracy and mutilation of it under the name of Ido. The active support of the French delegates in conjunction with the

Paris Chamber of Commerce was an important factor in obtaining this outstanding success.

## AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

The Victorian section met on 11th December. The secretary reported that although subscriptions to K.R. had been forwarded no acknowledgment had yet been received. Information was received from Hobart that the members there were willing to arrange for the next congress to be held in their city. Mr. Rawson and Mr. Byatt were appointed to act as a Melbourne committee in connection with the Hobart groups. Mr. Byatt brought forward the motion of which he had given notice, viz.: "That it is desirable for the A.E.A. to establish a capital fund." This was agreed to and Mr. Byatt was asked to elaborate a scheme for the enrolment of individual members and to report to a meeting to be held on the 5th March. The secretary of each group throughout Australia is requested to forward to Mr. Byatt Box 731, Melbourne, the names and addresses of all Esperantists known to him.

## LA TEORIO KAJ PRAKTIKO DE HENRY FORD RILATE LA DUNGADON DE FIZIKE DIFEKTITAJ VIROJ.

(Esperantigita de Alice Wicks laŭ la afabla permeso de Sro H. Ford.)

\* \* \* \*

Neniu petante laboron estas malakceptata pro fizika difekto. Tiu ĉi plano de agado efektiviĝis la 12a Januaro 1914, en la tempo kiam la minimuma salajro fiksiĝis po kvin dolaroj por okhora labortago. Samtempe, alia kondiĉo determinis ke neniu estu maldungata pro fizika difekto, krom, kompreneble, en la okazo de infekta malsano. Mi opinias ke, se industria institucio plenumas sian plenan rolon, ĝi devas ebligi sekcion de siaj dungitoj montri ĉirkaŭ la samajn proporciojn kiel sekcio de ia ordinara societo. Ĉiam ni havas la kriplulojn kaj lamulojn inter ni. Ordinare oni konsideras tiujn, kiuj estas fizike malkapabligitaj, kiel ŝarĝon sur societo kaj ni subtenas ilin per almozonado. Ekzistas kazoj, mi supozas, en kiuj la subteno necese fariĝas almozonado, kiel, ekzemple, idioto. Sed, ĉi tiuj kazoj estas eksterordinare maloftaj, kaj mi konstatis ke estas eble, inter la granda nombro de diversaj taskoj kiuj devas esti faritaj en la kompanio, ie trovi ŝancon, sur produkta bazo, por preskaŭ ĉiu. La blindulo aŭ kriplulo povas fari, en la preciza loko sur kiu li estas metita, egale tiom da laboro kaj laborakiri precize la saman pagon kiel tute nedifektita homo. Ni ne preferas kriplulojn, sed, ni elmontris ke ili povas gajni plenajn salajrojn.

Estus tute ekster la spirito de nia celo dungi homojn pro tio, ke ili estas kripluloj, pagi al ili malaltan salajron kaj kontentiĝi je pli malgranda produktado. Tio eble, rekte helpus la homojn, sed, ne helpus ilin en la plej bona maniero. Ĉiam la plej bona maniero estas tiu, kiu metas ilin sur produktiva, egaleco kun la nedifekta homo. Mi opinias ke ekzistas tre malofte okazo por almozonado en ĉi

tiu mondo—tio estas, almozonado en la senco de donacoj. Certe, negoco kaj almozonado ne povas esti kombinitaj; la celo de fabrikejo estas produkti, kaj ĝi malbone helpas la generalan komunumon se ĝi ne produktas ĝis la plej ekstremo de sia kapableco. Ni tro facile kredas sen esploro, ke la plena posedo de kapablecoj estas necesa kondiĉo por la plej bona plenumado de ĉiuj aferoj.

Por precizigi la situacion, mi klasifikis ĉiujn diversajn taskojn laŭ la speco de maŝino kaj laboro—ĉu la postulata laboro estas malpeza, mezpeza aŭ peza; ĉu ĝi estas malseka aŭ seka laboro, kaj, se malseka, kia speco de fluidaĵo; ĉu ĝi estas pura aŭ malpura; proksima al forno aŭ fornego; la stato de la aero; ĉu estas devige uzi unu manon aŭ ambaŭ; ĉu la laboristo staras aŭ sidas ĉe sia tasko; ĉu ĝi estas brua aŭ kvieta laboro; ĉu ĝi devigas precizecon; ĉu la lumo estas natura aŭ arta; la nombro da pecoj traktitaj en horo; la pezo de la materialo traktita; la speco de la fortostreĉo al la laboristo. Tiu ĉi enketo montris ke en tiu tempo estis 7,882 diversaj taskoj en la fabrikejo. El ĉiuj tiuj 949 estis klasifikitaj kiel peza laboro bezonanta fortajn, fizike perfektajn homojn; 3,338 postulis homojn kun ordinara fizika kresko kaj fortoj. La aliaj 3,595 taskoj ne montris bezonon de fizika forto kaj taŭgas por la plej maldikaj, malfortaj specoj de homoj. Efektive, la plej multaj povus esti bone faritaj de virinoj aŭ pli agaj infanoj. La plej facilaj taskoj estis klasifikitaj denove por eltrovi kiom el ili devigas la uzon de plenaj kapablecoj, kaj mi trovis ke 670 povas esti faritaj de senkruraj viroj, 2,637 de unukruraj viroj kaj 10 de blinduloj. Tial, inter 7,882 diversaj taskoj, 4,034—kvan-kam kelkaj el ili postulas fortecon—ne bezonas plenan fizikan kapablecon. Tial vasta industrio povas provizi paglaboron por la norma homaro. Se la taskoj de la speciala industrio, aŭ ĉe la speciala fabrikejo estis anali-

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

zitaj same kiel la niaj, la proporcio povus esti tre malsama, tamen mi estas tute certa ke, se la laboro estus sufiĉe subdividata—subdividata de la vidpunkto de la plej severa ekonomio—estus nenia manko de lokoj en kiuj la fizike difektitaj povus fari taskon de normala homo kaj ricevi la saman salajron. Ekonomie, estas tre malŝpareme akcepti kiel ŝarĝon, kriplulojn, kaj, poste instrui al ili malgravajn taskojn kiel la plektado de korboj aŭ aliaj neprofitaj manlaboro, ne esperante helpi ilin, sed nur por ke ili ne senkuraĝiĝu.

Kiam la Dunga Fako dungas homon, la teorio estas doni al li taskon taŭgan por lia sanstato. Se li jam havas taskon, kiun ŝajne, li ne kapablas plenumi, aŭ li ne ŝatas, la taskon, oni donas al li transigakarton, kiun li alportas al la transiga fako, kaj, post ekzamenado oni difinas al li alian taskon por provi ĉu ĝi pli taŭgas lian sanstaton aŭ inklinon. Tiuj, kiuj estas fizike sub la normala stato fariĝas egale bonaj laboristoj, sur la ĝusta loko kiel tiuj, kiuj superas ĝin. Ekzemple, oni metis blindulon en la proviza fako por nombri ŝraŭbojn kaj ŝraŭbingojn sendigototajn al filiaj fabrikejoj. Du nedifektitaj homoj jam laboris super tiu tasko. Post du tagoj la ĉeflaboristo sendis letereton al la transiga fako, liberiganta la nedifektitajn homojn, ĉar la blindulo ne nur povas fari sian propran taskon, sed ankaŭ faris la laboron antaŭe faritan de la du sendifektuloj.

Ĉi tiun ŝparon oni povas plilarĝigi. Ordinare oni akceptas kvazaŭ konsensite ke kiam homo ricevas difektaĵon, li estas ekster la konkuro, kaj devas ricevi kompenson. Sed, ĉiam okazas periodo de resaniĝo, speciale en kazoj de ostrompaĵoj, kiam la homo sufiĉe refortiĝas por labori, ĉar la plej granda kompensado pro akcidento neniam povas egali la salajron de la viro. Se ĝi povus, tiukaze la industrio nepre portus aldonatan imposton kaj tiu imposto evidentiĝus en la kosto de la produktaĵo. Malpli da aĉetado de la produktaĵo rezultus, kaj, pro tio, malpli da laboro por iu. Ĉiam oni devas memori ke tiu estus neevitabla rezulto.

Ni eksperimentis kun homoj longe kuŝintaj en lito—homoj kiuj povas rekte sidi en la lito—Ni metis nigravakstolajn kovrilojn sur la litojn

kaj difinis al ili la taskon kunigi ŝraŭbetojn kun la ingoj. Ĉi tiu estas laboro kiu devas esti manfarita kaj kiu ĉiam okupas dekkvin aŭ dudek homojn en la magneta fako. La homoj en la malsanulejo povis ĝin fari egale bone kiel tiuj en la fabrikejo, kaj, tio ebligis al ili ricevi la ordinarajn salajrojn. Efektive, mi kredas ke ties produktaĵo estis ĉirkaŭ 20 pro cento super la norma produktaĵo ĉe la fabrikejo. Neniu homo estis devigita labori kontraŭvole. Sed ĉiuj mem tion deziris. Ĝi evitigis al ili la enuon. Ili dormis kaj manĝis pli bone kaj resaniĝis pli rapide.

Nenia speciala prizorgo estas necesa rilate al la dungitaj surdmutuloj. Ili faras sian laboron 100 pro cento. La tuberkulozuloj—kaj ordinare ĉirkaŭ 1000 estas dungitaj—ordinare laboras en la materiala savfako. Tiuj kazoj, kiujn oni opinias infektaj, laboras kune en budo speciale konstruita. Plejparte ili laboras en la libera aero.

En la tempo de la lasta analizo de la dungitoj, estis 9,563 subnormalaj homoj. El ĉi tiuj 123 havis kripligitajn aŭ amputitajn brakojn aŭ manojn. Al unu mankis ambaŭ manoj. Estis 4 tute blindigitaj homoj, 207 blindaj je unu okulo, 253 kun unu okulo preskaŭ blinda, 37 surdmutuloj, 60 epilepsuloj, 4 al kiuj mankis aŭ ambaŭ kruroj aŭ ambaŭ piedoj, 234 al kiuj mankis aŭ unu piedo aŭ unu kruro. La aliaj havis malpli grandajn malhelpaĵojn.

La tempo bezonata por spertiĝi pri la diversaj okupadaj estas jene:—43 pro cento el la taskoj postulas ne pli ol unu tago de instruo. 36 pro cento postulas unu tagon ĝis unu semajno; 6 pro cento postulas unu ĝis du semajnoj; 14 pro cento postulas unu monaton ĝis unu jaro; 1 pro cento postulas unu ĝis ses jaroj. Ĉi tiuj lastaj okupadoj bezonas grandan lertecon—ekzemple la faradon de iloj kaj matricoj.

La disciplino tra la tuta fabrikejo estas severa (Pagoj el la aŭtobiografio de Henry Ford).

The Italian Esperanto Congress held at Bari in September was very successful. It was attended by ministers, senators, deputies and delegates from commercial, tourist and scientific societies.

## RECENZO.

NOVELOJ, Henryk Sienkiewicz. Tradukita de Lidja Zamenhof. Internacia Mondliteraturo, volumo 16, eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo, 1\$ 4p.

Principe pro sia romano, "Quo Vadis," la nomo de la Pola verkisto, Sienkiewicz, estas tre bone konata al Angloj. Kiam ni sciĝis, ke Lidja Zamenhof, filino de nia Majstro, faras tradukon el lia verkaro ni atendis ion multe pli legindan ol ordinare. Eble pro tiu antaŭa taksado, nuanco de malkontenteco sentiĝis dum legado de la libro. El la kvin mallongaj noveloj, kiuj konsistigas la libron, eble la dua, "La Maljuna Servisto," vekas la plej grandan intereson. La fideleco, la ĵaluzo, la aroganteco, ĉiuj ĉi tiuj kvalitoj estas karakterizaj trajtoj de la maljuna servisto en ĉiu lando, kaj, legante pri Nikolao, la ĉiulanda legantaro rekonos bone konatan normon. La stilo de la tradukinto estas flua, kaj per la trafaj esprimoj, starigas komparojn kun la lingvaĵo de ŝia patro. Malsame, tamen, ŝi ne plene eluzis la fundamentajn vortojn, antaŭ ol enkonduki novajn. Laŭ la principo de sufiĉo povus esti neuzita la plimulto el la prefiksoj kaj sufiksoj, kiuj abundas sur ĉiu paĝo. Spite ĉi tiuj kritikindaj punktoj, la libro estas pliriĉigo de nia literaturo, kaj estas inda de lego de ĉiu samideano, eĉ sen la trudema sentimento, ke la tradukinto estas familiano de Zamenhof. (C.W.B.)

ESPERANTO CLASS BOOK, preta de F. Schoops, eldonita de La Verda Stelo Esperanto Group, Antwerp.

LINGVO INTERNACIA: kelkaj vortoj pri la esenco de Esperanto en Hebrea lingvo, kun aldono de la tuta gramatiko, kompilita de J. Muĉnik kaj N. B. Chavkin, havebla ĉe ili en Jerusalemo.

A course in Esperanto at Boston University, College of Business Administration, opened on October 20th, at 525 Boylston Street. Prof. Louis C. Lambert of the Modern Language department is the instructor, the "direct method" being used.

## LA NAIVA MALJUNULO.

(Daŭrigo).

"Jes," diris la naiva maljunulo, "Mi havas kvardek funtojn por la luprezon de la pasinta duonjaro kaj kvardek funtojn por ĉi tiu duonjaro. Mia edzino diris ke ĉio estas en ordo, kaj ŝi estas lerta pri la kalkulado, mia edzino ja estas; kaj ŝi diris al mi ke tio estas, kion mi devas diri, se iu demandas min."

"Certe," diris la belega sinjoro, estas multaj ŝtelistoj vagantaj nuntempe, kaj vi devas paroli al neniu pri via mono, aŭ eble oni ŝtelos de vi." "Ho ne, mia edzino estas pli saĝa ol tio," diris la naiva maljunulo, ĉar ŝi metis la tutan monon en la selon kie neniu serĉus ĝin." Tiamaniere la paro, agrable trotetis antaŭen; kaj la maljunulo diris al si, ke li neniam renkontis belegan sinjoron, kiu estis tiel afabla al li. La belega sinjoro lin demandis pri liaj ŝafoj, kaj kiamaniere li prizorgis ilin, kaj pri lia ĉevalino, Tib, kaj de kiam li posedas ĝin.

Kiam la maljunulo estis diranta al li, kia bela ĉevalidino Tib estis antaŭ nur dudek naŭ jaroj, la vojo kurbiĝis abrupte malsupren de monteto. Rivereto troviĝis ĉe la malsupro kaj arboj dense ĉirkaŭstaris; kaj ĉi tie, la belega sinjoro eltiris pistolon kaj direktis ĝin al la kapo de la maljunulo, dirante, "Staru senmove, kaj donu al mi vian monon."

Sed la naiva maljunulo lin surprize rigardis, kaj demandis, "Bonvole diru al mi, sinjoro, ĉu vi estas ŝtelisto?" La belega sinjoro respondis kun rido, "Estas pli bonaj nomoj por ĝi, ol tio, sed por kio vi deziras scii?"

Respondis la maljunulo, "Mia edzino diris al mi ke, se mi renkontos ŝteliston survoje, mi devas diri al li ke mi iras pagi la luprezon, kaj ke mi havas okdek funtojn en mia selo; sed ŝi ne diris al mi kion fari, se li min ordonis doni ĝin al li. Mi devas pensi mem, pri tio, sed, ja, mi ne povas tion fari saĝe tial mi nur ĵetos la selon trans la kreskajbarilon kaj malfermasos min de ĝi."

La ŝtelisto klinis sian kapon malantaŭen kaj ridis. "Via edzino neniel kulpigos vin se vi obeos ŝin tiamaniere. Tamen, vi neniam scias, kio kontentiĝos virinon" li plue

diris. "Nu, provu kiel bone vi posas obei min," li diris. "Staru ĉi tie kaj tenu mian ĉevalon dum mi transiros la kreskajbarilon; kaj gardu bone mian saketon."

Ne estis facile grimpi trans la barilon ĉar ĝi estis el dornaĵoj kaj sovaĝaj rozoj; sed la ĝustan momenton kiam la ŝtelisto pasis tra ĝin, la naiva maljunulo metis sian piedon en la piedingon de la selo de la nobla ĉevalo de la ŝtelisto, kaj ekrajdis for. "Haltu, kriis la ŝtelisto, kaj mi donos al vi la duonon de mia tuta havo."

"Mia edzino ne diris ion pri tio al mi" diris la naiva maljunulo, "kaj mi pensas ke ŝi ne aprobus ĝin se mi restadus. Si ordonis ke mi iru al la luiganto, kaj pagi la luprezon." Ĉe tio li rapidigis la ĉevalon kaj rajdis for ventrapide.

Estis nenio por la ŝtelisto fari krom sidiĝi sur la teron kaj ekzameni la selon. En ĝi estis nenio, ĉar, kiam la maljunulo pasis el la vidpovo de lia edzino, li prenis la monon el la selo kaj metis ĝin en lian bruston; ĉar li diris en si, "viro devas esti la estro de lia propra domo kaj mi faros pri la mono kiel plaĉas al mi. Mi ne estas iomete timema."

La maljunulo neniam antaŭe sidis sur tia nobla ĉevalo kaj neniam havis tian galepon en sia tuta vivo, kiel li havis tiun matenon. Kiam li atingis la domon de la luiganto, li malfermis la saketon, kaj la luiganto fikse rigardis surprizete, ĉar en ĝi estis kvindek funtoj el oro, krom multe da funtoj el argento. "Kie vi ricevis kiom da mono?" la luiganto demandis, kaj la naiva maljunulo respondis, "Mi renkontis homon survoje, kaj ni interŝanĝis ĉevalojn; li donis al mi tiun ĉi saketon da mono kaj li havas mian malnovan selon."

Mi pensas, ke vi devus ne porti poŝe tiel multe da mono," diris la luiganto, kaj la maljunulo respondis "Mi pensas ke neniu malutilus al tia naivulo, kiel mi estas, kaj cetere, mi ĉiam faras kion mia edzino diras al mi fari, ĉar ŝi estas lertulino, kaj povas kalkuli. Eble la homo kiun mi renkontis ne obeis sian edzinon."

La naiva maljunulo ne reiris hejmen laŭ la ĉefvojo, sed laŭ mallarĝa vojeto; kaj baldaŭ li ekvidis maljunan Tibon paŝtantan sin sub arbo. Tiam la maljunulo, kaj Tib kaj la nobla ĉevalo iris hejmon kune, kaj kiam

lia edzino vidis la monon ŝi dancadis pro ĝojo, kaj diris "Nu, maljunulo vidu kion vi ricevas, obeante vian edzinon."

## PETOLAĴO.

Kiam la frato kaj mi estis junaj knaboj, ni ofte faris petolaĵojn. Proksime al nia domo loĝadis en malgranda dometaĉo Irlandano nomata Johano Dornanto. Li estis fosisto, kiu fosadis la oran metalon sed li gajnis nur malmulte da oro. Kiam ajn li ricevis sufiĉe da mono li elspezis ĝin en drinkejo. Unufoje li ŝtelis lankovrilon el butikoj kaj policano lin kaptis kaj enmetis en la malliberejon. Kiam, en la sekvanta mateno li staris en la juĝejo, la magistrato demandis al li, "cu vi estas kulpa?" kaj li respondis—"Ne! via Magistrata Moŝto"—Mi nur prunte prenis ĝin ĝis post la vintra vetero, kiam mi intencas redoni ĝin al la butikisto.

Unufoje la frato kaj mi trovis mortintan igvanon kuŝantan sur la vojo. La igvano havis pli ol ses futojn da longeco. Ni, la frato kaj mi, ligis la beston al bastono kaj marŝis rekte al la dometaĉo de Johano. Alveninte tie, ni aŭdis sibilantan sonon de kuiriĝanta viando. "Johano kuiras sian tagmanĝon." La frato grimpis ĝis la supro de la tegmento kaj mi ĝis la supro de la malalta kamentubo. Mi tenis la igvanon per la fingroj pendis ĝin en la kamentubo kaj lasis ĝin fali en la fritilon sur la kuiriĝantan viandon.

Tuj mi malsupren iris de la kamentubo kaj rapide forkuris. La frato trafalis tra la tegmento, sed Johano postkuris min, tamen li ne povis min kapti. La frato forkuris hejmen. Post duonhoron ni reiris al la dometaĉo de Johano. Li diris al ni—vi estas filoj de la diablo, sed mi pardonas al vi, tamen ne faru tiun ĉi abomenaĵojn ree, aŭ mi certe mortigos vin.

Vera rakonto "La Migranto."

Dr. Lehman Wendell, the President of the Twin City Esperanto Club, is teaching the Esperanto class at the University of Minnesota this year.

## KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando. Oni raportas ke la Aucklando klaso nun kreskas kaj posedas dudek anojn. La sekretariino estas, s-ino A. E. Dewing, 5 Aldred Road, Remuera, Auckland.

DUNEDIN, Nov-Zelando. Laŭ informo, f-ino McCarthy, 66 Harbour Terrace, Dunedin, gvidas lernklason kaj agas diligente por Esperanto rilate al la Sud-marara ekspozicio.

MELBURN, V.—La alveno de familo Sekfy el Hungarujo, kaj la reveno de s-ro Hudson el sia ekskurso al Sud-Afriko kaj Sud-Ameriko, donis plezuron al la Melburna Esperanto-Societo. La klubo tutkore akceptis gesinjorojn Sekfy kaj pro ilia honoro aranĝis viziton al la Botanikaj Ĝardenoj.

Aliaj eroj en la programo estis ŝaradoj, kiuj donis amuzon al la aŭskultantoj; kaj la ĉiumonata debato. La temo estis "Ĉu sinjoro devus doni sian sidlokon al sinjorino?" Ĝi estis la plej sukcesa el la debatoj, kaj elvokis multajn amuzajn opiniojn de la partoprenantoj.

WELLINGTON, N.Z. — Klaso de Esperanto estas aranĝita sub aŭspicoj de la W. E. A. (Laborista Eduka Asocio). La sekretario de tiu asocio, dankante s-ron W. L. Edmanson pro ties klopodoj pri la afero, bedaŭris ke tempo ne permesis la fondiĝon de klaso lastan jaron. Tamen, la klaso komenciĝos je frua dato, kun s-ro Edmanson gvidanta ĝin.

Per tiu ĉi klaso oni esperas antaŭenigi Esperanton en la ĉefurbo kie la lingvo ne estas tre forta; ankaŭ oni esperas ke aliaj sukcesoj sekvos la klopodojn de la Nov-zelanda pioniro.

Some months ago "La Suda Kruc" mentioned that a powerful station then in course of construction at Bilbao, Spain, was favourably inclined to Esperanto. Its first Esperanto talk was given on November last. As this station is heard in England, Ireland, France, Belgium, Holland, Austria, Switzerland, Italy, Northern Africa and part of Germany, the wireless Esperantists of those lands will doubtless make a habit of listening in to "Radio Vizcaya."

## AL MATENA SUNO.

Saluton sun' matena, ruĝkolora  
patrino ĉarma de la pura ĝoj.  
Baniĝas ter' en via lumo ora,  
ĉiellazuro estas via voj.'

Montaro kronojn levas flamlumitajn  
kaj preĝas arboj, herboj de turkis'.  
Matenkreskaĵoj florojn rosunitajn  
al vi etendas ame por la kis'.

Leviĝis mi, mizera tera sklavo,  
kun korsopir' je ĉi altaĵ' sen fin',  
Forlasis koton de l'malseka kavo  
kaj dum la nokt' atendis vin patrin'.

Saluton, sun' donanto de la vivo!  
Vi kisis min ĉe via reaper'.  
Lastnokta dorm' en rokoj de deklivo  
flugilojn agloj skuas en liber',

Nun iras mi de vi, ho sun', ravita,  
Tra montoj, valoj sklavo en liber'.  
La pentofero estas plenumita —  
mateno nova lumos tuj sur ter'.

Putinas. Esperantigis P. Lapiene.  
(El "Tagiĝo.")

## RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 31st December the following sums were received, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—  
H. S. Rienits, 4/6 (5/26); A. Bennett, 4/6 (10/26); J. B. Henry, 4/6 (5/26); C. M. Pocklington, 4/6 (7/26); P. T. Hudson, 4/6 (7/26); P. T.B.H., 2/6.

Dr. Nuyts, President of the French Association, "Esperanto and Commerce," died suddenly on Aug. 19. Dr. Nuyts was a doctor of medicine and at one time a professor in Paris, where, during the war, he was successful in the treatment of facial wounds. He then devoted his attention to the study of the mouth and teeth and put on the market a toothbrush of his own design. Since the war he devoted himself to the manufacture and marketing of "Dentclair" brushes. He was a modern "master of Industry" and utilised to the full the American methods of publicity. It was largely owing to his efforts and support that the Paris Commercial Conference was so successful.

## ESPERANTO OFICIALE REKONITA.

La Internacia Konferenco de la Membroj-Ŝtatoj de la Universala Telegrafa Unio ĵus rekonis oficiale Esperanton laŭ la rekomendo de la 5a Plenkunsido de la Ligo de Nacioj. Artikolo 7 de la Internacia Telegrafa Regularo antaŭvidis la uzon de la naciaj lingvoj kaj de l' Latino. La lasta paragrafo finiĝas jene:

"La uzo de l' Latino kaj de Esperanto estas sammaniere allasata."

La franca delegacio aktive kunhelpis al la adopto de tiu amendo, kiu donas al Esperanto definitive la karakteron de oficiale rekonita internacia helplingvo.

Simila propono koncerne Idon estis malakceptita.

## QUEENSLAND NOTES.

"The Advocate," Queensland, which is the official organ of the railway workers in that state, is printing a series of articles on Esperanto. The writer is Mr. P. D. Thomson, a well known esperantist. The first article appeared in the November issue. In passing it may be said that many newspapers in Europe and Asia, with large circulations, are now yielding to a demand, by publishing news in the international language, as well as in the national language. Doubtless the increased circulation, induced by printing news in such a manner that people of all nations may read it, warrants this progressive step.

The Workers' Educational Association, Ipswich branch, has started a class for the study of Esperanto. The hon. sec. is Mr. Phillip Burr. The effort of the promoters is meeting with the success which it certainly deserves. Other branches might follow the commendable example of the Ipswich members with advantage.

In Denmark a little nine year old blind boy has taught himself Esperanto at home, and is now corresponding with other blind children in six foreign countries in Esperanto. At the last Danish Esperanto Congress this lad read Hans Christian Andersen's, "The little mermaid," in Esperanto to the Assembly.

## HERE AND THERE.

The third congress of the members of the Aerial Navigation League at its meeting in Brussels passed a resolution stating that it recognised the value of Esperanto and appointed an International Commission to set out the measures necessary to be taken to secure its use as the technical language of aerial navigation. Ernest Archdeacon, Henry Farman, well-known pioneers of aviation, General Delcambres, director of the French Meteorological Department, Torresy Quevedo, the famous Spanish mathematician and Major Emilo Herrera, Director of Aeroplane construction, Madrid, were among the supporters of the resolution.

A new group, the Zamenhof, has been founded at Buenos Aires. The president is Lucas Acuna, Secretary, Manuel M. Guell, Treasurer, A. G. Porto, acting with E. Pertini, G. Rodriguez as a committee. The programme includes free personal courses and also instruction by correspondence.

The monthly Esperanto talks from 3LO, Melbourne, are being continued. On December 5, Mr. Rawson spoke on "Recent successes of Esperanto in Europe," and on Jan. 2 Mr. Drummond's theme was "The acid test on Esperanto."

The Sydney Mail of Dec. 2nd contained the following:—"Esperantists have great hopes in wireless and—who knows?—they may give the world the wireless language. It is certain that the time is not far distant when the nations must understand each other more easily. The present and the past have been divided as with an axe."

Winifred M. Winspear, George Winter, Harry L. Whyte-Meach, Sydney, recently passed the B.E.A. preliminary examination and Alexander Aupart, H. R. Torr, Mrs. A. Taylor, and D. Healy were successful in the advanced examination.

Most Esperantists will rejoice to learn that Czecho Slovakia postal authorities will not handle "migranta" postcards and hope that this will be the attitude taken by all other postal authorities.

Miss Genevieve Coy, has organized an Esperanto class in Cleveland, Ohio, made up of members of the Bahai group.

## GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn la! ci tiu adreso — "La Suda Krucio," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia":—  
**Arbeider Esperantisten**, 7; **Amerika Esperantisto**, vol. 35, 1; **Bulteno Antverpena**, 10; **Esperanto and Commerce**, Paris; **Heroldo de Esperanto**, 81 ĝis 88; **Informservo De Labora Oficejo**, 100, 101, 193abc; **International Language**, 9, 10, 11; **Litova Stelo**, 10, 11; **La Semisto**, 51/2, 53-4-5; **La Orienta Lumo**, 2, 3; **La Ridanta Esperantisto**, 2; **Oomoto**, 10, 11; **Nova Sento**, 5; **Svenska Esperanto-Tidningen**, 9, 10; **British Esperantist**, 248; **Samosa Esperantisto**, 1, 2 (eld. Samosa Esperanto Society, abono 1 dolaro jare). Laĉiulande publikigataj ĵurnaloj estas, kiel konate, tiel multenombraj, ke Esperantistoj kutimis vidi kun kelka bedaŭro la aperon de nova Esperanta ĵurnalo, ĉar ili pensas, ke tro multe da periodaj Esperanto publikigaĵoj serioze malfortigas la disvastiĝadon de la nun ekzistantaj ĵurnaloj, ĉiuj, pli kaj pli indaj je konstanta subteno.

Tamen krom la fakto, ke por la ĉiulandaj Esperanto ĵurnaloj ne ekzistas kaŭzo kial ili timus konkurdon de nia senluksa kaj senpretenda dumonata organo, ni ankoraŭ opinias, ke se ne multaj, unu almenaŭ ĵurnalo devus publikigi en ĉiu pli malpli esperantigita lando. **Literaturo**. (Londono) 28. Antaŭ kelkaj monatoj la Brita Esperantista Asocio starigis komitaton, kiu havis la devon konsideri serioze kaj amplekse la estontecon de la Asocio, ne nur finance sed ankaŭ en ĉiu rilato.

Tiu komitato rekomendis interalie, ke **Literaturo** ĉesu aperi kiel kvaronjara gazeto, kaj sekve ĉi tiu estas la lasta numero.

2K.Y., The Sydney Trades Hall broadcasting station, proposes to transmit a complete course of Esperanto lessons shortly.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Hobarta Esperanta Grupo**. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

**"Iru Antauen"-Grupo**. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

**"Nigra Cigno"-Grupo**. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino f-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

**Persista Grupo**, Armadale, Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: f-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 68 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 februaro 1926

## "WHAT WILL IT GET ME?"

This is the eternal question of the practical man, or the selfish man, whichever you may choose to call him. In any case he can't be ignored. Esperanto is not a religion, nor a system of philosophy, nor a moral crusade, and any idealistic benefit the world may derive therefrom is a purely secondary concern. The essence of the Esperanto movement is utilitarian,—nay, strikes the bottom of the hardest materialism. The Declaration adopted at the First World Esperanto Congress, held in Boulogne-sur-Mer, France, in 1905, sets forth this program:

"The Esperanto movement is an effort to spread thruout the world the use of a language neutral to all mankind, which, without obtruding itself upon the domestic life of the peoples, and in no sense seeking to oust the extant "national" tongues, may furnish natives of different countries the means of mutual understanding, may serve as a compromise language of public institutions in those countries where various races are at loggerheads on the language question, and in which may be published such works as may be of equal interest for all peoples. Any further idea which this or that Esperantist may connect with the Esperanto movement is his own purely private concern, for which the Esperanto movement is not responsible."

Boiled down, the movement is for the worldwide elimination of lost motion: in place of a thousand difficult mediums of international communication the substitution of just one easy medium.

Such a movement, in its very nature, cannot get a lasting foothold unless it "delivers the goods," and that "right off the reel." The question we have now to consider is, what has Esperanto to offer the average American to justify his trouble in learning it? In attempting to answer this we will try to be perfectly frank and candid, and eliminate all jokers from our pack.

Let us first of all take the business man, the man with something to sell—we don't care what, be it a ouija board or a frying pan. We ask him this opening question, Is he satisfied with a home market or does he seek a market abroad? If the former he does not need Esperanto. If the latter he will need one or more foreign languages (provided of course he aims farther than English-speaking countries), and Esperanto is right now the best investment in the linguistic line he can make for the money and time expended.

Let us make a cursory comparison. Suppose he picks the natural language that will give him the widest field, to wit, Spanish. We have good reason to believe, further, that this is the easiest natural language to learn of any in the world. A mastery of Spanish will open to him Spain,

Mexico, Cuba, Porto Rico, the Philippines, and all South America save Brazil. The problem is how to attain that mastery, even of the simplest natural language on earth. Pardon a personal allusion. The writer has been thru two Spanish courses. He has been working on the language off and on for about fifteen years. He is a college graduate, with a special aptitude for language, and a special training in five other languages. But he must confess that he would not at present time attempt to write the simplest business letter in Spanish—and that despite the fact that he knows the grammar of the language well and has a fairly extensive dictionary vocabulary. It is the idiom that gets you in Spanish and every other natural language. This idiom, without which no natural language is intelligible, we are safe in saying cannot be practically acquired without constant association with the natives of that language, which generally means two or three years residence, at least, in a country where the language is a mother tongue.

One other course is open for the merchant who desires a foreign field. That is to give up the idea of learning the foreign tongue himself, and hire clerks and interpreters who are conversant with the language, both for the home office and for each of the various foreign branches. Of course we know that such a system is so enormously expensive that it is open only to commercial houses of some capital. For the average business firm it is out of the question, and foreign business may be expediently dubbed "sour grapes."

But turn now to Esperanto, and what offers? Esperanto may be mastered within a year for any commercial purpose, however technical. There is no need to visit a foreign country for the purpose of learning this language, and a student can get a good working knowledge of the same without ever meeting another

Esperantist, either domestic or foreign. Pardon another personal allusion. The writer learned Esperanto from three textbooks: a thin elementary one, a 460-page quarto "advanced" one, and a third known as a "Sintakso" (Syntax). He went thru the first in three days, the second took him perhaps three months, and the third was sandwiched in somewhere between. He had no teacher. He had never seen another Esperantist. He had no correspondence as yet with foreign countries. But in 1908 he attended the First Congress of American Esperantists at Chautauqua, N. Y. At that Congress he heard a Swiss Esperantist deliver a series of lectures, thirty or forty minutes each in length, and to his, the writer's, amazement he understood the whole series of lectures from start to finish. He could converse with other Esperantists without the smallest difficulty. Within a year he was chosen American correspondent for the leading literary magazine of the then Esperanto world. Compare this experience with the same fellow's experience with the Spanish language, related two paragraphs before.

We have set a year as the outside limit for the mastery of the language for business purposes. As a matter of fact in most lines of business the actual learning time for the average person would be within six months. The writer's textbook apparatus cost him between \$1.50 and \$2.00, he doesn't exactly remember. In a city with an Esperanto class or classes a person may attend such a class either free or at a nominal charge. If unable to attend an oral class, and yet desirous of a teacher, he may obtain one by correspondence.

Now with this small expenditure of time and money what kind of a field is open for the business man? Spanish, with its crucial difficulties of acquisition, is the key to the Spanish-speaking countries only. Esper-

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

anto connects you with Spanish-speaking countries plus the rest of the civilized world! There are no "ifs" or "buts" to it. Don't judge the size of the Esperanto movement by the size of this paper. America, as we showed in our editorial three months ago, is (to her shame!) hugging the rear of the Esperanto movement. But the individual American merchant can derive exactly as much profit from the international language with his countrymen blind to its worldwide diffusion, as if they were falling over themselves to get into the Esperanto market,—indeed more so, for he has that much less competition from this side.

What has he to do to get into the stream, after learning the language? He must first join the Universal Esperanto Association. This will cost him 12/- a year. He then receives annually the Yearbook of the Esperanto Movement, and monthly the official organ of the said Association. At very moderate rates he may advertise in the said Yearbook and first of all reach directly the thousands of readers of the same, in 32 countries of Europe, 7 of Asia, 7 of Africa, 10 of the Americas, and 2 in Oceania—in all 58 countries thruout the world. This Association has thus far established "consulates" in over 1300 cities and towns in these 58 countries. Get out your circulars, pamphlets and other advertising literature in Esperanto, and ship them to the chief "delegates" at the head of these 1300 odd consulates, and, at the cost of their expenses, they will distribute them for you among the Esperantist public of their respective territories. If you do not care to take the trouble to mail matter yourself to 1300 centers, then pay a little extra and join U. E. A. as one of the 150 odd commercial "enterprises" affiliated with it. By so doing you receive an ad. free of charge in the Yearbook, and you have the privilege of shipping all your worldwide advertising direct to U. E. A. headquarters at Geneva, Switzerland, which will, without further bother to you, undertake the distribution of this literature to the various consulates thru the world charging you simply with the expenses of doing so). If you wish you can handle the correspondence and orders accruing from this adver-

tising directly from your home office; or else thru the delegates of U. E. A. in various centers you can hire an Esperanto-speaking agent, who will attend to your business for you at the foreign end.

To support our point we quote a very little from the 57 page Report on Esperanto by the General Secretariat of the League of Nations, adopted by the Third Assembly of the League in 1922:

"A circular or a pamphlet printed in Esperanto can be circulated thruout the whole world at a very slight expense, without the trouble of translating it into 20 or 30 languages and of finding agents to distribute it. Almost all international exhibitions use Esperanto to advertise in foreign countries and find it profitable to print their prospectuses in that language.

"To our knowledge, this was done in the case of the Exhibitions at Paris, Lyons, Leipzig, Frankfurt, Basle, Padua, Lisbon, Prague, Vienna, Reichenberg, and Helsingfors. For these exhibitions, Esperanto was used in correspondence; seven of them established an Esperanto section.

"In 1921, the International Labor Office made a small experiment. It published in Esperanto three documents on its work and organization and had them distributed by the representatives of the U. E. A. The result was the appearance in the daily newspapers of 219 special articles on the International Labor Office in 21 different languages, cuttings of which were collected by the International Labor Office. Since that time, the International Labor Office answers, in Esperanto, letters which reach it in that language. The Brazilian Government published in Esperanto the official documents about its centenary and its exhibition. We have had before us catalogs in Esperanto from commercial houses of every kind and from every country.

Of course this brief editorial cannot take up the matter of the application of Esperanto to any specific line of business. Anyone wishing to "slip in the clutch" on that can get full details by application.

—El Amerika Esperantisto,

## ESPERANTA STILO. \*

Du specoj de stilo ŝajnas maleblaj en Esperanto: la lingvaĵo arkaika kaj la lingvaĵo popola.

Sed ankaŭ tiuj ĉi malebloj ne estas nepraj.

Esperanto evoluas. Vortoj, stilmanieroj elmondiĝas. Tio ĉi okazas mal rapide, sed certe. Legante verkojn el la unua epoko de Esperanto, ekzemple la unuan lernolibron aŭ la Krestomation, oni trovas tie formojn ne plu uzatajn en la moderna Esperanto. Elrigardi anstataŭ aspekti, dome anst. hejme, laboremece anst. laboremo, tiam anst. tiam, kiel se anstataŭ kvazaŭ rifuziĝi anstataŭ rezigni ktp. — jen formoj, kiuj povas jam nun vekti impreson de arkaikeco, se . . . — Sed pri ĉi tio poste.

Ankaŭ la lingvaĵo popola ne estas tute malebla. Pri ĝi jam okazis kelkaj provoj kaj ne tute malsukcesaj. Verbotempo nuntempa anstataŭ esintempa en rakontado, ofta uzo de ke kaj kaj, inversoj de vortordo iras mi, vidas li ktp. povas doni al la stilo ian popolan aromon. Krome uzo de ne plene konvenaj vortoj, draŝi anst. bati, oreli anst. aŭskulti, piedi anst. iri, heni anst. ridegi, plenbuŝi anst. avido manĝi ktp. La "Proverbaro" de Zamenhof donas ĉi rilate jam belan materialon. Sed certe tre bona veno estus kolekto de tiaj esprimoj, kunmetita de internacia kunlaborantaro.

Vi vidas ke la Esperanta stilo havas riĉajn perspektivojn. Nun ĝi estas ankoraŭ en ĝerma stato, sed per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la vivantaj lingvoj, ĝia kresko kaj riĉa branĉornamo nepre devas veni. Pli aŭ malpli frue certe ankaŭ niaj lingvaj institucioj venkos la malhelpojn, kiuj nun malebligas la pli intensan laboron, kaj esprimvortaroj, proverbaroj, kritikaj lingvaj studoj; pri famaj esperantaj verkoj ebligos, ke ĉio jam farita kaj trovita ne estu enterigita en disaj, ampleksaj volumoj, sed estu facile alirebla al ĉiuj. Kaj nur tiam oni surprize rekonos, kian riĉan trezoran de esprimformoj kaj nuancoj posedas Esperanto jam ankaŭ nun.

Sed al la dezirata evoluo de la Esperanta stilo oni bezonas ankoraŭ ion, kio estas la plej grava afero laŭ mia opinio. Ĝi estas la unueco de la stilo. Tre grave estas emfaze akcenti ĉi

tion, ĉar multaj eminentaj Esperantistoj ne rekonis ankoraŭ sufiĉe ĝian esencan gravecon. Ofte mi legis el bonaj plumoj, ke traduko el iu nacia lingvo konservu specialaĵojn de la respektiva lingvo, ke iu traduko estas ĉarma, ĉar ĝi montras al ni interesajn idiotismojn nacilingvajn. Ĉi tiuj opinioj estas ne nur eraraj, sed ankaŭ danĝeraj por la esperanta stilo. Esperanto havas sian propran spiriton, ĉiu deflankiĝo de ĉi tiu spirito estas simple eraro, same kondamninda, kiel fremdaj naciismoj en iu nacia lingvo. La rumana lingvo, ekzemple, ne havas participojn, ĉu tradukante el ĝi ni esprimu ĉiun participon per aparta frazo? Per ĉi tio ni tute ne akiros la saman efekton, ĉar tia frazkonstruo en la originalo estas tute natura, dum en Esperanto ĝi estas nekutima, peza. Kie do estas la limo de ĉi tiu permeso pri la naciaj apartaĵoj.

Pripensu, ni volas havi stiletojn! Pro tio ĉi bezonas simplan, ĝeneralan stilon, kanvason, sur kiu oni povas brodi. Tia stilo jam ekzistas, estas troveble en la verkoj de la plej bonaj Esperantaj stilistoj: Zamenhof, Kabe, Grabowski, ktp. Ilia stilo havas propran spiriton, kaj ĉi tiu spirito de la lingvo malfermiĝas por ĉiu, kiu zorge okupiĝas pri bonaj verkoj. Kun iom da sperto oni bone povas konstati, kiam diferencas ĉi tiu spirito de la spirito de lia nacia lingvo, kaj tiam oni estos vere ĝenata, rimarkante, ke en iun lingvaĵon enŝtelis sin fremdlingva spirito. Kiu ne havas ankoraŭ la certan senton pri Esperanto, tiu ekzercu sin per simplaj tekstoj, partoprenu superajn kursojn, legu kaj legu kaj legu, sed literaturajn ĉefverkojn li lasu en trankvilo. Ĉar nek la originalo, nek nia lingvo dankos al li lian penon.

Do ekzistas propra spirito, ĝenerala, ĉiutaga stilo. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo. Ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankiĝon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankiĝo, ĝi devas signifi ion! ne tion, ke la tradukinto estas anglo aŭ japano, nek tion ke li estas komencanto aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun ano de ĉiu ajn nacio esprimus Esperante per la sama stilapartaĵo. Nur tiamaniere ni povas atingi, ke ian intencan nekutiman esprimformon la

leganto ne rigardu kiel nacilingvan idiotismon aŭ lingvan kapricon de la tradukinto, sed li eksentu ĝin kiel arkaikan aŭ popolan aromon, aŭ kiel stilapartaĵon de la aŭtoro.

Tia ĝenerala stilo ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj nur havante ĝin povas Esperanto kun ili konkuri en la kampo de l'stilo, t. e. en la literaturo kaj poezio.

Kompreneble ĉi tio ne signifas ke la naciaj lingvoj, el kiuj devenas kaj riĉiĝas Esperanto, ne povas ĝin efiki, evoluigi per novaj esprimformoj. Sed ĉiu tia nova esprimo estas bona nur, se ĝi povas kaj devas fariĝi ĝenerala. do ĝi konformas al la internacia pensmaniero, al la spirito de Esperanto kaj donas solvon por mankanta esprimo de nuanco. Esperanto estas vivanta korpo, do same kiel la homa organismo, ĝi ne povas toleri en si fremdan elementon, ĝi ĝenas, dolorigas, malsanigas ĝin. La eksterajn ĉifkojn ĝi devas dismeti kaj sintezi, konformigi al si, kiel la homa korpo asimilas la nutraĵojn; nur tiel fariĝos vere vivantaj partoj de la lingvo.

Tiamaniere mi imagas la konstantan fekundiĝon de la lingva spirito, la senĉesan evoluon de nia lingvo, per la tradukoj.

K. deKalocsav.

\* La jena fragmento estas ĉerpita el la parolado de s-ro Kalocsay, kiun li preparis por la ĉi-jaraj literaturaj "Floraj Ludoj" en Katalunujo.

La kompleta parolado estas presita en "Kataluna Esperantisto," VI, VII, VIII 1925. Red.

## ESPERANTISTA PAROLEJO ONI LAŬDAS.

S-ro Percy T. B. Hudson el Melbourne, Aŭstralio, kore dankas al S-ro George F. H. Clarke del. en Capetown, (Sud-Afriko); S-ro E. C. Mawbey vic. del. en Johanesburg, (Sud-Afriko); S-ro Pedro Gomez Del., kaj S-ro Andres Villafranca, vic. del.; en Buenos Aires, (Argentino); S-ro Pedro Casas del., kaj multaj aliaj afablaj amikoj en Montevideo, (Urugvajo); S-ro L. Sepulveda Cuadra, kaj S-ro Armando Castillo, en Santiago Ĉilio; pro afablaj akceptoj kaj gravaj servoj dum lia lasta ĉirkaŭ la mondvojaĝo.

## RECENZO.

RESPONDOJ AL KONTRAŬ-RELIGIAS PAROLOJ, de Msgr. De Segur, laŭ la germana traduko de P. H. Muller, S.V.D., (12a eldono), esperantigis D-ro A. Halbedl. Presita kaj eldonita ĉe "Styria" Universitata presejo kaj eldonejo, Graz, Aŭstrujo.

Ĉi tiu estas libro tradukita el la franca germanen kaj esperantigita el tiu traduko. Estas nerefuteble, ke tradukado devus esti rekte el la lingvo de la originalo por doni la plej kontentigan rezulton. Ankaŭ estas evidente ke, se oni ne sekvas ĉi tiun regulon, bazarda miskompreno aŭ malĝusta traduko estos kopiata en estontan tradukon. Certe ni havas elstarantan ekzemplon de sukcesplena nereakta traduko en "Batalo de l' vivo," kiun Zamenhof tradukis el germana traduko de la angla originalo, tamen — "unu hirundo ne faras someron."

La enhavo estas 53 kontraŭdiroj al religio kaj ties refuto, de la eminenta romkatolika prelato Segur kaj okupas 200 paĝojn. La valoro de tia verko estas memevidenta en ĉi tiuj tagoj de materialismo. La tradukinto en sia antaŭparolo, interalie, diras, S-ro N. N. . . . traesploris la manuskripton laŭ lingva vidpunkto kaj, plej kompetenta por tio, li glatis ofte mian lingvaĵon. Se vi sciis la nomon, vi ankaŭ sciis, ke helpis min unu el niaj plej bonaj stilistoj modernaj." Laŭ mia opinio, la lingvaĵo, kvankam plejparte korekta, estas neniel flulegebla, kaj la efeto de la nacia lingvo de la tradukinto estas ĉie rekonebla. Tamen, Segur konsilas, ke oni ne, ĉe unufojo, legu multon de la libro, kaj, se oni sekvas tiun konsilon, oni povas eltiri la sencon el la iom malklara vortordo kaj samtempe submetiĝi al la bonaj veroj de la Diamanta prelato. (C.W.B.)

Professor Caj-Juan-Pei, of the Pekin University, speaking at a local Esperanto meeting said: "If Chinese were able to communicate their ideas by means of Esperanto Americans and Europeans would be able to understand the Chinese and would become their friends. Everybody should learn Esperanto and then the necessity of learning the difficult Chinese language would be done away with. Therefore the Chinese must above all else do their utmost to aid the propaganda of Esperanto."

## KRONIKO.

MELBOURNE. V.—Ŝajnis ke la anoj de la Melburna Esperanto Societo, deziris fari bonan komenciĝon en la nova jaro, ĉar ili ĉeestis la unuajn kunvenojn grandnombre. Post la studperiodo, oni plezure pasigis la tempon per la rakonto de ŝercoj kaj anekdotoj kaj je la sekvinta semajno Sro. P. Hudson, donis tre interesan paroladon pri parto de sia vojaĝo en Sudafroko. Li parolis pri la mirindaĵoj de la lando,—ĝia pezaĵo, indigenoj, moroj de la loĝantaro, geografikaj formoj de la lando, ktp., kaj la anoj atendas kun plezuro la daŭrigo de tia interesplena temo. La sinjoro afable promesis tion fari, tre baldaŭ.

NOVA ZELANDO.—S-ro W. H. King nia laborema kunlaboranto jam multe sukcesis pri la kompilado de Nova Zelanda adresaro, li jam sukcesis ricevi preskaŭ 300 adresojn, kaj skribas, ke baldaŭ la adresaro estos eĉ pli ampleksa. Li ankaŭ nun laboras por fondi Esperanta Grupo ĉe Wellington, kaj informas nin, ke la samideanoj ĉe Auckland ankaŭ nun laboras por fondi centra klubo ĉe Auckland, tiuj sukcesoj certe finos nur en la restariĝo de la Nova Zelanda Asocio.

AUCKLAND, Nov-Zelando. La tagĵurnaloj raportas ke samideanoj en tiu ĉi urbo ĝuis sukcesplenan piknikon ĉe Brown's Bay dum 15 decembro. Kvankam kelkaj el la ĉeestantaro komencis la studon de Esperanto antaŭ nur kelkaj monatoj, tiuj povas paroli en la lingvo kun miriga facileco. Esperanto klasoj okazas ĉiusemajno.

WELLINGTON, Nov-Zelando. S-ro Darwin, el Melburno, vizitis tiun ĉi urbon dum mezjanuaro, post libertempo ĉe la suda insulo. Estis plezure vidi la sinjoron, kiu partoprenis la Kvinan Kongreso ĉe Melburno, lastan jaron.

## KURIOZAJON PRI MELKADO.

Sciigas sinjoro D-ro Berthold von Stetten en n-ro 13 de "Umschau," semajna gazeto, Frankfurt. Laŭ sia sciigo li ricevis 6, 5 procentan kromkvanton da lakto de bovinoj kaj kaprinoj ĉiam, kiam la melkado okazis kun muzikakompanado. Kiel muzikilojn li uzis gurdon, violonon kaj gramofonon. Vere profitiga kaj rekomendinda provo!

—Heroldo.

## HERE AND THERE.

In Belgium s-ro K. Huysmans, who is very favourably inclined to Esperanto, and who introduced Esperanto into the official evening schools of Brussels has been appointed Minister of Science and the Fine Arts in the Belgian Cabinet.

Mr. W. T. Middleborough, Davy Street, Hobart—"Permit me to say that as an old pressman I am taking particular interest in 'La Suda Krucio.' I trust that you will hold your own against all comers."

The efforts of the Belgian Esperanto Propaganda Committee has been so successful, that Esperanto is now being taught in the evening classes of the public schools; there are two classes for beginners, and two for advanced pupils, instructed by officially paid teachers—and Esperanto is now used for the official announcements of the town of Antwerp.

The Minister of Instruction has again made valid the permission to instruct Esperanto in the Public Schools of Budapest.

The powerful Radio Station of Berlin "Voxhaus" has from the 14th November broadcasted lessons in Esperanto for beginners—this makes the third series of lessons being broadcasted in Berlin. The Gazette "Du Funkstunde" which has 22,000 readers has several times drawn attention to these lessons. Commissioned by the directors of the Berlin Radio Station, Julius Gluck, president of the Berlin Esperanto League, has published an Esperanto instruction book for Radio listeners. The book consists of 6 parts, each part consisting of 4 Esperanto Radio talks; the first part which appeared on the 10th November was sold out in 10 days, and a new edition was necessary, the second edition was sold out in two days. S-ro Gluck then invited the Radio listeners to join a group for exercise in speaking Esperanto, and immediately received the names of 518 persons, who wished to learn. Esperanto is the fashion in Berlin.

La gvidulaj nacioj, homoj kaj sciencaj centroj povas helpi esperanton per oficialaj ordonoj, per almenaŭ duhora studo de la gramatiko, kaj publikigante resumajn esperantajn en ĉiu scienca verko, kiel unue faras nun Madrid Cientifico.

**LETERO DE SINJORINA SAKURAI**

SinJORINA Sizue Sakurai estas bona samideano, kiu loĝas en Ĝenevo kune kun sia edzo, kiu servas ĉe Internacia Labora Oficejo. Eble ŝi estas la unua japana Esperantistino, kiu ĉeestis la Universalan Esperantan Kongreson. Ŝi skribis al sia amikino en Tokio jene.

Nia Universala Kongreso malfermiĝis la 2-an de aŭgusto kaj fermiĝis hodiaŭvespere (la 7-an).

Ĉeestas 1,500 delegitoj el 40 nacioj. Ĉie sur stratoj kaj en tramoj troviĝas multaj, kiuj portas verdan stelon sur siaj brustoj, kaj parolas en Esperanto.

Ĉie flirtas Esperantaj standardoj. Estas tre interese, ke samideanoj el diversaj landoj portas siajn diversajn naciajn kostumojn, sed ĉiuj parolas la saman lingvon.

Ili parolas al mi kiel al konatulo, ĉar mi ankaŭ portas verdan stelon. Mi sentas, ke mi kvazaŭ estus inter "Esperanto Nacio," se tia ekzistus en la mondo.

Mi sentas min tre feliĉa, ĉeestante la Kongreson, sed samtempe tre domaĝas, ke vi ne estas inter ni.

Unu samideano ĉiam ĉeestas la Kongreson sen supervesto kaj unu samideano portas verdan veston kun stelforma punkto, ili estas rimarkinda vidaĵo, sed preskaŭ ĉiuj geĉeestantoj sinvestas modeste, kaj ne troviĝas dande vestitaj homoj.

Mi ankoraŭ ne povas paroli bone en Esperanto, sed la Kongreso donas al mi bonan ŝancon por ekzercado; ĉiufoje mi komprenas pli facile.

Kongresaj paroladoj ĉiuj estis tiel fluaj kaj belaj. La Esperanta dramo Ĝinevra estis ludita en granda teatro en Ĝenevo. Ĝi estis tre bela kaj tre lerte ludita. Poste, unu poeto deklamis sian poemon, kaj unu finnlandano kantis Esperantan popolkanton. Ili ankaŭ estis tre belaj.

En la raporto pri nia movado en la pasinta jaro, ni sentis ĝojegon, sciiginte, ke nia internacia lingvo, dank' al senlaca klopodo de multaj entuziasmaj Esperantistoj, prosperis en diversaj aferoj.

Mi vidis diversajn Esperantistojn; kaj pensas, ke estas tre grave, ke nia movado estu gvidata de homoj de firma kaj nobla karaktero, kiu povas fari vere bonan propagandon.

Hieraŭvespere ni havis Victoria Hall, kiu estas muzika halo luksa kaj granda.

Diverslandaj gesamideanoj plenigis la halon. Multaj delegitoj faris bonajn kaj lertajn paroladojn. Kelkaj el ili, kiuj havis blankajn harojn, bone konis Zamenhof.

Ni kune kantis himnojn "Fratoj, manon donu kore" kaj "Espero."

Gesamideanoj ĉe la Kongreso estis tiel afablaj al mi, ke ili parolas al mi kaj faras aferon por mi antaŭ ol mi ekparolas.

Ĉe la Kongreso, mi trovis, ke ili ĉiuj havas honestajn, bonajn, afablajn kaj sincerajn korojn, kiuj ofte troviĝas en tiuj de kamparanoj.

Vi trovos la programon kaj organizajn aferojn de la Kongreso en la Kongresa Libro, kiun mi sendis al vi.

—El La Revuo Orienta.

**RADIO-ESPERANTISTA FESTO EN BARCELONO.**

Pro la fino de la kurso de Esperanto, okazos dum la monato oktobro, grava kaj kurioza Esperantista festo. En tiu tago, la tuta programo estos esperanta kaj partoprenos en ĝi diversaj gesamideanoj: malnovaj, kiel D-ro. Bartomeu, kaj novaj, kiel estas kelkaj el la lernitoj per Radio-Barcelono, ekzemple Fino. Castellvi, tre lerta kantistino, kaj aliaj.

Sed la plej kurioza afero konsistos ke oni dissendos paroladojn de D-ro. Zamenhof, de Profesoro Bourlet, de Graboski kaj aliaj mortintaj samideanoj, kies fonografaj cilindroj posedas la malnova samideano S-ro. Alfonso Sabadell, kiu, tute afable, permesos tion.

La fervora radio-esperantisto D-ro. Bartomeu, provis tiujn fonografocilindrojn per Radio-Barcelono kaj li atingis bonan sukceson.

**KONGRESO DE KONTOSCIENCO.**

La unua Brazila Kongreso de Kontoscienco, kunveninta en Rio-deJaneiro, dum la monato Aŭgusto, sub la honora prezido de Sro Dro Sampaio Vidal, Ministro de l'Financoj, aprobis unuanime la jenan proponon prezentitan de Dro Carlos Domingues kaj raportitan de Dro Francisco Ferreira de Mello, vicdirektoro de la Komerca Akademio de Rio-de-Janeiro:

"Devas esti enmetita en la komercajn kursojn la instruado de la internacia lingvo 'Esperanto,' kiel helpa mondlingvo, la sola efika solvo de la grava problemo de la internacia kompreno."

## GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ tiu ĉi adreso—"La Suda Krucio," Box 731 F, P. O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia:—Amerika Esperantisto, 1; Bulgara Esperantisto, 1, 2; Brazila Esperantisto, 7—9; Belga Esperantisto, 8—9; Bulteno Antverpena, 11; Romanuja Esperanto, 9; Heroldo de Esperanto, 89 ĝis 98; Itala Esperanto Revuo, 10, 11, 12; Informservo de Labora Oficejo, 105, 106; International Language, 12; La Unuigita Tutmondaro, dec.; La Nova Tago, 3; La Revue de la Univers, 28; Le Monde Esperantiste, 5; La Ridanta Esperantisto, 3; La Ora Epoko, 1; Oomoto, 12, 13; Svenska Esperanto, 12; Samosa Esperantisto, 1—2, 3—4.

## GRAMOFONDISKOJ.

Kiuj volas havi gramofondiskojn devus turni sin al la Brita Esperanta Societo, 17, Hart Street, Bloomsbury, London, W. C. 1. Antaŭ nelonge kun la helpo de la Linguaphone Instituto. BEA fabrikigis serion da diskaj parolataj de nia fama D-ro Privat. Kvin diskaj, kun teksto, en albumo kostas £2.2.—. Ili entenas paroladojn kaj deklamojn t. k. "Zamenhofo pri Homaro." "La Espero," "Ho mia kor," "Al la fratoj" kaj aliaj poemoj; "Zamenhofo pri Elparolado kaj Stilo: citaĵoj en "Kursa Lernolibro" kaj "Karlo," kaj "La Kavaliroj de la Verda Stelo" de Privat, citaĵo el "Ginevro" kaj poemoj el "Tra la Silento" de Privat.

Ankaŭ kompleta lernkurso parolata de D-ro Privat estas preta; en 15 duflankaj diskaj kun lernolibro, kiu kostas £6.6.—. Oni skribu pro ambaŭ al BEA laŭ supra adreso aŭ al Linguaphone Institute, 24-27 High Holborn, London, W. C. Ankaŭ oni novas mendi pere de la bibliotekisto

de la Melburna Esperanto-Societo, Box 731 f, P. O. Elizabeth St., Melbourne; sed oni devos aldoni iom al la kostoj por impostaj kaj poŝtel-spezoj. (Red.)

**Melburna Esperanto-Societo.** Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Hobarta Esperanta Grupo.** Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str.: Hobart.

**"Iru Antauen"-Grupo.** Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

**"Nigra Cigno"-Grupo.** Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretario f-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

**Persista Grupo, Armadale, Melburno.** Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretario: f-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 68 (Sixth Year)

Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 marto 1926

## ESPERANTO LITERATURE — WORLD WIDE.

In most countries where Esperanto is used and in which esperanto magazines are published, a tendency exists to abolish altogether or at least to reduce the number of small periodicals. The feeling among leading esperantists is that the movement will be better served by supporting fewer magazines with articles of a literary nature contributed by acknowledged writers of good style esperanto.

The progress of time has evolved, and still is evolving, a truly esperanto type of literature, an international world language type, capable of being understood and appreciated by peoples of widely different national aspirations, culture and education. Many esperantists hold the view that esperanto has now reached a stage in its history where journals, which are merely a means for recording the progress of the language, are more or less superfluous. It is claimed that a strong demand exists among the ever increasing number of esperanto readers, for international literature of an informative nature. Apparently this is true, if one can judge by the ready sale of high class literary works and magazines. Esperanto has reached a point in its development which marks another step towards the creation of a literature of its own; a literature which is world-wide, appealing to men

and women of all shades of thought and culture, creeds and beliefs, as widely apart as Bagdad is from London. The dominant notes in esperanto literature are directness, simplicity and a harmonious rendering of the sense of the thought expressed. Writers have discovered that esperanto enables them to express the finest shades of meaning, which are capable of being understood, and felt by people of all nations. This fact alone assures to the auxiliary world language a continual addition of men and women writers of experience, culture and genius. The latest addition to the list of literary magazines comes from Harbin, Manchuria, "Orienta," is an illustrated review consisting of 90 pages, well printed on good paper. The editor is S-ro I. Sersev—who, by the way is now in Sydney. Most of the articles and stories are of an interesting and informative nature, containing facts, figures and general information which is not available to people of the western nations from other sources. "Literatura Mondo" is another admirable magazine published in Budapest. Among the disappearing magazines is "Literaturo" a London publication; this little journal after 7 years' existence announces its own demise in the last number. Many esperantists will regret its departure from the ranks of esperanto periodicals.

## RECENT PRESS NOTICES.

By E. M. Pope, Chairman Ex. Com.  
E. A. N. A.

In view of the fact that the newspapers of this country are noticeably silent on the subject of a world language in general, and especially shun any mention of Esperanto, it is gratifying to note that the language problem is fast pushing to the front as the result of the many difficulties attending international gatherings.

On the occasion of the arrival in Chicago of Carl Lindhagen, Lord mayor of Stockholm, Sweden, on Oct. 15, the Chicago Daily News said:

"The Lord mayor was a delegate to the recent conference of the interparliamentary union, which closed recently at Ottawa, Canada, though most of the sessions were held at Washington, D. C. He was far from satisfied with the conference. The delegates were ready to champion nice generalities like 'no more war,' but they were 'too conservative to adopt definite measures that might end war,' he said. He proposed a single language for all nations as a necessity for world peace.

"Mr. Lindhagen's proposal of a world language was one of ten motions he put before the interparliamentary group. Although virtually all the delegates individually favored the motions, collectively they refused to adopt them.

"And yet it is good that we discuss the measures of peace,' he said. Without discussion there never will be adoption, and until there is adoption of constructive measures there always will be danger of war.

"The plan for a world language is not radical. I do not advocate any nation giving up its own language. In the schools of every nation two languages would be taught. In America it would be English and the world language, in France, French and the world language.

"The world would have a common tongue. We could understand each other. Understanding would bring brotherhood. And so, a world-wide language is a spiritual necessity for a united mankind."

"Mr. Lindhagen said that such a language should be one constructed definitely for the new purpose. It should not be any national tongue."

A similar report appeared in the news columns of the Chicago Tribune on the following day. When it is considered that the combined circulation of these two dailies is about a million copies, it will be seen that the international language idea was widely broadcast in those two news items.

Of the Washington meeting of the Interparliamentary Conference, the Post of that city speaks of "legislators from 41 countries groping in a maze of languages," and Henry M. Hyde Washington correspondent of the Baltimore Sun, reported to his paper as follows:

"Perhaps the greatest handicap under which this and all other international conferences labor is the diversity of languages. Among the delegates were groups, each of which spoke and understood only one language. And under the rules every speech had to be translated into at least two other languages. This multiplied by three the time used by each speaker and prolonged the proceedings to the point of exhaustion."

—el Amirika Esperantisto.

## RADIO SUKCESO.

Troviĝas en germana radio-ĵurnalo, "Der Saechsische Funk," (La Sakso Radio), la jenan paragrafon:—

"La ĉefpoŝtoficejo en Berlino sciigas, ke radio-amatoroj en Melburno, Aŭstralio, letere avizas la regulan partoprenadon al la Esperantaj lekcionoj dissenditaj de Breslaŭ Radio-Ŝtacio."

Ni estus tre dankemaj ricevi detalojn pri tia duflanka granda sukceso.

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

Antaŭ nelonge revenis al Sidnejo Kapitano G. H. Wilkins, kiu esploras la nordajn partojn de Aŭstralio dum unu tuta jaro, kaj li skribis interesajn artikolojn por la tagjurnaloj pri la tieaj indiĝenoj; nun mi lasos al vi paroli al vi pri liaj spertoj.

“Estis arangite, ke mi akompanu junulon nomita Yarra, kiu povas paroli iomete la Anglan lingvon, kaj liaj kunuloj, kaj loĝi ĉe ilia gento. Ni lasis la protempa kamploĝo je sunleviĝo la sekvantan matenon, kaj por ne malhelpi la ordinara vivmaniero de la indiĝenoj mi portis kun mi nur tiom da pakaĵoj,—kiom mi mem povis facile porti.”

“Mi decidis ne dungi la indiĝenojn, sed nur vojaĝadi kune kun ili, kaj observadi ilajn murojn. Kelkaj el tiuj ĉi indiĝenoj jam antaŭe vojaĝis kun blankhaŭtuloj, kaj insistis porti por mi la malmulton, kiom mi portis. Nia vojo dum la unuaj du mejlojn estis tra hirudplena marŝaĵo, kie la akvo atingis ĝis niaj genuoj. Mi portis altajn kanvasajn gamaŝojn, sed la indiĝenoj, kiuj estis nudaj, krom snureto ĉirkaŭ la talio, multe suferis.”

“La sango fluadis el multaj vundoj de liaj kruroj, antaŭ ol ni atingis la plialtan sablan landon, sed tuj post ni lasis la marŝaĵon, ili ridis kaj ŝerĉis pri la ĝenaĵoj. Post marŝado de 3 horoj ni atingis valon, kaj en tiu loko la indiĝenoj informigis min, ke ili esperas renkonti aliajn indiĝenojn. Ili haltis, vokis, kaj aŭskultis, sed venis nenia respondo.”

Ni tiam alproksimiĝis al kie antaŭ nelonge brulis fajron, kaj ri pozis homoj, ĉar tie troviĝis kelkaj “Coolamona” (Pladoj faritaj el arĉŝelo) kaj aliaj postsignoj de homoj. Mi demandis, ĉu la virinoj timiĝis je mi, kaj forkuris? kaj mi estis informata, ke ili jam kelka tempo antaŭ ol mia alveno iris ĉasi.”

“Minacis ke pluvos, kaj sen ia sugestio de mi, kelkaj el la indiĝenoj per hakiloj forigis la ŝelon de kelkaj arboj, aliaj portis la ŝelon al la ripozloko, kaj baldaŭ ili konstruis A simila sirmilo per ŝirita ŝelo. Kiam la la sirmilon per ŝirita ŝelo. Kiam la ŝirmilo estis finkonstruita, ili lokigis miajn posedaĵojn en la centron, kaj per signoj montris, ke ĝi estas je mia dispono. Pluvigis, kaj mi volante en-

iris la ŝirmilon, sed la indiĝenoj sideĝis ekstere kaj estis kontenta resti en la pluvo. Kiam mi signis al ili, ke ili venu internen, ili surpriziĝis, kaj hezitis, antaŭ ol akcepti.

“Unu post la alia ili eniris, kaj sidiĝis je la rando de la ŝeltapiŝo, kaj aspektis kvazaŭ ili sin trudis. Kamaradeco kaj amikeco baldaŭ reĝis, sed estis evidente, ke ili ne tute povis kompreni la sintenado de tiu ĉi fratiĝanta blankhaŭtulo, sed baldaŭ venis ia aplombo kaj ili babildis kaj ridis inter si.”

“Kiam ĉesis plui du el ili foriris per serĉi mielon de la sovaĝaj abeloj, sed la plimulto aŭ sidadis aŭ paroladis ĉe la fajro aŭ dormis. Kelkaj el ili nenion manĝis tiun tagon, sed ili estis kontentaj ripozi, kaj ŝajne esperis ricevi ion por manĝi plimalfrue. Pri tio ili ne eraris, ĉar ĉe krepusko revenis la virinoj, kiuj anoncis la alvenon per kriado. Knabeto kiu akompanis ilin portis faskon da palmkoroj, kaj la viroj dividis ilin inter si.”

“La edziĝitaj viroj, tiam lasis nin por viziti la virinojn, kaj mi promenis ĝis kie fonto elŝprucas el la montetflanko. Mi ĉirkaŭ promenis por eviti la lokon, kie troviĝis la virinoj, sed dum mia reveno unu el la viroj al-tetenis nudan infaneton, kaj mi alproksimiĝis por rigardi ĝin. Je mia alproksimiĝo la virinoj montris signojn de timo, kaj koveris sin per ŝelo, tiel kiel ili sidis inter du muroj, kaj sub tegmento. Tiu ŝi ŝajne estis nur konvencio, ĉar kiam mi malparade flanken iris, por ke mi bone povu vidi ilin, ili ne sin turnis, sed rigardis min kun scivolemo.

“La infano estis grasvizaĝa knabeto, aĝa eble 6 monatoj, kaj li ekprenis la fingron, kiun mi proponis al li, kaj ĝoje ridis. Tiu ĉi plaĉis ĉiujn, speciale la virinojn, kaj unu el ili malsupren metis la superkoverilon kaj ridetis. Ŝajne per tiu ĉi bonŝanca afero mi gajnis ilian konfidon, kaj gajninta la aprobon de la infaneto la virinoj ne plu timis je mi.”

“Mi jam manĝis mian kondensigitan manĝaĵon ĉe la fonto, sed baldaŭ post mia reveno al la ŝeldometo la knabetoj alportis ion por manĝi, inter aliaj manĝaĵoj, kelkaj bakitaj igitaj namoj, kaj palmkoroj por la viroj, kiuj proponis al mi iom da la manĝaĵoj. Kutime mi akceptas kaj manĝas iom da la indiĝena manĝaĵo, kiam

oni proponas ĝin al mi, kaj tiu ĉi ŝajne multe plaĉas la indiĝenojn. Mia parte mi proponas nur ĝuston de ion, kion mi portas. Se ilia manĝaĵo estas pura kaj bongusta mi plenmanĝas je ĝi, kaj tiam povas esti pli malavara kun la miaj manĝaĵoj, kaj pro tio mi pruvis ke la indiĝenoj estas instigataj ĉasi laŭ siaj propraj metodoj, kaj ke ili ŝatas la amikan interŝanĝon."

"Dum la nokto kaj malgraŭ la pluvo, la viroj rifuzis eniri la ŝeldometon, kaj dormis ekstere, kiel ankaŭ faris la virinoj, ŝirmitaj nur per kelkaj arbetoj fiksitaj en la teron. La indiĝenoj ne vekigis ĝis sunleviĝo, kaj post mi jam matenmanĝis ĉe la fonto, mi vizitis la lokon, kie mi vidis la infaneton. Tiu ĉi foje la virinoj ne montris timon je mia alpromsimiĝo, sed sidis modeste malantaŭ la ŝelkoveriloj, kaj ne koveris al si la kapojn.

"Estis 3 virinoj ĉe tiu ĉi kamploĝo, kaj ĉe alia kamploĝo, distanĉe eble cent jardojn, estis 3 aliaj virinoj, unu el ili la patrino de "Yarra" kaj la aliaj 2 liaj edzinoj. Nek la viroj nek la virinoj matenmanĝis kaj baldaŭ ili sciigis el mi, ke ili formarŝos al alia kamploĝo."

La viroj unue foriris, kaj la virinoj laŭ sia inklinio. Ni sekvis la bazon de la montaro dum du horoj, kaj alvenis ĉe groto, kiu donas bonan ŝirmon kontraŭ ĉia vetero. Evidente la groto estas ofte uzata, la muroj estas koveritaj per multaj pentraĵoj, reprezentante viroj kaj virinoj, kanguroj, fiŝoj, kelonioj, indiĝenaj kanotoj, Malajaj pruoj, kaj modernaj velboatoj. Multe da la pentraĵoj estas bone skizitaj. Unu tre bone bildigas la alvenon de la misia ŝipeto ĉe "Groote Eylandt." Sur la ferdeko de la ŝipeto kun veloj malaltigitaj troviĝas viroj, kiuj pretigas la ankron. Viro kiu portas misia robo staras ĉe la direktilo, kaj inter la ferdekoj, kaj montrita tra la flankaj de la ŝipeto estas du virinoj, kiuj portas ĉapelojn.

En venonta letero mi denove skribos pri la spertoj de Kapitano C. H. Wilkins. Kun amika saluto, via fidele. P. H.

#### HERE AND THERE.

**Archeology.** The important magazine *Revue des Musees* desires to get into touch with archeologists throughout the world, and is willing to re-

ceive and publish articles in Esperanto. Secretary of the Esperanto fako: Robert J. Filliatre, 28, Rue de l' Agent Dufraine, Saint-Cyr l'Ecole (S. et O.), France, who urgently desires those Esperantists interested in archeology to write him.

**Boot Industry.** E. Wiener, Raunhentalstr. 2, Meissen, a/E, Germany, is collecting information on the boot industry throughout the world by means of Esperanto, and wishes to get into touch with all Esperantists in the trade.

**Esperanto and Science.** Thanks to the generosity of an anonymous friend, the B.E.A. is able to distribute free of charge any reasonable number of the report on the International Conference on the use of Esperanto in Science held in Paris last May. Thanks to the same friend nearly 20,000 copies have been distributed or reprinted in various technical magazines.

**Japanese Aviators carry Esperanto Message.**—An interesting account appeared a while ago in Soviet Siberia, a daily newspaper published in Nova Nikolaevsk, of the arrival of two Japanese aviators flying from Tokio to Moscow. These aviators carried with them a letter to Soviet Siberia from the Japanese newspaper *Osaka Asaki* and the Japanese Esperanto Association. The letter, written in Esperanto, contained greetings to the Russian people from the Japanese people.

"Osaka Asaki," stated the letter, "recognises the tremendous importance of the four chief means of union between peoples—Aviation, Radio, Esperanto, and the Kinematograph, and in every possible way is helping their spread and growth."

The letter drew attention to the regular Esperanto features in *Osaka Asaki*, and proposed the organisation of exchange of films, and also radio communication with the help of Esperanto.

**L'Orchestre Sabini.**—"During the hearing of a case at Marlborough Street the depositions were interpreted in French to the accused. The Clerk used the expression "the Sabini band," which the interpreter rendered as "l'orchestre Sabini," to the great amusement of the Court."—From "The Star." (Thus are we at the mercy of interpreters!—Ed.)

## KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K. — "Radio," el inter radianoj, kaj laŭ sciigo de la raktantaj la progreson de nia lingvo peranto, kiel ĝia fratina ĵurnalo. Ofte aperas "Esperantaj Notojn" pritredaktoro, konstanta fako en ĉia numero baldaŭ fariĝos. — Antaŭ kelkaj monatoj la eldonejo letere elsendis tutmondan enketon pri radio-disaŭdigado, ĝia progreso, potenco kaj lingva limigo, uzante Esperanton por neangle parolantaj landoj. La rezulto publikiĝos en "Radio" dum proksimaj semajnoj, okupantaj kelkaj sinsekvaj numeroj; la esperantlingvaj respondoj (anglen tradukitaj por la legantaro ricevos elstaran mencion.

Pro oficiala transloĝiĝo al Newcastle, N.S.W., la longjara prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, S-ro Frank V. Taylor, estis devigita forlasi la klubon. Por honorigi liajn senlacaĵajn laborojn la membraro nun klopodas doni al li kaj lia edzino taŭgan memorajon. Nova prezidanto ne estos elektata ĝis la jarkunveno dum junio; intertempe la vic-prezidantoj, S-roj. A. Auwart kaj F. T. Simon, agos.

S-ro Pfahl faris la dekduan radio-paroladon pri Esperanto ĉe 2FC Radio Stacio, la 18an. Februaro, kaj la dek-trian la 9an. Marton.

MELBURNO. V. — La programeroj de la Melburna Esperanto Societo dum la lasta monato estis tre interesaj. Denove la anoj interesiĝis pri la vojaĝspertoj de S-ro P. Hudson en Suda kaj Centra Afriko. La traduko de infanejajn rimaĵojn multe amuzigis la anojn. S-ro Sekfy donis bonan paroladon pri Hungarujo, kaj ĝia popolo. Multaj partoprenis en la debato, "Ĉu Australianoj dediĉas tro multe da tempo al sportoj." Post vigla debato la plejmulto voĉdonis, ke ne. Laŭ la "British Esperantist" ĵus ricevita, F-ino Virginia M. Cox, la sekretariino de la M. E. A. gajnis La B. E. A. Diplomon. Korajn gratulojn.

DARGAVILLE, Nov-Zelando. — Sub gvidado de lia pionira moŝto, S-ro Alfred Gregory, la klaso denove funkcias; dum multaj jaroj Dargaville posedis klason, sed dum pasintaj dekdu monatoj interrompo okazis.

WELLINGTON, Nov-Zelando. — La multaj geamikoj de S-ro W. L. Edmanson bedaŭros aŭdi pri ties kvin semajna malsano. Je la kvara januaro severa tertremo okazis ĉe Wellington, kio tre malbone difektigis la nervsistemon de la sinjoro devigante al li enlitiĝi, nuntempe li malrapide resaniĝas.

WHANGAREI, Nov-Zelando. — S-ro Tilly, D.B.E.A. Deligito de M. E.A. raportas, ke dum tria semajno de februaro li brodkastos en la intereso de Esperanto perradie el stacio ĉe Whangarei. Tiu stacio estas la dua, kiu komencis brodkasti en Esperanto; kaj povas esti taksata, kiel alia signo de progreso de la lingvo en tiu ĉi malproksima insularo.

## PASTRO SERIŜEV.

Aŭstralio estas tiel for de la ordinara trafika vojo de l'mondo, ke oni nur malofte havas la feliĉon persone saluti mondfamajn esperantistojn. La lasta okazo kiam tia plezuro trafis Aŭstralianojn estis dum 1912, kiam la nun mortinta lingvo-batalanto D-ro Pollen vizitis la precipajn havenojn sur pasaĝerŝipo fiere flirtante la verdan standardon.

Dekkvar jaroj forpasis kaj nun preskaŭ nova generacio de esperantistoj poviŝ bonvenigi alian bonkonatan samideanon en Sidnejo. (Sydney). Estis Pastro Inocento Seriŝev, el Harbin, Manĝurio, kies nomo ne nur estas konata kiel valorega propagandisto en orientaj landoj, sed kiel verkanto de diversaj libroj, senfinaj gazetartikoloj, kaj lasttempe kiel redaktoro de l'nova laŭdinda 100-paĝa esperanta revuo "Oriento."

Je la komenco de januaro nunjare. Pastro Seriŝev alvenis el Nagasaki per vaporŝipo "Aki Maru," malrapide travojaĝinte Hinujon kaj Japanojn, samtempe aldonante sian riĉan, intiman konon de tiuj landoj en sperta maniero. Akompanita de familianoj li ne estis, sed esperas tre baldaŭ venigi sian edzinon kaj du infanojn.

Kaŭzoj de lia elmigrado li donis al kunvenigintaj Sidnejaĵ Esperantistoj dum tre flua spirita parolado kelkaj tagoj poste. Ĉirkonstancoj en Harbin kaj la tuta ĉirkaŭaĵo estas ekonomie kaj politike malbonaj, tial leginte multon pri la lando de "lakto kaj mielo" kie ĉiuj vivas pace kaj laboras, li decidis provi la sorton kaj kun konsilo de S-ro L. M. Pfahl, loka delegito de U.E.A., li venis.

Unue li portis salutojn de la Pekina Esperanta Kolegio (kiu tiel afable sendis belegan silkan memoraĵon kaj "domgardiston" por la lastjare okazinta Aŭstralazia Esperanto-Kongreso en Melburno), kune kun personaj salutoj de vaganta Aŭstraliano, D-ro F. H. Williams, due el Japanujo "etendante la manojn trans la maro al niaj samideanoj en Aŭstralio," kaj fine de diversaj grupoj tra la Oriento.

Kiel neniam antaŭe li spertis la utilecon de Esperanto, li diris. Depost la tempo kiam li sendis unuan poŝtkarton helpe de vortaro al nememorigita korespondanto en Aŭstralio, tiamaniere enkondukante sin al fremdaj landoj, li trovis, ke kie ajn terparto oni vizitas ĉiam troviĝas familian rondon.

Rakontinte multon pri la Oriento en mallonga tempo, Pastro Seriŝev findiris, ke li nun intencas scii la kondiĉojn en Aŭstralio, daŭrigi sian helpon al la movado laŭpove, kaj poste eble per alvokado de samnaciaj esperantistoj starigi "Esperantan kolonion" sur la kamparo.

Ĝis la alveno de liaj familianoj la Sidneja Esperanto-Societo sendube havos la feliĉon kalkuli lin kiel energian gvidanton per kies sperto ĉiuj membroj multe profitos.

### "KATALUNA ANTOLOGIO."

Estas jam duone presita la "Kataluna Antologio." Tiu ĉi granda verko enhavas elektitajn pecojn de katalunaj poetoj kaj prozistoj, antikvaj kaj modernaj. Ĝi estas presata sur linpapero kaj okupos pli ol 400 paĝojn.

La versaj kaj prozaj tradukoj estas faritaj de lertaj katalunaj esperantistoj, sub la gvido de Jaume Grau Casas, kompilinto de la "Antologio." Ĝia stilo estos plene Fundamenta.

Krom la tradukitaj literaturaĵoj, estos en la libro noto bio-bibliografia pri ĉiu aŭtoro, kelkaj popolkantoj verse tradukitaj kun la koncernaj melodioj, kaj studo pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. En tiu ĉi studo estas speciale pritraktataj la verkoj de la famaj mezepokaj Trobadoroj, ĉu Provencaj, ĉu Katalunaj. Estas ankaŭ rimarkindaj kelkaj komparoj de la kataluna lingvo kun la hispana, la iranca kaj la itala.

Petu detalojn al la kasisto de "Komitato por Kataluna Antologio": S-ro Eduard Capdevila, str. Carders, 29, Barcelona.

### PRINTEMPA VESPERO.

Estis trankvila printempa vespero. La subiranta suno elsendis siajn orajn radiojn kiel lastajn salutojn de la tago kaj grupo de fortstaturaj betuloj trapenetris purpura brilo de la vesperruĝo. Kanto de birdoj jam antaŭlonge silentiĝis — ĉie estis trankvile, nur de malproksime sonis mildaj tonoj de korno, kiujn ĉi tien malforta printempa zefiro alportis sur siajflugiloj, movante foliojn de la arboj, kiuj alpremiĝis al si kvazaŭ ili flustrus fabelon de juneco. Nenio interrompis la sanktecan kvieton. Subite sur randon de senarbigita loko elkuris kapreolino; ĝi haltis por aŭskulti sonojn de la korno. Momenton ĝi staris senmove, poste ĝi kiel pafajo turniĝis por ree malaperi en la arbaro. Ekestis denove tomba trankvilo; eĉ la tonoj de la delikata instrumento silentiĝis. Suno estis jam subirinta. Vesperiĝis; vesperruĝo paliĝis, ĝis ĝi malaperis plene. Siluetoj de la arboj unuiĝis en malproksimo kun venanta mallumo. Sur ĉielo ekbrilis Venuso kaj poste la ceteraj steloj. Al ĉiuj tronis pala luno, kiu desegnigis sur la tero akrajn ombrojn. Sur turo en la urbo finsonis la oka horo kaj sonorado de sonoriloj eniĝis profundan vesperon trankvilon. Ĉio en la naturo ekdormas por morgaŭ vekigi al plua vivo — al plua laboro.

### LA FAMILIA BUDĜETO DE LERTA LABORISTO EN RUSLANDO.

La semajna informilo de la Internacia Laboroficejo eldonas ciferojn, elcerpitaj el Rusa oficiala publikigaĵo montrantaj la familian budĝeton de lertaj laboristoj en Moskvo.

La enspezo de la familio estas dividita laŭ tri rubrikoj: (a) enspezo de la famiestro, kiu konsistigas 75,5% de la tuto; (b) enspezo de aliaj membroj de la familio, 14,2%; kaj (c) diversaj enspezoj, tio estas, pruntoj, kreditoj, donoj, k. t. p. 10,3%.

Komentariante la rezultatojn de la enketo, la oficiala Rusa Bulletin diras, ke "pruntoj kaj kreditoj konsistigas tre gravan fonton de monata enspezo por la laboristoj."

Sub la rubriko "elspezoj," 3,6% de la tuto konsistas el kotizoj al sindikatoj kaj pagoj al diversaj komunistaj organizaĵoj, dum la sumoj asignitaj por la edukado de la infanoj kaj por la laboristoj mem kaj la plen-

kreskaj membroj de ilia familio estas apenaŭ 0,6% de la tuta elspezo. (Informservo de la Internacia Laboroficejo, 103-B.)

### RADIO AND AN INTERNATIONAL LANGUAGE.

Every radio enthusiast must have been reading with interest the weekly articles under the above heading in the Radio Supplement. The articles speak for themselves, and in view of the facts, one can but conclude that the only solution of the difficulty is a neutral, artificial language. And Esperanto is the only neutral, widely-known language which has proved itself fitted for every purpose of modern life, including Radio.

The supporters of one of the national tongues are pathetic in their belief that it will be possible to boost one of them into the proud position. English is the most widely suggested, and the idea is good from the English standpoint, but the French and Germans are too good business men to allow such a terrific commercial advantage. And it is quite in their power to stop it. Moreover, the national languages are too hard, and excepting perhaps Italian and Spanish, the vowels and pronunciation generally are not suitable for international broadcasting.

Dr. Bredow in Radio Supplement of 25th December, treats German as the Radio language, and actually commences with this phrase:

"It is quite comprehensible that every country whose sons travel round the world should prefer its own national tongue as a world language," and adds later "that which we complain of in English—that it is not fluent in intonation and rhythm—applies also to German, perhaps more so; also our sentence—construction is not systematic throughout."

Esperanto requires from five to eight months study—English and

German five to eight years, so why labour the point further in these busy times?

### PRINCIPO DE SUFICO.

La Akademio rekomendas al la Esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

(a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentantan de tiu vorto;

(b) Principo de sufico: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekofuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Hobarta Esperanta Grupo**. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

**Perŝista Grupo**, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

## *Cole's Book Arcade, Melbourne.*

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

## ESPERANTO BOOKS.

The Melbourne Esperanto Society has a stock comprising books suitable for beginners and more advanced students, and standard literary works. The following list is a selection from the stock. The Society is regularly importing supplies of new publications as they appear.

Orders may be addressed to the Hon. Librarian, Box 731F. G.P.O. Elizabeth St., Melbourne, and postage must be added to all remittances at the rate of 1d. for each shilling.

Cox's Commentary and Grammar .. . . . . .	4	6
Edinburgh Pocket Dictionary ..	2	0
Hyde's Guide .. . . . . .	2	6
Dictionary (Esp.-Eng.) Fulcher and Long .. . . . . .	7	6
First Steps .. . . . . .	1	0
Esperanta Teacher (Fryer) ..	1	6
Krestamatio (Zamenhof) .. .	4	0
Esperanto Key .. . . . . .	0	3
Esperanto (Page) .. . . . . .	2	0
Konkordance de Esperanto ..	0	9
Aladin, aŭ la mirinda lampo ..	0	9
Abaro Bruas .. . . . . .	0	9
Alegorioj de la Naturo (Gordon) .. . . . . .	1	0
Abismoj (Jean Forge) .. . . .	3	3
Al la forbuĉitaj popoloj .. . .	0	6
Āventuroj de la Kalifo (Cox) ..	0	9
Batalo de la vivo (Dickens) ..	1	3
Barbra .. . . . . .	1	3
Blond Ekbart (Fischer) .. . . .	0	9
Biblo-grafio (Esp.-Pola) .. . .	0	9
Batalo pri la domo Heikila ..	1	9
Devoj de la Homo .. . . . . .	0	9
Deklaracio .. . . . . .	2	6
Du Noveloj .. . . . . .	2	0
El la Skizlibro .. . . . . .	2	3
Elektitaj Noveloj .. . . . . .	1	9
El la Kamera Obscura .. . . . .	1	6
En Svislando (Ramo) .. . . . .	3	0
El la proksima oriento .. . . . .	2	0
Elektitaj Humoraj Rakontaj	1	0
Fundo de la mizero (Kabe) ..	1	6
Funebra Parolado .. . . . . .	0	9
Farmacio de Hemio .. . . . . .	0	9
Fatala Ŝuldo (Dalsace) .. . . .	1	6
Fabeloj (Anderson) .. . . . . .	3	0
Gejĝes kaj lia ringo (Hebbel)	2	9
Georgo Dandin .. . . . . .	2	6
Himnaro .. . . . . .	2	0
Hermano kaj Dorotee .. . . . .	1	6
Hamleto .. . . . . .	1	6
Internacia Kantaro (music and		

words) .. . . . . .	2	3
Imenlago (Storm) .. . . . . .	1	3
Interesa Novelaro .. . . . . .	0	9
International Language (Clarke) .. . . . . .	2	3
Interrompita Kanto (Kabe) ..	1	3
Kvar-voĉ Kantoj .. . . . . .	0	9
Karmen (Meyer) .. . . . . .	1	6
Kaŝitaj vortoj de Bahilah ..	1	6
Karlo (Privat) .. . . . . .	0	9
Lia lasta ŝanco (Gordon) .. . .	1	0
La Karavano (Eggleton) .. . .	2	0
La Neĝo .. . . . . .	2	9
La Fianĉigo .. . . . . .	1	6
La Reĝo Judeao .. . . . . .	2	3
La Fina Batalilo (Wilson) .. .	2	3
La Mizeruloj (Hugo) .. . . . .	3	0
La Farano (Kabe) .. . . . . .	10	6
Lastaj tagoj de Dro Zamenhof	1	0
La Kantistino (Wuster) .. . .	1	3
La Vendetta .. . . . . .	2	0
La Rabistoj .. . . . . .	1	3
La Rivozoro .. . . . . .	0	9
La Lasta .. . . . . .	0	6
Liljo (Sinnotte) .. . . . . .	3	0
Mirinda Amo (Luyken) .. . . .	3	9
Mimi (Payson) .. . . . . .	1	3
Nuntempaj Rakontoj (Krestanoff) .. . . . . .	1	6
Oni Ridas .. . . . . .	1	3
Perdita kaj retrovita (Boirac)	0	6
Patroj kaj filoj .. . . . . .	3	0
Progresado de la Pilgrimanto (Bunyan) .. . . . . .	1	9
Petro Schlemihl (Wuster) .. . .	1	6
Pri Cervantes .. . . . . .	1	0
Rakontoj el la Biblio .. . . . .	1	6
Reĝo Lear .. . . . . .	3	0
Songoj de Someromeza Nokto ..	1	6
Ŝi kliniĝas por venki .. . . . .	1	3
Serĉado por la ora ŝaflano (O'Connor) .. . . . . .	0	9
Tatterly (Wilson) .. . . . . .	1	3
Tra la Mondo—Part 1, 1/3; Part 2, 2/-		
Vivo de Zamenhof (Privat) .. .	3	6
Esperanto Star Badges, buttons, brooches, pendants, tie pins .. . . . . .	1	6

## ESTRARO DE LA AKADEMIO.

por la jaroj 1926-1927-1928

(laŭ la lastaj elektoj)

Prezidanto: Prof. Th. Cart. Vicprezidantoj: S-ro Warden kaj D-ro Dietterle. Direktoroj de la 3 Sekcioj: Prof. Grosjean-Maufin, D-ro Liffmann, D-ro Privat.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

**Redakcio-Administracio :**

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

**Abono (por dek du numeroj) :**

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

**N-ro 70 (Sixth Year)**

**Melburno (Melbourne), Australio.**

**10 aprilo 1926**

## ISOLATED ESPERANTISTS AND A. E. A.

At the annual meeting of the Victorian Branch of the A.E.A., Mr. H. Byatt, speaking to a motion providing for the establishment of a capital fund, said:—The objects of the Association include: 1, circulation of information among all classes by means of leaflets, literature, magazines, etc.; 2, broadcasting lectures and talks in Esperanto; 3, organising addresses and demonstrations in local centres; 4, promoting instruction and the use of Esperanto in schools, universities, commerce, science and literature, in every way as opportunity offers. What the Universal Esperanto Association is to the world so are the various national Esperanto associations to each individual nation. In order to provide a working fund to assist in carrying out those objects the A.E.A. permits the enrolment of individual members, in addition to group membership. This is similar to the method adopted by the British Esperanto Association. It is hoped by this to raise sufficient funds to carry on a continuous system of publicity for Esperanto. The yearly subscription is 10/- for full members and 5/- for associate members. An associate member is: a, a person who resides more than ten miles from Melbourne; b, a person who is already a member of a group affiliated

with the A.E.A. Full members receive the "Suda Kruco" (free), the official organ of the movement in Australasia.

Mr. P. Hudson was elected secretary, to whom all applications for membership should be made, c/o Box 731F, G.P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

## ESPERANTO AND THE FRANK- FORT FAIRS.

This Fair employs Esperanto for many publications and has recently obtained further proof of the success of its Esperanto propaganda. After the despatch of its last Esperanto prospectus, it received 130 newspaper cuttings in 18 languages, from 21 countries in 4 continents.

The literature of the Fair is now sent to 80 countries in various parts of the world. Esperanto occupies the fourth place among the foreign languages employed. The catalogue contains a comprehensive list of goods in Esperanto. The official organ regularly publishes articles in Esperanto.

## ORIENTO.

100-Paga revuo esperanta pri landoj de Azio. Multilustrita. Kunlaboras azianoj. Abonu ĉe I. Ŝeriŝev, G.P.O. Sydney. Redaktoro estas I. Ŝeriŝev; eldonas "Esperanta Eldona Kio. Oriento." Prezo de unu numero 2/-. Aperis numeroj 1 kaj 2.

## AŬSTRALIAJ INDIĜENOJ ĈE GROOTE EYLANDT MISIO.

Inter la multaj personoj laborantaj sub la direkto de la Eklezia Misia Societo, (Church Missionary Society), kiu nun festas ĝian centjaron en Aŭstralio, neniuj estas pli izolaj, ol tiuj viroj kaj virinoj, kiuj laboras en la misiejo de la societo en Groote Eylandt, en la Golfo de Carpentaria. Pastro H. E. Warren, ĉefestro de la misio en Nordo Aŭstralio, nun, (fino de jaro 1925), vizitas Melburnon. Li venis por helpi ĉe la ekzpozicio okazanta en Wirths Olimpia en la proksima semajno.

S-ro Warren lernis la inĝenieran profesion. Poste li studis por eniri la pastraron. Pastriginte li proponis sin por eduka, industria kaj spirita laboro inter la indiĝenoj en la nordo de Aŭstralio. Tiel laborinte dek du jaron li konvinkiĝis, ke la vera Aŭstralio indiĝeno estas lerta, inteligenta, kapabla, kaj havas povon kaj volon por lerni. En sia sovaĝa stato la indiĝeno faras multajn aferojn, kiuj postulas pripensadon kaj lertecon. Per grandega peno li konstruas kanton el granda arbo, kaj per fajro kaj akvo tiel hardas ĝin, ke ĝi ne kreviĝos. Li ornamas ĝin per komplikaj figuraĵoj kaj desegnoj kaj fieras pri ĝi, kiel fierus blanka knabo pri nova aŭtomobilo. Tamen, se blankulo deziras ĝin, li volonte fordonas ĝin al tiu interŝanĝe por kio ajn proponata, absolute fidante al la honesto de la blankulo. Liaj lancoj estas artaĵoj, faritaj laŭ malsamaj desegnoj, ĉiuj el kiuj bezonas lertecon en la farado kaj iuj ankaŭ longan praktikon. Oni neniam vidas malbone faritan lancon en la mano de indiĝeno. Uzante du ŝtonojn kiel martelon kaj amboson, li faras tre utilan poŝtranĉilon el kvarcola najlo, kaj uzas ĝin egale facile aŭ por fari lancon aŭ distranĉi helonion. Ankoraŭ restas en Aŭstralio kelkmiloj de tiuj indiĝenoj kaj S-ro Warren loĝis inter ili en Norda Teritorio kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Groote Eylandt estas unu el la malmultaj ankoraŭ ne travojaĝitaj insuloj en la mondo Holandanoj eltrovis ĝin en la dekseca jarcento kaj nomis ĝin Groote Eya. Granda insulo pro tio, ke ĝi estas la plej granda el la multaj insuloj apud la norde de Aŭstralio. Dum multaj jarcentoj Malajoj vizitadis ĝin serĉante trepangon. Tamarindaj arboj ankoraŭ kreskas, kaj oni povas vidi la restaĵojn de la kabanaroj ĉie,

kie la Malajoj fiŝkaptadis.

Pro la cirkonstanco, ke ĝi estas lokita en la granda kaj ofta ventegvizitata golfo Carpentaria, apud Arnheim's land, Groote Eylandt ankoraŭ ne estas loĝata krom de kelkcentoj da indiĝenoj kaj la homoj en la misiejo de "Church Missionary Society." Ĝi estas 700 mejlojn malproksime de Darwin, 400 de Thursday Island, (elp. torzde ajland-Insulo Jaŭdo), Norman-ton kaj Burketown. Estas kredeble, ke ĝi estas la plej izola misiloko en la mondo. Ŝipoj ne regule iras tien kaj neniam poŝtaĵoj estas liverataj. Kiuj volas ricevi aŭ sendi leterojn, tiuj devas mem aranĝi kiamaniere tiel fari. La dumasta velŝipeto apartenanta al la misiejo veturas du—tri fojojn ĉiujare al Thursday Island por poŝtaĵoj kaj provizaĵoj. S-ro Warren kaj aliaj tre esperas ke iu donacos senfadenan telegrafan ekipaĵon al la misiejo.

La insulo havas areon de preskaŭ 1000 kvadrataj mejloj. Granda parto de ĝi estas el kvarca roko. Ĝi estas tre alta en la mezo, kie unu montsupro nomata Monto Ellis sin levas 600 futojn. La tieaj montetoj estas la hejmo de multaj valabioj, (speco de malgranda kangaruo), igvanoj, histrikoj, grandaj serpentoj kaj pteropoj kaj estas la ĉasloko de la indiĝenoj en certaj sezonoj de la jaro.

Malantaŭ la marbordo estas multo de grandarba tero. Pli malantaŭe troviĝas majestaj palmoj kaj filikoj, kie en marĉoj kreskas la tiel nomataj "paperŝelaj" arboj barantaj eniron al la suno. Pecoj de bona, plugebla, tero troviĝas apud la riveretoj, kaj ĉie estas sensala akvo.

Birdoj ne estas tiel multaj, kiel oni povus supozi, ĉar antaŭ du jaroj detrua ciklono mortigis milojn el ili. De fiŝoj troviĝas neelĉerpebla provizo ambaŭ en la riveroj kaj en la maro. La indiĝenoj estas belstaturaj, fortikaj, sanaj specimenoj de veraj indiĝenoj al kiu civilizado ankoraŭ ne venis por difekti ilin.

La viroj ĉiam estas nudaj kaj preskaŭ ĉiuj havas longan pintan barbon. La virinoj portadas faldeblan platon el arboŝelo per kiu iafoje sin kovri. Malsaneco estas malofta inter ili kaj ekzistas tre malmultaj specoj de malsanoj. Vizitanto en la insulo vidas de proksimo nur la maljunulojn kaj militistojn ĉar la knaboj devas resti malproksime kaj la virinoj neniam aperas.

La leĝoj pri moraloj estas precizaj kaj severe observataj kaj mortigo estas la puno por malobeo. En iaj okazoj la akuzito havas la privilegion submeti sin al Dia juĝo, en kiu okazo la demando ĉu li estas kulpa aŭ nekulpa determiniĝis laŭ lia sukceso aŭ malsukceso eviti pikojn de lancoj jetataj al li el difinita distanco.

En tiu provo la indiĝenoj estas tute honestaj kaj malpermesas ĉian maljustaĵon. Church Missionary Society komencis labori sur la insulo antaŭ kelke da jaroj kaj nun estas tie prospera misio kiu instruas 50 geknabojn disvolvi siajn naturajn talentojn kaj legi, skribi, mastrumi, ĝardeni kaj tiel plu.

Kristanaj viroj kaj virinoj instruas al ili praktikan kristanismon. S-ro Warren diras, ke nenio malhelpas, ke multe pli el tiaj indiĝenoj el la Norda parto de Aŭstralio ricevu tian instruadon kaj en la proksima estonteco, fariĝu utilaj membroj de la Aŭstralio Komunumo.

(El la angla, tradukis Karlo Madrigalo).

## ESPERANTO AND TECHNICAL SCIENCE.

The German Union of Technical-Scientific Associations, which comprises the most important bodies in this department, is greatly interested in Esperanto and sent its administrative director to the last Universal Esperanto Congress. Its official organ "Engineering Progress" which issues editions in English and Spanish contains in each number a special column in Esperanto. The Union is endeavouring to make use of the means of intercommunication furnished by the Esperanto movement for strengthening its relations with foreign countries.—I.E.S.

## ESPERANTO AND LITERATURE.

Esperanto literature, which now comprises more than 5000 volumes, has been notably enriched by the appearance of the "Kataluna Antologio," in a luxurious edition of more than 500 pages. The object of this publication is to make known to the numerous Esperanto public in other countries the treasures of Catalan literature.—I.E.S.

## LA TIGRO KAJ LA VULPOJ.

Iam vulpo kaj lia edzino estis revenanta hejmen al sia kavo.

Ili estis ne malproksime de la hejmo, kiam ili renkontis grandan tigron. Li tigro estis tre malsata, ĉar, kvankam li ĉasis dum la tuta nokto, li nenion kaptis. Vidante la vulpojn li lekis la makzelojn kaj murmuregis kaj komencis vipsvingi la voston.

Kompatinda sinjoro Vulpo tiel konsterniĝis, ke li preskaŭ perdis la prudenton kaj nenion povis fari. Sinjorino Vulpo ankaŭ estis terure timigita, sed ŝi pripensis pri la kvin vupidoj en la kavo, kaj, pro ili, ŝi ne volis esti formangita se ŝi nur povus eviti tion.

—Sinjoro—ŝi diris al la tigro—mi ĝojas vidi vin. Mia edzo kaj mi havis disputon, kaj vi, kiu estas tre saĝa kaj sperta, nepre povos decidi tion por ni. Tre plaĉis al la stulta tigro aŭdi sin tiel laŭdata. Kun dolĉa rideto li respondis.—Eble mi povos. Pri kio sinjoro Vulpo kaj vi malkonsentis?—Sinjoro Vulpo kaj mi decidis, ke ni ne plu povos vivi kune—sinjorino vulpo respondis.—Tio estas facile aranĝita, sed ni ne povas interkonsenti, kiamaniere dividi la infanojn.

—Kiom da infanoj vi havas?—la tigro demandis.

—Kvin, via moŝto—fiere respondis sinjorino Vulpo.—Kvin tiel belkreskajn infanojn, kiel vi povus deziri vidi.

La tigro ĝojegis. Li havos ne nur sinjoro kaj sinjorino Vulpo, sed ankaŭ, se li estus lerta, la kvin vulpidojn por sia matenmanĝo.

—Kaj kiel vi proponas dividi ilin? li demandis.

—Jen la demando mem, pri kiu la edzo kaj mi ne povas interkonsenti—diris sinjorino Vulpo.—Li insiste volas preni tri el ili, lasonte al mi nur du, sed ili estas tiaj karuloj, ke mi ne povas senigi min de tiom. Mi estas la patrino; mi opinias, ke mi devas havi tri. Kiel ŝajnas al vi?

—Tio ja estas malfacila demando—la tigro diris konsente.—Estas bedaŭro, ke ne troviĝas aŭ kvar aŭ ses; tiuokaze ili povas esti tre facile dividitaj. Tamen, se mi povus vidi ilin, eble mi pli facile povus juĝi.

Ekiris do sinjoro kaj sinjorino Vulpo kaj la nobela tigro, kiu apenaŭ povis kaŝi rideton, kiu ludis ĉirkaŭ

lia buŝo. Sinjoro Vulpo jam nun rekolektis siajn pensojn, kaj li diris argumente:—Ili ne povas vivi sen la patro. Mi provizas ilin per la nutrado. Mi estas certa, ke vi difinos tri al mi.

Ili baldaŭ alvenis la vulpan nestegon. Ĝi estis kaveto en la rokoj. La enirejo estis malgranda, sed la nestego estis seka kaj varma kaj mola kaj komforta, ĝuste tia hejmo, kian vulpoj amas.

—Kaj nun, sinjoro Vulpo,— ordonis al li la edzino —eniru kaj elkonduku la infanojn. Sen perdo de tempo sinjoro Vulpo malaperis tra la enirejo.

—Vi devas vesti ilin tre zorge— sinjorino Vulpo postkriis al sia edzo. —Neniel povus esti, ke ni prezentu ilin, krom en sia plej bona vestaĵo, al iu tiel distingita, kiel lia moŝto.

Dum longa tempo sinjorino Vulpo kaj la tigro atendis. La tigro fariĝis senpacienca. —Ĉu li neniam venos!— Li grumblis.

—Paciencon: via moŝto. Sendube la edzo estas ĝenata kun la infanoj; li ne estas tiel sperta pri la vestado, kiel mi. Sed ankoraŭ ne venis sinjoro Vulpo. La tigro fariĝis ĉiam pli kaj pli senpacienca; fakte li ekkoleriĝis.

—Kio povas deteni lin!— ekkriis sinjorino Vulpo. —Mi eniros por helpi lin. Mi tre deziras, ke vi vidu la infanojn, ĉar mi estas certa, ke via decido estos favora al mi.

Kaj sinjorino Vulpo komencis malrapide sin enŝovi dorsdirekte tra la mallarĝa enirejo. —Kiel vi eniras dorsdirekte? demandis la mirigita tigro.

—Ĉu mi estas tiel malklera— ekkriis sinjorino Vulpo —ke mi malhonorus min? Ĉu ne estas konvene ne forturni la vizaĝon antaŭ sinjoro tiel granda, kiel vi?

Fine ŝi estis ekster danĝero en la kaveto. —Mi tre dankas al vi pro via vizito,— sinjorino Vulpo tiam diris dolĉe, —sed mia edzo kaj mi jam nun decidiĝis, ke ni ne disiĝos; tial ni ne devos dividi la infanojn malgraŭ ĉio. Tamen estis tre afable viaparte, fari tiun komplezon. Kion kolera tigro povis fari?

Li ne povis enrampi en la kavon post ili. Kaj tiun tagon, escepte se li pli bone sukcesis aliloke, li devis dormi malsata.

El la angla tradukis; S. Trewin.

## KRONIKO.

—  
SYDNEY. — Semajna gazeto "Humour" represas multajn ŝercojn el la nova germana ĵurnalo "Ridanta Esperantisto."

Granda magazeno, Farmer & Co. Ltd., reklamas la esperantajn gramofondiskojn en tagĵurnaloj.

Kvar klasoj ricevas regulan instruadon ĉe la "Sydney Esperanto Society," post kiu la sekvantaj eroj estis donitaj dum la monato:—

Marto 4—"Lingvaj kuriozaĵoj" sur nigra tabulo, de S'ro A. Auwart.

Marto 11—Parolado pri la ĵus okazintaj teruraj Viktoriaj arbarbrulegoj, de F'ino. K. Anderson.

Marto 18—"Nacioj de l'mondo," parolado de S'ro D. Healy.

Marto 25—Socia vespero, kiun ĉeestis multaj membroj de la "Workers' Educational Association" (Laborista Eduka Asocio). Krom kantoj, deklamadoj kaj malgranda teatraĵo, la societa sekretario donis specialan elmontradon de kelkaj "Linguapnono fonografdiskoj. Ĉu pro malbona enpakado aŭ difekta presado de la diskoj, la surfaca bruado dum ludado de "Elparolado" kaj "Stilo" preskaŭ superis la voĉon de D'ro Privat. La aliaj ("Zamenhof pri Homaro" kaj "Poezio" ambaŭ duflanke) estis pli bonaj, kvankam la nadla gratado estas pli granda, ol en ordinaraĵoj usonaj aŭ anglaj diskoj. Pri la parolanto kaj la temoj oni nur povas paroli en entuziasmegaj frazoj kaj tiu faras la alian malagrabraĵon des pli ĉagreniga. Eksportantoj devas memori, ke tiuj diskoj devas trapasi la tropikojn kaj malbona enpakado povas kaŭzi ruiniĝon. Eble la supraj diskoj suferis dumvojaĝe, ĉar la fonografaparato estis perfekta.

Ni estis petataj represi la unuan paragrafon aperinta en lastmonata kroniko, kiu estis bedaŭrinde fuŝita de nia neesperantista presisto:—

"Radio," el sama eldonejo kiel "Wireless Weekly," montras similan intereson en Esperanto, kiel ĝia fratina ĵurnalo. Ofte oni legas "Esperantajn Notojn" pritraktantaj la progreson de nia lingvo inter radianoj, kaj laŭ sciigo de la redaktoro, konstanta fako en ĉiu numero baldaŭ fariĝos.

MELBURNO, V. — Dum la pasintaj semajnoj la programo de la Melburna Esperanto Societo, enhavis kelkajn tre interesajn erojn. Sino.

Bigelow donis bonan lecionon pri la anglaj idiomoj, kaj la traduko de ili, Esperanten, donis okazon montri ĉies kapablecon. Sro. P. Hudson denove interesigis la anojn pri siaj vojaĝadoj, kaj klare rakontis pri parto de siaj spertoj en Suda Ameriko. Li vizitis multajn el la ĉefaj urbegoj, kaj parolis pri iliaj mirindaĵoj, la grandaj riveroj, la havenoj, kaj la moroj de la popolo.

## AS BAD AS THIS?

—  
A man took home a booklet on Esperanto and, during a meal, a guest regaled the party with extracts pronounced according to the instructions supplied.

At last there came a strange-sounding word, evidently pronounced with great difficulty.

"Is that really Esperanto?" asked the host, innocently.

"No," was the reply, "a fishbone."

## ESPERANTAJ GRAMOFONDISKOJ. "LINGUAPHONE"

### 1. SERIO LITERATURA KAJ ORATORA.

Kvin diskaj du-flankaj kun enhavo el la  
PAROLADOJ, PROZO, KAJ POEZIO

de

D-ro L. L. ZAMENHOF kaj  
D-ro EDMOND PRIVAT.

Kun ĉiu diskaro estas sendata foliaro kun la presita teksto de la paroladoj, poemoj k.t.p.

### 2. SERIO INSTRUA.

Dek kvin du-flankaj diskaj. Prezentas kompletan kurson de Esperanto en tridek lecionoj. Ĉiu leciono konsistas el serio de praktikaj frazoj pri iu afero de la ĉiutaga vivo kaj specimena interparolo pri la sama temo. Belega lernolibro akompanas ĉiun diskaron. En ĝi troviĝas apud la teksto de la lecionoj, tridek bildoj kun respondeca enhavo kaj seslingva vortaro. La lernolibro estas aparte havebla, kiel ankaŭ pli grandaj bildoj por uzado ĉe kursoj.

---

Ĉiuj Esperantaj diskaj parolitaj de D-ro Edmond Privat. Tiu fakto garantias la purecon de la elparolo.

---

Similaj kursoj estas preparitaj en la lingvoj  
ANGLA, FRANCA, GERMANA, HISPANA, ITALA,  
AFRIKHOLANDA.

Pri prezoj kaj pagokondiĉoj sin turni  
al la

Tutmonda Disvenda Agentejo

**THE ESPERANTO INSTITUTE LIMITED,**  
**WELWYN GARDEN CITY, HERTS, ANGLUJO.**

Kun ĉiu diskaro estas sendata foliaro kun la presita teksto de la

## HAROLD PUDNEY

## Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE**

## A.E.A. ANNUAL MEETING.

The annual meeting of the Victorian section of the A.E.A. took place at the club-room of the Melbourne Esperanto Society (Public Benefit Bootery Building, 5th floor, 323-325 Bourke St.) on the 5th March. Mr. H. Byatt occupied the chair. It was decided that the branch support the proposals of the Hobart Branch re the next Australasian Esperanto Congress, which is to take place at Hobart during Easter week of 1927.

It was suggested that a Congress Secretary be appointed in each State to collect the Congress fee of 2/6 and keep in touch with the Congress Secretary at Hobart. Mrs. E. S. Bigelow was appointed secretary for Victoria, and asks all Victorian Esperantists to send their congress fees either through their Club Secretary, or direct to her, as early as possible.

Mr. R. Rawson reported that he had not received a receipt for affiliation fees sent to K. R., although he had three times written for same.

Mr. H. Byatt read a detailed proposal re the linking up of all isolated Esperantists with the A.E.A. Mr. P. Hudson moved, and Miss V. Cox seconded: That proposal submitted be accepted, and that Mr. Byatt be authorised to send a circular letter to all known isolated Esperantists. Particulars of this proposal are to be found elsewhere in this edition.

Mr. Rawson having intimated that he did not desire to continue as Secretary, Mr. Hudson consented to accept the position. Mr. H. Byatt was elected President of the Victorian Branch.

## RADIO.

On March 6th, 3LO transmitted a talk on Esperanto Literature by Mr. R. Rawson, who was supported by Miss Shirley Dumbrell. Mr. Rawson gave a most interesting address and ably described the rise of Esperanto literature from its birth to the present time. Shirley Dumbrell, who is 12 years of age, gave an admirable rendering of "Excelsior," as well as some lines by Schiller. 3LO merits complimentary notice for their enterprise in broadcasting esperanto items which undoubtedly give pleasure to thousands of Esperantists and students throughout Australia.

FORJETU "JAPAN" ON ALVOKO  
AL LA TUTMONDAJ  
ESPERANTISTOJ.

Per ĉisupra titolo mi antaŭ ĉio devas atentigi al la legantaro, ke mi ne deziras, ke oni forjetu "Japano" on, sed "Japan" on, t.e. uzu la veran nomon "Nippon" por nia lando anstataŭ "Japan" la falsa.

Koncerne tion mi jam prezentis proponon al Esperantista Akademio petante, ke ĝi prozorgu oficialigi la nomon "Nippon," ĉar tiu rimedo estos plej efika por konvinki la tutan mondon.

La kaŭzo estas jene:—

Malgraŭ la nomo "Japan" aŭ la simila fariĝas nun preskaŭ internacia, tia elparolado neniam ekzistis en nia historio.

Nia lando estis por la unua fojo konigita al la okcidentuloj, diras historio, pere de Marco Polo en la 13a jarcento sub la nomo "Zipangu."

Ĝi estas, mi opinias, la tiama (hina elparolado iel difektita, kiun oni nun elparolas Pekin—maniere "Jih-pen-kuo" (etimologie la lando, de kie venas la suno).

La nomo "Japan" do devas esti deveninta de tiu "Zipangu" duoble difektite; ni tamen vole-ne-vole elparolas tiel, nur por ke la fremduloj povu kompreni, sed neniam hejme.

Ekzistis en fakto kelkaj historiaj nomoj propraj al nia lando, kiujn ni ankoraŭ nun uzas nur beletristike, sed la nomo "Nippon" estas tiu oficialigita de nia registro en la jaro 670a p.k., kaj de tiam ni uzadas ambaŭ politike kaj geografie.

Unuvorte la nomo "Japan" estas al ni stranga, nekonvena, eĉ sonante kvazaŭ ĵargono, kiun anstataŭigi per la vera nomo ni pretendas kiel la natura inkliro de la homo.

Kiel ajn oni nomu landon de ekstere, tion neniu rajtas riproĉi kiel "sintrudema en la internan vivon" aŭ "elpuŝo de la ekzistanta lingvo nacia," sed ĉu ne estas prudente kaj en ia senco konforme al la bulonja deklacio, se oni preferas la nomon, kiun solan la popolo koncernanta uzadas jam de kelkaj centjaroj kiel sian propran, ol tiun, kies deveno estas dubinda?

K. Takahaŝ, Del. U.E.A.

18/1/1926.

Mizuoĉi, 1-28, Ŝizuoka, Nipponujo.

### TELEPHONE CUSTOMS FOR TRAVELLING ESPERANTISTS.

Telephone usage varies greatly, depending upon local customs and conditions. From several sources has been gathered the following information which may prove useful to travellers.

In Abyssinia no one is allowed to use the telephone directly. All messages must be written out and given to the operator, who shouts them into the transmitter at the top of his voice, to the edification of all within hearing.

In Japan, most of the operators, or Moshi-moshi, as they are called, are young girls, the average age being 14. Telephones with low numbers get the more experienced girls and better service than those with high numbers. Rights to telephone numbers, especially low ones, are frequently purchased by those desiring service and unwilling to wait perhaps years for the Government to furnish service.

In Turkey, the work is done by Greeks, Armenians, Jewesses and other races. As there are three Sabbaths observed in each week by Mohammedan, Jew and Christian respectively, there is little telephone traffic on Fridays, Saturdays or Sundays.

In India, most of the women operators are Eurasians, or mixed European and native stock, though many operators are men.

In England, an operator is called a "Telephonist."

In Russia, it is a penal offence to call them anything but "Comrade" or "Citizeness."

In Japan, on answering a call, the operator says, "Moshi-moshi," which is the equivalent of "Hello."

In England, "Are you there?"

In France, "I'm listening."

In Germany, "Here's the exchange."

In Norway, "Central" or "Yes."

In Sweden, the operator simply gives her number, as "40."

In Belgium, on completing the call, the operator says, "Talk."

In Sweden, "Please begin."

In Norway, "Clear."

In England, the "Telephonist" says "You're through," meaning you are connected "through" to your "party" and may begin to talk. An American thus addressed replied "Why I haven't begun yet."

—el Amerika Esperantisto.

### 18th UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS.

Edinburgh, 31 July to 7 August.

Bulletin No. 2-a dated 30th January 1926, informs us that the congress following the procedure of last year at Geneva is to take the form of a Summer University, during which the following well known speakers will be heard:—**Folklore and Folk-song**, France: Pro. Th. Cart; Germany: Paul Bennemann; Poland: S. Grenkamp-Kornfeld; Romania: Andreo Ce; and Dr. Immanuel Olsvanger. **Linguistics**: Pro. W. E. Collinson, Liverpool (Esperanto as a way to the Language Science). **Medicine**: Pro. Odo Bujwid, Jagelona University, Krakow, (Mankind and Microbes); Dr. Pascal Deuel, Leipzig (1 Modern successes in the medical treatment of consumption); 2 Human longevity). **Science**: Dr. E. E. Fournier D'Albe, theme to be announced later. Rinaldo Orenco, previously of the Astronomical Observatory of Florence (The Sun)—two speeches. Dr. Alfredo Strosoli, Pisa, (Electro-metallurgy in Italy). **International Labour Office** of the League of Nations: C. C. Tarelli, official delegate to the Congress will make two speeches (1 Constitution and aims); (2 Labour and Results).

The Duke of Connaught has kindly consented to be Patron to the Congress, and among other notable people are the Mayor of Edinburgh, and other towns, famous Educationists, Members of Parliament, etc.

Up to the 30th January, 176 members had sent in their Congress Fee. We are otherwise informed that Australasia will be represented (Red).

### GRAVA, GRAVEGA!!!

La "Laborista Esperanto-Grupo" de Genova (Italio), nepovante respondi al ĉiu persono kiu petis senpage la libreton "Devoj de la Homo" de l'granda itala pensemulo Giuseppe Mazzini, por ŝpari monon ĉi—tie respondas al ĉiuj ke; oni ne povas daŭrigi la senpagan dissendadon de la verketo pro la gravaj poŝtelspezoj, ĉar la monsumo malavare donacita por la eldono kaj dissendado de la 10,000 ekzempleroj pro la kreskanta, neantaŭvidita altigo de la poŝtafranko, precipe eksterlandan, elĉerpigis jam dum la ĝis nuna dissendado de la verketo.

La sumo ricevita je monoferoj ĝis la 31-12-1925 estas je liroj 6112 kaj la elspezo (nur por la "Devoj de la Homo") ĝis la sama dato pro la 10,000 ekzemplera eldono kaj pro la jam disdonitaj 7600 ekz; estas je liroj 1973. Do oni povas konstati ke la "Laborista Esperanto-Grupo" pro tiu disdonados havas malprofiton je 1860 liroj.

Pro tio la "L.E.G." por ekvilibrigi sian bilancon dissendos la restantajn 2400 ekz: nur al tiuj personoj aŭ Esp. Societoj kiuj ilin petante sendos po almenau lirojn 1,50 je monofero.

Tiu kiu deziras ricevi la libreton ne atendu elĉerpigon kaj sendu tiuj monoferojn al S-ro Managlia Ettore (Laborista Esperanto-Grupo) en Casella Postale 922 Genova (Italio).

### GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnaloj laŭ tiu ĉi adreso—"La Suda Krucio," Box 731f, P. O. Elizabeth St., Melbourne, Australia:—Amerika Esperantisto, 3, 4; Amikeco, 1; Abeider Esperantisten, 1; British Esperantist, 250; Bulgara Esperantisto, 3, 4, 5; Belga Esperantisto, 10-11, 12, 1, 2; Bulteno Antverpena, 12; Esperanto (Romana), 305, 306; Esperantista Gejunalaro, 1, 2, 3; Herald de Esperanto, 99 ĝis 11-12; Hungara Esperantisto, 1, 2; Itala Esperanta Revuo, 1; International Language, 12, 1; Internacia Medicina Revuo, nova serio 1; Internacia Esperanto-Servo, 1; La Verda Lumo, 1; La Nova Tago, 4; La Suno Hispana, 103, 104; Le Monde Esperantiste, 6; Litova Stelo, 1-2; La Ridanta Esperantisto, 4; Libera Laboristo, 3; La Revuo Orienta, 11, 12; La Socialisto, 1; La Progreso, 10, 1; Munkas kultura, jan; Novaj Tempo, 8-9, 10, 11-12; Nova Sento, 1; Oomoto Internacia, 1, 2; Portugal-Esperanto, 1;

Revista del Ateneo, 17, 18; Vegetarismo, 19, 20, 23.

### NEKROLOGO.

S'ro George Winter, ano de la "Sydney Esperanto Society" kaj direktoro de l'Esplorada Oficejo de la Ŝtata Laborista Konsilantaro, mortis post longa malsano la 7a. marto, je aĝo de 39 jaroj. Li venis el Nov-Zelando, sed laŭ nia kono estis senparenca. La societo perdis influan membron.

**Melburna Esperanto-Societo**, Presidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobarta Esperanta Grupo**. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

**Persista Grupo**, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: f-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

**"Nigra Cigno"-Grupo**. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino f-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

**Redakcio-Administracio :**

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

**Abono (por dek du numeroj) :**

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 71 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 majo 1926

## ESPERANTO AND WIRELESS.

The progress in the wireless world is uninterrupted. Almost all the important broadcasting stations in Europe and many in Amerika, Asia and Australia, hold courses in Esperanto or broadcast in that language. Some of them have weekly programmes entirely in Esperanto for the benefit of foreign listeners.

Statistics show, from 1 January 1923 to 1 April 1925, 118 lectures (68 on Esperanto and 50 in Esperanto) and 20 lessons were broadcast from 50 stations in 19 countries in 3 continents. Since then the number has considerably increased. The Tokio station now takes part in the dissemination of Esperanto by wireless.

—I.E.S.

## ESPERANTO IN THE RAILWAY SERVICE.

The General Directorate of the Swiss Federal Railways, by a Service Order of 10 November 1925, informed its administrative services that it was prepared to give to persons attending Esperanto courses the same facilities as for the study of other foreign languages.

The General Directorate of the Austrian Federal Railways, by Service Order (7.XI.1925 No. 52, Act. 3407) recommended the study of Esperanto. It also, by way of exception, allows railwaymen speaking Es-

peranto to wear the Esperanto star while on service.

—I.E.S.

## ESPERANTO IN 100 COUNTRIES.

Esperanto is now disseminated in 100 countries. The Universal Esperanto Association (Universala Esperanto Asocio) in Geneva, whose object is the practical application of the international auxiliary language, has members at the present time in 82 different countries.

19 international reviews and 40 national journals form a permanent link between Esperantists throughout the world.

At the beginning of January 1926 the first South American Esperanto Congress was held in Montevideo and was attended by 200 persons.

For a year past special organs have appeared in India (in English and Hindi) in Java (in Dutch, English and Malay) and in Palestine (in Hebrew).

## ESPERANTO AND THE FAIRS.

The Leipzig Fair has just published a 15-page illustrated prospectus in Esperanto. During the Fair a special meeting of business men from various countries was held, the proceedings of which were conducted in Esperanto.

The 10th Vienna (Austria) Fair is announced by a printed poster, which has just appeared in Esperanto.

I.E.S.

## PRI "ORIENTO."

Estas bedaŭrinde scii, ke pro politika kialo la 100-paĝa gazeto "Oriento" ne plu presiĝos ĉe Harbino, kie ĝis nun laborema areto kompilis ĝin, la plej grandformatan Esperantan gazeton presita de kiam la "Revuo" de Bourlet devis ĉesigi. La trian numeron oni forte penas presigi aliloke ol en Manĝurio, sed ĝis nun ne sukcesis. Espereble, kiam ĉi tio estos legata la afero bone estos solvita kaj la tria enmaniĝita ĉe ni. La duan ĵus traleginta mi notas la jenan.

Kun la escepto de certaj elhinaĵaj rakontoj, kiun mi ne povas kredi tipaj, kaj bonaj spekulantoj de la Ĥina literaturo, la enhavo estas, laŭ mia opinio, presinda, vidate larĝe, kvankam eble ne tro alloga por la meza homo. Kiu ne ŝatas ensorbiĝi je pedagogio, AINU'a vivado, stato de Koreaj virinoj k.t.p. Ankaŭ la lingvaĵo ne estas tute plaĉa. Formoj kontraŭ konsilitaj de Zamenhof estas libere uzataj—"lernantoj la lingvon" k.c. La stilo estas kelkloke iom peza, ne havante la frazan belformecon kaj unuavidan kompreneblecon, kiu karakterizas la verkadon de, ni diru, Luyken aŭ Forge. Tia pezeco ŝajne estas oftaĵo ĉe Orientanoj, tamen estas nur supraĵa nebonaĵo, facile forigebla per pliproksima kunesto kun alilandoj kaj pli profunda legado de la Okcidenta literaturo.

Iom mi inklinas kredi s-ron Serišev prava en lia sinteno rilate la proponon malpliigi la gazetaron. Se oni aĉetas milon da ekzempleroj de ĉiu numero de "Oriento"—kaj estas kred-eble ke oni tion faris ĝis nun—granda bono jam okazis por nia movado. Tiaj aĉetantoj tre verŝajne ne abonas Eŭropan gazeton.

Pri la enhavo. Estas iom longa kompilaĵo de fama Rusa Orientalisto pri la fruega Ĥina historio, kompreneble malaktuala, kaj pro tio ne interesa ĉe multaj, kaj valoraĵoj precipe por la specialistoj. La legantaro pli ŝatos rakonton de malliberigo, malkaŝante la degradecon de la Ĥina punsistemo kaj la kruelecon kaj subvendemon de la figvardistoj, en tiu vivmortejoj. Skizo de Komerca Vivo en nuntempa Ĥinujo havas pli da nuntempeco, Antaŭmensigante bildon ridetindan de la superstiĉemo de la negocistaro Ĥina.

La AINU'a skribaĵo estas valora pro tio, ke ĝi estas la unua verkaĵo de AINU'a mem. "Fundamento de Jap-

ana Eduksistemo" de la plumo de s-ro Serišev, estas interesa klarigo de la spirito de Buŝido, aŭ Japana kavaliereco. Kvin verketoj pri Formosa, plejparte akompanantaj de bildoj, pritraktas tiun insulon, kies sovaĝajn loĝantoj dum longa tempo iom post iom malvenkiĝas sub la Japana pre-mado. Ankaŭ troviĝas en tiu sekcio, rakonton, "Mia pasinta vivo," verkita de juna Formosano, kiu emas enmondigi sian junularan travivaĵaron.

"El la Silenta Oceano" temas la moralecon de la loĝantaro sur tiuj insuloj troviĝantaj en la Pacifiko, kaj certe interesos la misiistaron. Longa artikolo pri malmulte konata temo estas "Lamaismo: Medicino kaj Doktrino." La lukto inter la superstiĉo de la Mongoloj kaj la Eŭropa medicinarto estas prituŝita, kaj la verko estos ĝue legata de tiuj havantaj antaŭe inklinon al tia legadmateriale. Kvar-kvin skribaĵoj en la Korea sekcio rilatas al la stato kompatinda de la Korea virino, eduko en tiu korego de Azio, tiea Japana agado, kaj estas dutri fabeloj, pli-malpli presindaj.

Estas notinde, ke "Oriento" enhavas liston da Rusaj verkoj pri Ĥinujo, kaj informas, ke kiu ajn ero estos tradukita Esperanten laŭmende, se interesato volas. La temaro estas certe posedinda por ĉiu Orientulo.

Finfine, ĉiu bonvolanto je nia afero, ĉiu vera deziranto, ke nia kara lingvo estu aŭdata ĉiufere, subtenu perabone, se tio estas ebla, la ageman batalanton, Pastro Serišev, en sia kuraĝa entrepreno, kaj laŭeble ĝustigu se necese la enhavon per konsilo kaj kritiko.

ROBO.

## ESPERANTO AND THE POLICE.

It is common knowledge that in Barcelona, Berlin, Breslau, Budapest, Chemnitz, Dresden, Leipzig, Lisbon, Madrid, Montevideo, Prague, Rio de Janeiro and Vienna, there are police officers who speak Esperanto and wear a special badge on their uniforms distinguishing them as Esperanto interpreters. The Prussian Ministry of the Interior has instituted an enquiry (12.12.25-II M 2935/II) relating to police officers speaking foreign languages or Esperanto, with a view to distinguishing them in the same manner.

—I.E.S.

## KRONIKO.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO. — Por helpi financi la Sesan Aŭstralazian Esperanto-Kongreso kio okazos ĉe Hobart, Tasmanujo; dum paskotempo 1927, s-ro W. H. King (Postal division, Secretary's Office, G.P.O. Wellington) nun laboras. Leteroj petantaj monhelpon estos dissenditaj frue. Nov-Zelandanoj kiuj volas donaci al la Kongresa konto estas petataj sendi pere de s-ro King.

S-ro W. H. King el Wellington, kies nomo estis ligita al Esperanto dum ok jaroj veturis tra la norda parto de Nov-Zelando antaŭ du-tri semajnoj. Estas notinde ke ĉie li iris oni postulis informon pri Esperanto; ĉe Whangarei, post persona intervuo kun la redaktoro de la loka tagĵurnalo invito estis ricevita por verki artikolon pri Esperanto. La artikolo estis presita laŭ vorte. Ĉie oni montris intereson kaj deziris klarigojn kaj informon pri la mondlingvo. Ĉe Auckland, S-ro King vizitis la klubon ĉe Remuero kaj trovis ke la dudek kvin membroj progresas bone kaj kun granda entuziasmo. Amikaro de verdstelanoj lin adiaŭis ĉe la stacio. Ĉe Auckland, Esperanto estas parolata flue kaj libere. S-ro King reportas ke publika opinio multe favoras al Esperanto, ankaŭ ke lia foriro el Auckland rememorigis lin pri la foriro post la Kvina Kongreso ĉe Melbourne.

AUCKLAND NOV-ZELANDO. — La 21 marton okazis alia Esperantista pikniko, kio estis granda sukceso. Membroj el la Remuera Klubo veturis al Brown's Bay, marbordo de la Auckland haveno. S-ro J. S. Russell, malnova samideano, paroladis mal-longe; li ankaŭ donis legadon titolita "Monda paco kaj monda parolo." La geanoj de la Remuera Esperanta Klubo ankoraŭ kunvenas ĉiu lunde ĉe, 5 Aldred Rd.; bona progreso estas farata de la pli ol dudeko da membroj. Klaso fondita sub aŭspicoj de la Laboristara Eduka Asocio kaj gvidata de s-ro J. S. Russell, komencis dum 16 aprilo. La klasejo estas, Old German School, Symonds Str. kaj la klaso kunvenas ĉiu lunde je la 7.30 vespere. Ĉi tieaj samideanoj intencas frue atentigi la Edukan Departenton pri la utileco de Esperanto, samtempe petante pri la enkonduko de Esperanto en la Nov-Zelandajn lernejojn. La redaktoro de la tagĵurnalo "Auckland Star" esprimis sin tre volanta presigi novaĵon pri Esperan-

FIELDING, NOV-ZELANDO. — Dum lasta jaro s-ro R. Ross gvidis klason, fine fondis Esperantan Klubon. La meza ĉeesto estas dudek. Ĉe tiuj kunvenoj oni parolas sole Esperante. Ifoje interesaj temoj estas debatataj. Tiu ĉi jaro la klaso ree komencis kun ĉirkaŭ dudek lernantoj. S-ro Ross paroladis al la anoj de la Feilding Komerca Ĉambro. La urbestro prezidis kaj post la parolado, parolis favore pri Esperanto.

MANGAHAO-HYDRO, NOV-ZELANDO. — Aranĝoj estas farataj kun la estroj de la Y.M.C.A. por fondi novan klason. La du entuziasmuloj, McGuigan fratoj, kiuj kondukas la aferon, esperas komenci la instruon je frua dato; ili faras ĉion eblan por sukcesigi la aferon.

MELBURNO, V. — Dum la pasintaj semajnoj, la anoj de la Melburna Esperanto Societo estis tre bonŝancaj, pro tio ke, en la programo por la monato okazis du tre interesaj vojaĝakontoj. S-ro Darwin donis tre lertan kaj detalplenan paroladon pri siaj spertoj en la Norda insulo de Novzelando, kie li pasigis feliĉan libertempon. — S-ro Hudson daŭrigis sian rakonton pri Suda Ameriko, kaj portis la anojn, spirite, ĝis la malproksima kaj kurioza urbo, Asuncion, en Paragvajo, kaj priskribis pri la vidindaĵoj tie, kaj dum la surŝipa veturo sur la grandaj riveroj Rio de la Plata, Parana, kaj Paragvajo.

Je la deksepa de aprilo oni aranĝis ekskurson al la zoologia ĝardeno. Ĝi donis bonan okazon pligrandigi ĉies vortaron, kaj la posttagmezo pasis tre feliĉe, por ĉiu.

SYDNEY. — Elstarantaj okazintaĵoj dum pasinta monato estis:—1e. Reveno de nia mondkongresano, S'ro A. Feldmayr; 2e. Elekto de S'ro F. T. Simon ĉi-tiea sekretario por proponata Aŭstralazia kongreso en Hobart, Tasmanujo, dum Pasko 1927; 3e. Vizitoj de aliŝtataj samideanoj—S'ro W. C. Coghlan, el Townsville, Kvinslando, kaj S'ino Dixon, el Melbourne, Viktorio; kaj 4e. eksterordinare interesaj paroladoj de S'roj V. Rutland kaj I. Serišev. Jen la detaloj:—

Reveninte de al lasta Universala Kongreso en Genevo, S'ro Feldmayr atingis Sydney—on la 15a Aprilo per poŝtŝipo "Orama" kaj samvespere vizitis la klubejon por transdoni salutojn el Eŭropo. En senĝena 10 minuta parolado li donis impresojn de

Aŭstraliano inter ĉiunacianoj, menciante, inter alie, kelkajn kutimajn demandojn: "Kiel longe vi vojaĝis?" "Kiom da indigenoj (nigruloj) estas en via lando?" "Ĉu vi konas la bonegulojn S'roj Hudson, Drummond, Rawson kaj Pyke, kiuj partoprenis antaŭajn kongresojn?" k.t.p. Por ne okupi tro multe da tempo, S'ro Feldmayr prokrastis lian plenan raportan ĝis dato elektota dum majo, kaj la laŭprograma parolado sekvis.

Post legado de letero de Hobarta Esperanta Grupo pri okazonta sesa Aŭstralazia kongreso oni decidis nomi S'ron F. T. Simon kiel sekretario por Nov-Sud-Kimrujo, kies devo estos doni informon al individuoj kaj la ĵurnalaro, kolekti kotizaĵojn, kaj aranĝi karavanon.

Vizitantoj suprennomitaj estis bonvenigitaj de la intertempa prezidanto, S'ro A. Apwart, kaj interparoladoj pri la agado por nia lingvo estis interŝanĝitaj.

Enkondukante sian paroladon je la 15a aprilo, S'ro Victor Rutland klarigis, ke la anoncita temo, "Suben," nur estis elektita por ĝentiligi la veran enhavon kiu estas "La Infero." Skizante la konatajn opiniojn pri la infero kiel punloko priskribita en libroj de John Milton, Alighieri Dante, kaj John Bunyan, li donis la kredojn de l'malnovaj grekoj kaj romanoj, poste montrante la diferencon inter malnovaj egiptoj kaj nordlandanoj, kiuj respektive konsideris ĝin varmega kaj malvarmega loko. Eĉ pri la loko mem oni estas duba, diversaj rasoj aŭ kredante ĝin sub la tero, aŭ sur la suno, aŭ eĉ sur la luno. — La temo tiel intersigis la aŭdantaron, ke longa diskuto sekvis, kiun partoprenis pastro, teozofisto kaj nekredanto. Tre ĝuinda vespero.

S'ro Inocento Serišev instruis la membrojn la 22a aprilo per bonega parolado titolitan "Ideala kaj praktika flanko de Esperanto." Esperantismo, li diris, konsistas el materialistoj kaj idealistoj, ĉiuj konfese klopodante por unu celo, sed kun sperto en dekkvin landoj li rimarkis, ke la plejmulto tro multe propagandas kaj ne sufiĉe laboradas. Ni devas zorgi por metoda propaganda, sekvante unu paŝon per logika kontinuo. Centoj aliĝas al nia movado, sed pro malbona organizado kelkaj centoj foriras. Personoj aliĝas pro propraj motivoj—komercistoj, scienculoj kaj aliaj—por trovi kion nuntempe? Nur tro ofte malgrandiganta intereso post

kelkaj renkontoj. Ŝanĝu tion kaj laboru laŭ sistemo, profitante la movadon per videblaj, praktikaj rezultoj! — Laŭ lia opinio ĉiu lando devus havi propran nacian ĵurnalon en kiu ĉiu temo interesigante la reston de la mondo estu publikigata: geografio, historio, industrio, edukado, k.t.p. tiamaniere kreante intereson en tiu lando. Aŭstralio havas tiel riĉan materialon kaj tiel grandajn eblecojn, ke ampleksa, ilustrita, esperantlingva revuo, sub zorga administrado, devus sukcesi. Kiel ekzemplo, kion oni povas fari kon preskaŭ nenia mono flanke de Esperantistoj, nur utilante kapitalon de negocistoj, S'ro Serišev citis lian revuon "Oriente"; detale li klarigis la fondiĝon, komencajn malfacilaĵojn kaj tuja sukceso, kies daŭrigo estis bedaŭrinde interrompita nur pro tieaj leĝaj konsideraĵoj. Konkludante la paroladon konsilis la Esperantistojn unuigi siajn fortojn por praktike montri la utilecon de nia lingvo; serioza homo bezonas materialon, ne paroladoj, kunvenoj kaj memadmiroj. Organiza!

#### ESPERANTO AND THE FAIRS.

Esperanto is employed for advertising purposes by almost all the fairs of Europe, which have issued a number of propaganda publications in that language. A pamphlet recently published by the Leipzig Fair has been despatched to 42 different countries.—I.E.S.

#### GAZETOJ RICEVITAJ.

Aŭstria Esperantisto, 2; Amerika Esperantisto, 5; Amikeco, 3; British Esperantist, 251; Brazila Esperantisto, 10-11; Belga Esperantisto, 3; Bulteno Antverpena, 1-2; Die Einheitsfront, 8 ĝis 11; Esperanto, 307; Heraldo de Esperanto, 13 ĝis 20; Holanda Esperanto-Pioniro, 1 ĝis 8; Itala Esperanta Revuo, 2; Internacia Radio Revuo, 1-2; International Language, 2; Internacia Medicina Revuo, 2; Internacia Esperanto-Servo, 1, 2; La Verda Ombro, 1; La Suno Hispana, 105; Literatura Mondo, 12; Libera Laboristo, 4; La Revuo Orienta, 3; La Progreso, 2; La Ora Epoko, 14; Munkaskultura, 3; Nova Sento, 1; Pola Esperantisto, 8, 1, 2, 3; Portugal Esperantisto, 2; Pro Transilvanio, 1; Revista del Atineo, 19; Senaciulo, 24; Svenska Esperantisto, 1; Wereldtall, 20 ĝis 22.

**ESPERANTO, LINGVO DE RADIO.**

Ĉiuj niaj legantoj certe konscias pri la graveco de la nuna propagando de Esperanto ĉe radiistoj. Necese estas, ke ni esperantistigu multajn radiistojn kaj, por tio, ke ni igu por ili Esperanton utila. Ankaŭ, ni devas radiistigi kiel eble plej multajn Esperantistojn, montrante al ili, kiel facile kaj interese estas konstrui mem radio-ricevilon, por ke multaj el niaj samideanoj aŭskultu la sendojn da la radio-stacioj kaj povu instigi ilin al uzado de Esperanto aŭ gratuli ilin pro ĝia uzado.

Tial ni kun ĝojo salutas la aperon de la unua numero de "Internacia Radio Revuo," monata organo de "Internacia Radio-Asocio." Dank' al ĝi Esperanto utilos ne nur al nunaj Esperantistoj, kiuj trovos en ĝi ĉiajn konsilojn necesajn, por konstrui mem malkare radio-aparatojn, sed ankaŭ al radiistoj ankoraŭ ne esperantistoj, kiuj legos en ĝi internaciajn informojn alie ne haveblajn, se nur ili konsentos dediĉi tre malgrandan penon al ioma lernado de Esperanto.

"Internacia Radio Revuo" ja celas kontentigi jenajn kategoriojn de legantoj:

1-e Esperantistojn, kiuj interesiĝas pri Radio, pri uzado de Esperanto en Radio, kiuj volas propagandi Esperanton inter radiistoj aŭ deziras fariĝi radio-amatoroj;

2-e Komencantajn radio-amatorojn, bezonantajn sisteman gvidadon en ilia laboro, emajn ekkoni la teorion, la "misterojn" de Radio, solvi multajn

dubindajn problemojn, kiujn ili renkontas dum sia laboro;

3-e Spertajn radio-amatorojn, kiuj volas trovi la kronikon de la tutmonda radio-movado, analizojn de plej interesaj artikoloj el la tutmonda radio-literaturo, lastajn novaĵojn kaj inventojn.

La unua numero entenas interalie originalan artikolon pri propagiĝo de la elektro-magnetaj ondoj, verkitan de nia fama malnova samideano, profesoro Mesny; konsilojn pri diversaj metodoj por instalado de antenoj; detalan priskribon de malmultekosta facile konstruebla ricevaparato; unuan artikolon el teoriaj babiladoj "Paŝo post paŝo"; humoran felietonon "Zoologia studo pri la radio-amatoro"; artikolojn de la ĉefredaktoro D-ro P. Corret, pri la propagando de Esperanto ĉe radiistoj kaj pri la Esperanta teknika radio-vortaro; detalan kronikon de la radiista kaj radi-esperantista movado, k. t. p. Bela kovrilo kaj multenombraj ilustraĵoj certe ne malplaĉos al la legantoj.

La unua numero estos senpage sendata al ĉiu esperantisto, kiu mendos ĝin de la eldonisto, sendante samtempe, por la sendelspezoj, unu internacian respondkuponon (por Francujo unu 30-centiman poŝtmarkon). Nepre mendu ĝin, ĉar dank' al ĝi vi povos tre malmultekoste konstrui vian propran aparaton.

La abonprezo por unu jaro estas nur duon-dolaro.

La abonmendojn sendu laŭ adreso: "Internacia Radio Revuo," E. Chiron, eldonisto, 40, rue de Seine, Paris-6e.

**SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.**

It has been decided to hold the next Australasian Congress at Hobart during Easter, 1927.

All applications for information and subscriptions should be forwarded to the following local Secretaries:—

VICTORIA:—Mrs. E. S. Bigelow, 36 Kangaroo Road, Oakleigh.

NEW SOUTH WALES—Mr. F. T. Simon, c/o Sydney Esperanto Society.

SOUTH AUSTRALIA—Mr. W. L. Waterman, 26 Henley Road, Torrenville.

WESTERN AUSTRALIA—Mr. C. Caine, 4 Norbert St., East Perth.

TASMANIA—Mr. D. Guilbert, Lands Department, Hobart.

NEW ZEALAND—Mr. W. H. King, Postal division, Secretary's Office, G.P.O., Wellington. Secretary for Queensland to be announced later.

**HAROLD PUDNEY****Specialisto pri Fontanplumoj.**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## BREDEJO DE ALIGATOROJ.

La bredejo de aligatoroj estas unu el la plej allogaj vidindaĵoj de St. Petersburg, Florida. Oni postulas eniran pagon da 25 cendoj, kaj centoj da personoj ĉiutage iras tien. Interne de la ĉirkaŭanta barilo aro de lignajbarakoj kun barilo de metal-fadeno donas ŝirmon al la aligatoroj, kaj ĉar ili estas amfibioj oni provizas multon da akvo por la kreitaĵoj. Tie oni povas vidi aligatorojn de ĉiu grandeco, de la malgrandaj junaj, ĵuse elkovataj el la ŝelo kaj nur nemultaj coloj longaj ĝis la tre aĝaj kies longo estas 14 aŭ 15 futoj.

Tiu bredejo jam funkciis dum dudek jaroj kaj la posedanto nun havas tie milion da aligatoroj. Oni kaptis la plimulton de la grandaj bestoj en truoj ĉe la bordo de rivero dum la vintra dormado. Ordinare ĉasistoj kaptas ilin por manĝi la voston, kiun ili konsideras tre bongusta. La aligatoro estas indiĝeno de Florida, kaj vivas en la riveroj kaj marĉoj de Meksikio kaj Usono. Ĝi estas iom malsimila de la krokodilo, kiu havas pli longan kaj ankaŭ pli fortan makzelon, kaj estas multe pli furioza. Oni ne povas certigi sin pri la sekso de aligatoro ĝis la besto havas la aĝon de 20 jaroj, kiam la ino por la unua fojo demetas ovojn, de 20 ĝis 60, kaj ĉiujn en unu tago, kaj faras same ĉiujare. La ovoj havas la saman koloron kiel la ovoj de kokino, sed ili estas iom pli grandaj. La aligatorino demetas la ovojn en nesto sur la tero kaj lasas ilin tie ĝis la varmo de la suno elkovas ilin.

Mr. Boyce was the concluding debater. He came provided with voluminous notes, but whether the unanswerable argument advanced by the affirmative speakers had proved these to be illogical, or whether the time at his disposal was insufficient, this speaker in the main, confined his remarks to endorsing the points raised by his collaborator, the only new aspect shown being a brief comparison of the international language with the various national languages.

Owing to the misinterpretation of the title, a decision was not announced; but it was unanimously agreed, in which the negative speakers joined, that the case for the international language had been absolutely proved, and that such a language was one of the greatest and undoubted assets of the world.

#### ANONCOJ.

S-ro Masa Mizutani, Rjokujiu Sa, P.O. Kesto 14 Kamata, Tokio-fu Japanujo; deziras korespondi, I.P., P.M.

CLASSES held every Monday, 7.30 p.m., at 5 Aldred Road, Auckland, N.Z. All welcome. Visiting Esperantists ring 25-828.

## RECENZEJO.

**DATOJ KAJ FAKTOJ** pri la paca movado. Anna T. Nilsson, havebla de la verkistino, Malmo, Svedujo, prezo 1 sveda krono.

Tiu-ĉi volumo de kvin dek paĝoj, vere nur broŝuro, estas kompleta konsultlibreto rilate al la paclaboro, kaj estas bonvena, ĉar estas rimarkinde ke la historio de la paca movado estas vere malfacile alirebla. Multaj personoj kunlaboris en la pretigo de la libro kaj la rezultato estas verko, kies stilo kaj enhavo kontentigos la Esperantistaron. Flanke mi volas diri, ke la eventuala profito estos dividata inter la paca kaj Esperanta movadoj. (C.W.B.)

**ĈIES INTERNACIA ESPERANTA STENOGRAFIO.** Aĉetebla ĉe la aŭtoro, S. Dyba, gimnazia profesoro, 4, Moltkeŝtr., Berlin-Niederschönhausen, 12 ekz. 10 fr. sv.

La aŭtoro reklamas, ke per sia sistemo korespondada skribo estas lernebla dum unu horo. La sistemo estas bone prezentita en korekta Esperanto; sed nur la praktikado montras ĉu ĝi estos egale taŭga, aŭ pli taŭga, ol la jam konataj sistemoj.—(C.W.B.)

### IMPORTANT STEP BY THE BULGARIAN POSTAL AUTHORITIES IN FAVOUR OF ESPERANTO.

Following the decision of the last congress of the Universal Telegraphic Union in Paris, adopting Esperanto as a "clear language," which comes into force on 1 November 1926, the Ministry of Posts, Telegraphs and Telephones of Bulgaria, by special decree of 19th March (No. 83076) declared Esperanto a clear language as from the date of the said decree for the purposes of the postal territory of Bulgaria.

By official order (No. 83800) of 5th April 1926 the Directorate of Posts, Telegrams and Telephones notified its administrative organs of the said decree and specially recommended the study of Esperanto to the members of its staff.

In order to enable post office servants to acquire an elementary knowledge of Esperanto, the Directorate further ordered the affixing of an explanatory table of the grammar of Esperanto in the Bulgarian language, with numerous practical examples, in 500 post offices.—I.E.S.

## PRI KOBALJOJ.

Ekzistas nur tri edukejoj de kobajoj kaj unu el ili estas en Aŭstralio, unu ĉe Hago kaj la alia en Usono. La posedanto de la Aŭstralia edukejo estas s-ro Cyril J. Miller, strato Bay, Brighton, elp. (Brajton), antaŭurbo de Melburno.

Ĉi tiu kobaja edukejo estas mirinda loko. Ĉi enhavas, en la nuna tempo, sep milojn de tiuj komikaj bestetoj kaj pli ol cent kuniklojn. Por loĝejo ili havas apartamentojn en barako. Oni zorgas ilin tre atente. Ili havas glatajn peltojn, brilajn okulojn kaj ili estas ŝajne tute sanaj kaj estas tre energiaj. La mortado inter ili estas meznombro po tri kobajoj en semajno, kaj tiuj ĉi mortis pro maljuneco.

Oni demandas, kion homo faras kun tiom da kobajoj? La respondo estas — la afero estas profitodona. Ĉiuj kobajoj kaj kunikloj, kiujn s-ro Miller bredas estas destinataj por esploraj studoj en la universitatoj. Tiucele, ili devas esti tute sanaj kaj jen la kialo de la grandaj zorgoj, kiujn oni devas fari pri ili.

Antaŭ kvin jaroj, kiam s-ro Miller starigis sian edukejon, la universitatoj kaj laboratorioj de Aŭstralio nur malfacile povis havigi al si regulan provizon da kobajoj. Tiuj, kiujn ili povis aĉeti, estis plejparte la dorlotaĵoj de infanoj, kaj estis liverataj de agentoj, sed sufiĉa nombro neniam estis havebla. S-ro Miller, kiam li studadis medicinon, ĉe la Universitato, sciis tiun malfacilaĵon kaj, kiam grava akcidento devigis lin cesigi siajn medicinajn studojn kaj preni sur sin ian okupon en la plena aero, liaj pensoj sin direktis al kobajoj.

Li aĉetis kobajojn ĉie, kie ajn li povis trovi ilin. En nelonga tempo la plimulto el la kobajoj en Viktorio sin trovis lokigitaj en lia edukejo, kaj la scienculoj de Aŭstralio gratulis sin pro tio, ke seninterrompa provizo de la malgrandaj bestoj estas je ilia dispono. Hodiaŭ la kobajoj de s-ro Miller estas forsenditaj en ĉiujn regionojn de Aŭstralio.

Ĉi tiu juna Viktoriano komence nenion sciis pri kobajoj aŭ pri iliaj bezonoj. Li sukcese penis trovi konsilojn el libroj. Tial li vidis ke li devas akiri la necesan scion laŭsperte. Li eksperimentis per nutraĵoj kaj flegado, ĝis li progresis al difinita metodo. Nun li devas antaŭ aĉeti la medikagon, eĉ kvin jarojn en eston-

teco, por certigi ke li havos la necesan provizon. Rilate akvon — nu s-ro Miller ne donas ĝin al ili. Li trovis ke la trinkado malutilis al ili. La medikago kiun ili manĝas estas trempita en akvo kaj tio estas la sola fluidaĵo kiun ili ricevas. Pri tio la kobajoj ne sin ĝenas. Ili estas glataj kaj grasaj kaj senmakule puraj. Poste, kiam li alvenis al preciza kaj sukcesplena metodo, s-ro Miller akiris libron traktantan pri edukado de kobajoj. Tie li trovis lia propra sistemo estas tute neĝusta. Sed li ne forlasis ĝin. Li daŭrigis sian metodon, ĉar li jam pruvis ĝian efikecon. Dum la pasintaj dekdu monatoj la kobajo edukejo en strato Bay ricevis pli da publikigado ol estas justa. Iuj personoj protestis kontraŭ ĝi kaj la loka municipia konsilantaro ricevis peton, ke ili forigu la pretekstitan malagrabaĵejon. S-ro Miller tuj malfermis la edukejon al la publika vido. La saninspektoro vizitis ĝin kaj certigis ke ĝi estis sen odoro kaj neordinare pura. Oni ankoraŭ protestis. La Brightona saninspektoro faris cent kvindek unu vizitojn al la edukejo dum la pasinta dekdu monatoj, iujn el ili ĉe meznokto, kaj ne eĉ unufoje li povis flari ian malbonodoron.

La postulado por kobajoj estas preskaŭ po sescent por semajno. S-ro Miller ellitiĝas ĉiun matenon je la kvina horo por flegi siajn bestetojn.

#### EUROPEAN ESPERANTO CONFERENCE IN LOCARNO.

A European conference of presidents of the Esperanto societies was held in Locarno at Easter under the auspices of the International Central Committee of the Esperanto-Movement. The conference was opened by the mayor of Locarno, Dr. Rusca, in the salon where a more famous Locarno Conference had met. Speeches were made by delegates of ten nations. The principal resolutions relate to the steps to be undertaken for the introduction of Esperanto into commercial schools and the courses broadcast by 30 wireless stations in 15 European countries, and also the publication of scientific works in Esperanto. The committee has received offers from three great publishing houses in Europe and Japan, which have recently commenced to publish works of this kind.—I.E.S.

#### MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY.

The annual meeting of the Melbourne Esperanto Society was held at their rooms, 5th floor, 323 Bourke Street, Melbourne, on Friday, the 25th of June. There was a good attendance of members. The secretary read a report of the activities during the year which among other items of interest included the fact that two examinations for Preliminary Certificate and the Diploma have been held with most successful results, most of the candidates passing with distinction. The treasurer reported favourable balances, both for the society and the library accounts. The following officers were reappointed:—Mr. C. W. Ballard, President; Mr. Robert, and J. Scurrie, Vice-Presidents; Miss V. Cox, Secretary; Mr. E. J. Cox, Treasurer; Mr. H. Byatt, Librarian; Mr. Robert, Assistant Librarian.

#### DESEGNISTOJ DE LA TUTMONDO ATENDU!

La Aŭstralazia Registaro intencas eldoni rememorigan poŝtmarkon, je la okazo de la unua kunsido de la Aŭstralazia Registaro ĉe la nova sidejo, Canberra, kaj invitas desegnistojn el la tuta mondo partopreni en la konkurso. La elekto de la desegno oni lasos al la imago de la desegnisto, sed la prefarotaj estos tipe Aŭstralaziaj. La desegnisto de la akceptitaj desegnoj ricevos altvalorajn premiojn.

Pliajn detalojn oni povas ricevi responde al letero adresita al sinjoro Gibson, Postmaster-General, G.P.O. Melbourne, aŭ de la Melbourne Esperanto-Societo, Box 731f, G.P.O., Melbourne, Victoria, Australia.

#### GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 1; Amikeco, 5; British Esperantist, 253; Bulgara Esperantisto, 8; Belga Esperantisto, 4; Bulteno Antverpena, 4; Die Einheitsfront, 14 ĝis 17; Esperanto (Rumanuja), 308; Heroldo de Esperanto, 27 ĝis 30; Internacia Esperanto-Servo, 3, 4; International Language, 3; Kataluna Esperantisto, 21, 22; La Verda Lumo, a; La Nova Tago, 1; La Suna Hispana, 107; Novaj Tempo, 1 ĝis 4; Oomoto, 16; Oomoto Internacia, 5; Pola Esperantisto, 4; Svenska Esperanto, 4.

**AL LA PRAKTIKEMAJ HOMOJ!**

(Ernest Archdeacon).

Mi ĉiam pli kaj pli miras, kiam mi vidas la blindecon de la multego, kaj tiun de la aviadistoj, ne tuj ekkomprezentaj la multnombregajn kaj ŝatindegajn servojn; kiujn helpa lingvo ĉie adoptita kaj komprenita, nepre farus al ili. Tiom pli ke nun oni tre ofte trairas, en du horoj, la distancon inter la ĉefurboj de du malsamlingvaj landoj.

Tiuj servoj estos kompreneble multe pli grandaj estontece, sed ni posedas multajn pruvojn, ke oni jam povas ricevi kelkajn eĉ nun kaj eĉ jam de longe.

Ekzemple la usona aerostatisto Mix, en 1909, mankis de tre malmulte ne gajni la konkurson Gordon Bennett, pro sia nescio de Esperanto! (polaj vilaĝanoj ekkaptis la trenkablajn kaj la aerostatistoj ne estis sukcesantaj decidi ilin forlasi la balonon, kvankam unu el la vilaĝanoj parolis esperante). Same la franca aerostatisto Dubonnet, en 1912 alteriĝinte en Rusujo, kaj bezonante helpon por faldi sian balonon, tre malbone sin komprenigis de la vilaĝanoj, kvankam unu el tiuj-ĉi vane provis interparoli esperante kun li.

Mi esperas ke tiuj ekzemploj decidigos la praktikemajn aerajn navigantojn lerni Esperanton, Estontece ĝi potence utilos al ili sed de nun ĝi povas helpi ilin en malfacilaj okazoj, ĉar de dek jaroj ĝi grandege disvastiĝadis.

**LA AUCKLAND N. Z. ESPERANTA ASOCIO.**

Esperantistoj ĉe Auckland dum 12 majo reformis la malnovan societeton kun la supre citita nomo. La jenaj oficistoj estis elektitaj:—prezidanto, s-ro J. S. Russell; vicprezidanto, s-ino A. E. Dewing; sekretario kaj kasisto, s-ro R. J. Crago; komitatanoj s-ro E. B. M. Dewing, s-ro C. H. Parker, s-ino E. M. Watkin, f-ino I. James.

La Asocio kunvenas la unuan kaj trian jaŭdon de ĉiumonato en la "New Church Hall" Newton Road, Symonds strato, Auckland, je la duono post la sepa vespere. La jara kotizo estas du ŝilingoj kaj ses pencoj. La celo de la Asocio estas disvastigi Esperanton, kiel eble plej multe, kaj jam sukcesis interesigi kvar ĵurnalojn, nome:—N.Z. Pictorial News, akceptos artikolon de R. J. Crago, ĉiusemajno; Young Citizen, akceptos artikolon por ĉiu eldono de E. B. M. Dewing; Eden Gazette, akceptos artikolojn verkotajn de diversaj kunhelpantoj, redaktata de f-ino Knight; Labour News, akceptos artikolon de s-ro C. N. Parker. Per la helpo de la kvar ĵurnaloj sendube la afero progresos. Pli ol dudek anoj aniĝis. La Asocio aranĝis ke dum la unuaj kvardek minutoj de la kunvenoj oni uzos la anglan lingvon por ke ĉiu komprenu la protokolon, Asociaj aferoj kaj aranĝoj, ankaŭ por instrui la komencantojn; la cetero de la vespero oni uzos nur Esperanto, por la kantoj, diskutoj pri propagandaj aferoj k.t.p.

**SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.****HOBART — EASTER, 1927.**

Venu al Tasmanio, la Ĝardenista Ŝtato, por via libertempo.

Belegaj vidaĵoj! Reviviganta klimato!

Esperantistoj speciale bonvenotaj.

**HAROLD PUDNEY****Specialisto pri Fontanplumoj.**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon **POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO?** Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

## KRONIKO.

MELBURNO, V.—Dum la pasintaj semajnoj la sekvantaj programeroj okazis ĉe la Melburna Esperanto Societo. — S-ro Hudson paroladis pri la lasta parto de sia mondvojaĝo; pri sia veturo sur la Panama kanalo, la veturo per vagonaro laŭ longe de la okcidenta marbordo de Usono, kaj vizito al la belaj insuloj en la Pacifika oceano, ĝis la reveno en Aŭstralio. Ĉi parolado estis la fino de treege interesa rakonto. Je junio 11a “Senpreparaj paroladoj” donis bonan okazon al la anoj ekzercadi sin en la lingvo. — La debato “Ĉu estas dece ke la virinoj fariĝus policaj juĝistinoj?” estis granda sukceso, kaj preskaŭ ĉiuj partoprenis. La anoj montris grandan intereson pri ĉi tiu debato, kaj la partio kiu gajnis, sukcesis per nur unu voĉdono. — S-ro Scurrie donis tre interesan paroladon pri “Grimpado sur la Skotaj Montoj,” kiun li daŭrigos post kelke de semajnoj.

A euchre party will be held at the club rooms on the 30th July. Prizes will be awarded. Entrance fee 1/-. Proceeds for the Suda Krucio Fund. Come and bring your friends.

MANGAHAO-HYDRO, Nov.Zelando.—Dum pasinta monato McGuigan Fratoj penadis starigi novan klason en tiu ĉi urbeto. Sukcesplena debato helpis la aferon tre multe, publika opinio estis favore influita, kun la rezulto ke je la oka de junio la klaso konsistanta el dudek anoj komencis studi sub la gvidado de la fratoj. Estonte kunvenoj okazos ĉiun duan mardon kaj ĵaŭdon.

WELLINGTON, N.Z.—Responde al peto de la administranto de la loka radio stacio 2YK sinjoro W. H. King brodkastis dum deka de junio, dek kvin minutan paroladon titolitan “La Radio Lingvo.” Dua parolado sekvos post du semajnoj. La administranto de la stacio estas avida komenci Esperantajn lecionojn per radio, kaj se tio estos la deziro de sufiĉe da radianoj, regulaj lecionoj sekvos.

SYDNEY.—Unua perradia kurso esperanta en Aŭstralio komenciĝos ĉe radio-stacio 2KY la 3an Aŭgusto kaj daŭrigos ĉiun mardon vespere ĝis kompletigo.

El Rabaul, Nova Gvineo, radiogramo estis ricevita avizante, ke s-ro Maurice Hyde, aŭtoro de lernolibro “The Esperanto Guide,” forlasis Rabaul la 29 junio, akompanata de lerta

miksrasulo esperantista, por partopreni la Edinburgh mondkongreson.

“Rotary Club of Sydney” invites s-ron F. T. Simon paroladi al la membrojn pri Esperanto je la 22 junio. Ĉirkaŭ 150 eminentaj komercistoj ĉeestis en “Hotel Australia” kaj multe impresiĝis pri la simileco de Rotario kaj Esperantismo.

Travojaĝarta samideano dum la monato estis s-ro J. A. Meagher, el Dublin, Irlando.

Gazetartikoloj aperis en “Sydney Morning Herald,” “Daily Telegraph,” “Labor Daily,” “Sunday News” kaj “Radio.”

Loka reprezentanto de “Lingua-phone Instituto” prezentos al la “Modern Language Association” je la 19 julio serio da gramofondiskoj, enhavante ankaŭ Esperantlingvaj.

S-ro D. Calnan parolis pri “La valoro de Esperanto al Laborista Movado” ĉe laborista grupo en Summer Hill.

## WIRELESS LESSONS FROM SYDNEY ON TUESDAYS.

As intimated in our “Kroniko” last month, the Sydney Esperanto Society has now succeeded in making final arrangements with the Trades Hall Broadcasting Station to broadcast a comprehensive course of lessons in Esperanto. The Society’s new president, Mr. F. T. Simon, has been selected as instructor.

Commencing on August 3rd with a lecture entitled “Why Esperanto?” a lesson will subsequently be given every Tuesday evening. Time of transmission has so far not been announced, but will be widely advertised by the broadcasting station, and always held at the same hour.

Wavelength, 280 metres; Call Sign, 2KY; Power, 1½ kw.

This will constitute the first series of lessons in any language to be broadcast in Australia. It is almost needless to add that reports from listeners are not only welcome but necessary.

## GRAVA DEKLARO DE LA SUDSLAVA INSTRUA MINISTRO.

La Sudslava Esperantista Ligo lastatempe ricevis de kelkaj enlandaj societoj plendojn, ke multaj instruistoj kaj profesoroj diversmaniere malhelpas disvolviĝon de la esperanta movado. Kelkaloke la distriktestroj kaj ĝendarmoj malpermesis eĉ fon-

don de la esperantaj societoj kaj aranĝon de la esp. kursoj. Tial la estraro de la Ligo decidis energie protesti ĉe la ministroj de l' instruado kaj internaj aferoj petante, ke ili malpermesu al siaj subuloj la similajn persekutojn. Ĉar tiutempe estadis en Zagrebo s-ro Stjepan Radić, la ministro de la instruado, la estraro decidis persone transdoni al la ministro la proteston. La 15. 3. 1926 aŭdiencis ĉe la ministro la prezidanto kaj sekretario de SEL, s-roj D-ro D. Maruzzi kaj I. Rotkvić. La ministro akceptis la delegitojn tre afable kaj donis al ili plej favorajn promesojn. La interparolo estis laŭvorte jena:

D-ro Maruzzi: Ministra Moŝio! Ni venis en la nomo de SEL por esprimi al vi — kiel al la ĉefo de la kulturministrejo — nian estimon. Sed ni devas ĉiokaze ankaŭ plendi al vi, ke multaj lernejestroj kaj profesoroj malhelpas instruadon de Esperanto.

S-ro Ministro: Kio? Tio ne estas ebla! Tio ne plu devas okazi. Mi ja mem lernis Esperanton kaj fariĝis, pri la politikaj aferoj mi ne povis ĝin finlerni. Sed tuj, kiam mi disponos pri sufiĉa tempo, mi promesas honorvorte, ke mi ĝin ellernos, ĉar mi opinias, ke estas barbareco nuntempe ne lerni Esperanton. Komence de la nova studjaro mi enkondukos Esperanton en ĉiujn komercajn lernejojn, eĉ eble, se la cirkonstancoj estos favoraj — en ĉiujn lernejojn.

(Post tiuj ĉi vortoj la ministro ordonis al sia sekretario noti, ke oni faru cirkuleron rilate al Esperanto.)

D-ro Maruzzi: Post via deklaro, Ministra Moŝto, estus ĉiu nia vorto superflua.

S-ro Ministro: Jes! Tio nur signifus verŝi akvon en la maron. Vi laboris ĝis nun: honeste, saĝe kaj persiste. Tial mi petas vin, daŭrigu sammaniere plu kaj salutu ĉiujn gesamideanojn.

D-ro Maruzzi: Ĉu vi permesas al ni, Ministra Moŝto, publikigi viajn vortojn?

S-ro Ministro: Certe vi povas! Kial ne?

Post kelkaj privataj vortoj direktitaj al D-ro Maruzzi, adiaŭis la ministro plej bonvole la reprezentantojn de SEL.

Laŭ raporto en "Konkordo," marto 1926.

El Heroldo.

## JARKUNVENO EN SYDNEY.

Konforme al la A.E.A. regularo, la "Sydney Esperanto Society" okazigis la jarkunvenon je la fino de junio.

La prezidanto, s-ro Frank V. Taylor, kies loĝurbo nun estas Newcastle, sendis raporton pri la de si respondan parton de la ĵus finita financa jaro, en kiu li, i.a. diris: — Por la societo la periodo estis sukcesa laŭ Esperanta sociala kaj financa vidpunktoj. Por la movado ĝenerale oni povas diri, ke la jaro alportis gravajn sukcesojn tre kuraĝigajn. — En la klubo ni klopodis interesigi la anojn pri la internaj aferoj de la societo per koncertetoj, paroladoj, prelegoj, konkursoj, deklamoj, muziko, teatraĵetoj kaj laŭlegado de dramoj, ktp. aldone al la ordinara Esperantaj kursoj.

"Rezultoj de la B.E.A. ekzameno por Esperantaj atestoj estis kontentigaj kaj montras, ke ne mankas al ni diplomitoj, kiuj povas agi kiel instruistoj aŭ ekzamenistoj kiam necesas. Ĉiu Esperantisto devus celi al la akiro de diplomo, ĉar ĝi estas definitiva mezurilo de progreso en la lingvo.

La vic-prezidanto, s-ro A. Aupart, donis sian raporton por la lastaj kvin monatoj, akcentante precipe la malfacilaĵojn spertitajn. Per tre interesa grafikaĵo li montris la malaltigon de ĉestantaro dum someraj monatoj kaj tuja kresko dum vintro.

Kiel signo de respekto la membraro leviĝis kaj silentis dum unu minuto pro morto de samideano, s-ro George Winter.

S-ro L. E. Pfahl sekvis kun raporto de siaj sekretariaj agadoj, denove montrante la senlacaĵajn klopodojn por ĉiskonigi nian lingvon inter iom aparta aŭstralia popolo.

La kasistino, f-ino V. Fairfield, prezentis la bilancon en kiu la elspezoj preskaŭ egalas la enspezojn, restante nur kelkaj ŝilingoj kiel kreditsaldo. Por Esperantistoj tiu estas sufiĉe kontentiga.

Oni tiam elektis la nova komitato, kiu rezultis jene:—Prezidanto, s-ro F. T. Simon (unuanime); Vic-Prezidantoj, s-roj A. Aupart, kaj A. Feldmayr, kaj f-ino M. Harwood; Sekretario, s-ro L. E. Pfahl, (oka sinsekva jaro); Kasistino, f-ino V. Fairfield; Bibliotekistino, f-ino M. Cullington.

Post diskutado de diversaj (ofte tre viglaj) la kunveno fermis je la 10.30 pm.

### LA TELEFONO.

La telefonon, unu el la plej mirindaj kaj geniaj elpensoj de nia tempo, ni ŝuldas al italo Antonio Meucci, kiu pro politikaj kaŭzoj estis migrinta al New York. Li estis granda patrioto kaj amiko de Garibaldi. En 1841, dum iaj elektraj eksperimentoj li rimarkis ke la elektra fadeno reproduktadis ĉe unu ekstremaĵo, parteton de la sonaj vibradoj ricevitaj de l'alia ekstremaĵo.

Post longaj studoj li konstruis kompletan telefonaparaton dum 1856, kaj ĝin submetis al iu sinjoro Mister Grant. Tiu ĉi, ŝajnigante protekti la genion de l'ekzilito, petis modelon de l'aparato kaj tre detalan priskribon. Kaj de la aparato, kaj de la priskribo li tiel bone profitis, ke post kelkaj jaroj li patentigis la eltrovaĵon, ĝin prezentinte sub sia nomo, kaj tiu de Bell kaj de Edison!

Meucci ekvidis la trompon, sed oni ne kredis al li, ĝis kiam, dank'al la helpo de amerika miliardulo, li atingis ricevi de la juĝistaro sentencon, per kiu estas certigita lia elpenso, rekonita lia antaŭeco, kaj donita kompenso de centmil dolaroj, kiuj alvenis ĝustatempe por forigi Meucci de l'malriĉega stato en kiu li tiam vivadis.

Li mortis ne malproksime de New York en 1889.

Nuntempe estas malfermita monferado por la starigo en New York de monumento, kiu montros la admiron kaj la rekompencan al la insultita genio de tiu granda italo.

El *Corrierino* esper. A. L. Reni.

—el *Itala Esperanta Revuo*.

La Esperanta Grupo de **Touring-Club** de France ĵus donacis sumon da 800 frankoj al la Internacia Scienca Asocio Esperantista, por ke ĝi estu uzata por la propagando, kiun la Asocio entreprenis en la Aeronautikaj rondoj.

The Secretary, La Suda Krucio Publishing Committee.

Dear Sir,—I wish to tell you how much I appreciate the little journal and how anxious I was lest it should go out of publication. It does meet a need amongst Australian Esperantists which I think would not be met by some of the more important European journals. I look forward to its arrival every month.

With best wishes for the continued growth of La Suda Krucio.

I am, yours truly,

Dr. S. E. HUMPHREYS.

Beaufort, 26/6/26.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobarta Esperanta Grupo**. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino f-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

**Persista Grupo**, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretario: f-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

## *Cole's Book Arcade, Melbourne.*

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 74 (Seventh Year)

Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 agosto 1926

## EVOLUTION OF AN IDEAL.

The present stage in the development of Esperanto is a transition period. During the past forty years the process of evolution has been rapid. From the day when Zamenhof gave to the world his masterpiece, to this year of grace, the countries of the world, east and west, have become permeated with the idea of a secondary language. Starting as an ideal, the language has become a practical necessity. It has passed the idealistic stage, from which it is now emerging as a practical utility. Commerce, science, politics and religion have ceased to regard the international language as a fad. All sections of human activity demand an easy, quick means of communication. Only one common lingual system exists—Esperanto. Its pioneers—all honour to them—have borne the burden for four decades; they have been actuated by the highest ideals, which can never be lost. Now must be considered the attitude of official Esperanto towards the utilitarian demands of the people of all nations. Whether to advocate Esperanto solely from an idealistic point of view, or to concentrate on efforts which tend towards its adoption for practical purposes as well. Hitherto the peace ideal has been pressed—and rightly so—nevertheless, perhaps in stressing this idea, the practical application has suffered. Esperantists all long for the universal adoption of Esperanto, they wish to see the lan-

guage used by all people of all countries. To attain this we must be able to show to business men, governments, scientists, the press, the churches and others that it is to their interest to use Esperanto. Almost the first question asked by any merchant, when the subject is broached, is "how will it benefit me?" By that he means shall I make any money by it? While that aspect may be deplored by many, yet it must be faced if Esperanto is to become a world secondary language. This is the transition period in the history of Esperanto.

## 2KY WIRELESS LESSONS.

The series was inaugurated on Tuesday, 4th August, when Mr. F. T. Simon devoted the whole of the available time to an introductory exposition of the reasons why Australians should interest themselves in Esperanto and why it is most fitted as the international language. Brief reference was also made of the wonderfully successful 18th Universal Congress then taking place in Edinburgh, Scotland.

At all future broadcasting the first five minutes will be taken up by lectures on some prominent feature in the Esperanto movement to enable the listening-in public to gauge the wide range and illimitable uses of Esperanto, and then pass over to a self-contained lesson in the language for the remainder of the period.

## LA SEP MALLABORULOJ.

Longe antaŭ ol la urbo Bremen estis konstruata, sin trovis en tiu loko nur brasikaj terpecoj kaj kampoj. Sed la kampoj donis nur mezan profiton ĉar granda parto estis sablo kaj la malaltaĵoj estis ĉiam minacataj de rivera superverŝigo. Eĉ post kiam la rivero reiris ĝis siaj ĝustaj bordoj akvo restis sur la malaltaĵoj ĝis malfrua somero, kaj venenaj vaporoj elkovitaj per la varmeco de l' sunradioj portis peston en aeron. Pro tio la ĉirkaŭaĵo estis malmulte homhavanta, kaj nur la plej malriĉaj urbanoj posedante tie terpecon kaj trovinte alioke lupagon tro alta loĝadis apud tiu marĉo.

Antaŭ tre multe da jaroj troviĝis tie viro, kiun pro la grandeco de lia bieno oni opiniis riĉa, sed kiu, malgraŭ tiu famo, estis la plej malriĉa el ĉiuj siaj najbaroj. Ĉar liaj brasikterpecoj estis la plej senfruktaj kaj sablaĵoj kaj lia herbeja estis, en la daŭro de l' tuta jaro, marĉa, li povis fidi nur al malgranda rikolto da fojno. Tial li ne havis bovinon, sed kontentigis sin je kaprino, kvankam tiu ĉi lasta ne sufiĉis por lia bezono. Li ne povis dungi laboristojn, tamen malgraŭ tio ke lia mastrataro estis grandnombra, ĉar li havis sep flojn, ĉiu pli granda kaj forta ol la alia Ili vagadis ĉiun tuttagon, rigardis la akvon, sentis venton kaj veteron, kaj kiam ili atingis la hejmon meztage, havis malsaton kiel tiu de lupoj, ĉar nenio en la mondo kaŭzas pli bonan apetiton al ĉeesto apud kuranta akvo en freŝaero. Tie ili sidis ĉirkaŭ la granda kverktablo, la sep forteguloj, kaj estis ĝojige rimarki, kiel ili amis al subtegmento por ripozi dum unu mallonga horo, kusiĝis laŭlinie por dormado, kaj ronkadis tiel forte, ke la muroj ĝemis. Kiam ili sin sentis refortigitaj, ili streĉe rektigis sin kaj foriris denove laŭ la bordoj de l' rivero por vidi, kiamaniere fisistoj kaptas fiŝojn kaj kiel la ŝipoj velveturas supren-malsupren. Tuj post sunsubiro, ili hejmeniris por enŝiĝo, sed unue ili glutegis grandegan noktomanĝon. Tiam, kusiĝinte, ili dormis samkiel arboj, plene kaj nevekeble ĝis la suno staris alte sur la ĉielo alvokante la areton al matenmanĝo.

Tiamaniere ili pasigis la tempon de jaro al jaro, unu tagon kiel la alian en daŭra senokupateco. Tial la tuta najbararo nomis ilin "La Sep Mal-

laboruloj." Ili sciis tion tre bone, sed la babilado de l' tuta mondo ja ne ĝenis ilin. Ili havis bonan konscion, kaj kiam ili atingis hejmon la tablo estis ĉiam pretigita. Babilado de ĵaluzaj homoj estas facile forgesita.

Estas vere, ke la patro keikfoje ilin rememorigis, ke li maljuniĝas, kaj ke li fidas al ili helpi lin. Sed tio estis ridinda pro tio, ke li havis tiel malmulte fari, ke li sidis tutan tagon sur benko antaŭ la domo, aŭ parolis pri vetero kun preterpasantaj najbaroj. Li ankaŭ rigardis dum longa tempo, kun falditaj brakoj, sian marĉon, farante al si komparojn, kaj pensante kiom pli prosperaj estis Johano, Petro, Aleksandro ktp. ĉar tiuj havis sekajn kampojn kaj sanigan fojnon. Poste li ĝemis profunde, kaj turnis sin por endomeniro, lasante ĉion kiel antaŭe.

La patrino melkis la kaprinon, kuiris napojn kaj brasikojn, provizis brulaĵon kaj akvon, kaj estis, mallonge dirite, la unusola kiu atentis la mastrumadon.

Tia vivado daŭris longatempe, sed fine la fratoj komencis senti enuecon, estante senokupaj. Ili rimarkis, ke iliaj samaĝuloj per laboro ĉe aliaj personoj akiris monon kaj prosperis. Je tio la plej maljuna diris al siaj fratoj, —Vi scias, ke ĉar mi estas la unuenaskito, la patra bieno apartencas al mi, sed mi jam cedis mian rajton al la plej juna. Mi dungiĝos kun nekonatoj, kaj espereble post mallonga tempo estos perlaborinta sufiĉe por aĉeti bienon por mi mem. La parolo plaĉis al ĉiu. Ili ĉiuj decidis fari tion saman, kaj lasi la patran domon. Eĉ la plej juna ne volis resti hejme. Ŝajnis al ili, ke estas grandaĵo ĝi laboristoj gajnantaj monon. Do, irante de domo al domo, ili proponadis sin kiel laboristojn, gigantaj viroj havantaj larĝajn ŝultrojn kaj fortajn tendencojn kaj muskolaron. Sed ili ne trafis la celon, ĉar kien ajn ili iris, ĉie la homoj ekridaĉis, dirante unu al alia, —Rigardu la mallaborulojn. Jen ili serĉas laboron. La patra bieno jam ne ilin nutras, pro tio ili volas esti nutrataj ĉe ni. Sed ili ne ŝatas laboron, kaj ĉi tie ni nur bezonas laboremuojn. Foriru, vi sep nenionfaristoj—Do, ili pluiris de domo al domo, unue al la najbaroj en la antaŭurbo, poste en la urbo mem, supren ĉi-straton malsupren alian straton, sed troviĝis neniu, kiu volis dungi ilin. Eĉ tiuj, kiuj ne konis ilin de antaŭa tempo ne

ilin atentis, ĉar ilia malbonfamo jam kurege antaŭeniris.

Tial ili revenis hejmen lacaj, ĉagrenitaj kaj malsataj. La patrino alportis la noktomanĝon, sed por la unua fojo en siaj vivoj ili ne ĝin ĝuis. Ankaŭ ili ne tuj sin kuŝigis laŭkutime, sed plivolis sidadi senparole sur la benko pendkape, kun la brakoj krucigitaj sur brusto, kaj la kruroj etenditaj ĝis mezo de l' ĉambro.

La patro kompatis la sortostaton de la knaboj, kiuj deziregis progresi en la mondo, kaj montri siajn fortojn kaj lertecon, sed al kiuj oni ne donas bonokazon. Li penis konsoli ilin, volante doni al ili sufiĉan laboron per la propono, ke estante li turmentos sin per nenio kaj transdonos al ili tutan zorgon de l' bienestablo.

La filoj diris nenion, sed ĉiuj rigardis la maljunan, atendente kion li diros. Tiu sin turnis al la patro, ne plu povante sin reteni, kaj diris. — Eĉ se vi donus al ni okupon, ni ne povus forigi la malbonfamon de ni ĝisnun meritita, kaj ni tial kredas, ke ni ja povos fari plibone kiel dungitoj. La nemultajn pizojn kaj fabojn vi povos planti sola, kaj vi povos facile rikolti la fojnon de l' marĉo senĝene. Maljunulo, kiel vi, povas facile administri la tutan mastrajon, sed ni, ni deziras labori, kaj el ĉi tie elpeligante, ni iros morgaŭ en la vastan mondon—. Estis neutile, ke la patro penis emigi ilin forlasi tiun projekton; ke la patrino plorpepis kvazaŭ ŝi plorigus al ŝi la okulojn. Tuj kiam la suno aperis, ili adiaŭis kaj foriris al la leviganta suno, neatendante la kompatindajn gepatrojn, kiuj staris plende ĉe l' pordo, streĉe rigardante ilin. Kiam ili jam ne povis vidi la filojn, la paro reeniris la domon, por krie demandi reciproke, kial la knaboj ilin forlasis. La solo konsolado estis, ke malsatoble repelos hejmen la idojn. Tial ili serĉadis okule avide la lokon en kiu ili malaperis, sed kvankam ili ĉiutage okulserĉis, ili ne vidis nek aŭdis ion pri ili.

El la Germana lingvo. (Daŭrigota)

### ĈE LA POLICEJO.

Vi plendas, ke oni frapadis vian kapon per kaserolo, kaj neniun postsignon de la batoj oni vidas sur via kapo!

La plendanto: Ho! Jes, s-ro Policano. Sed se vi vidus la kaserolon.

### LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Per tiu ĉi letro mi penas interesigi vin pri la nova Federala Ĉefurbo, Canberra. Laŭ raporto de la Federala Ĉefurba Komisiono la konstruado de la nova Parlamentejo ĉe Canberra estas baldaŭ finita, kaj laŭ promeso de la ĉefministro, la parlamento okupos la novan sidlokon en la fruaj monatoj de 1927.

La konstruado de la urbo mem bone progresas; jam kelkcentoj da domoj estas konstruitaj, kaj baldaŭ estos finkonstruitaj la domoj kie loĝos la Generalgubernatoro kaj la Ĉefministro. Oni nun konstruas kelkajn vojojn al proksimaj urboj, sur kiuj oni plantas arbojn.

—Australio instruas la mondon en la arto de urbkonstruado, tiel diris kavaliro H. Lund la bone konata filantropo, kiu antaŭ nelonge alvenis en Melbourne dum mondvojaĝo. Li restis kelkajn tagojn ĉe Canberra, kiu laŭ lia opinio estas tre pitoreska loko.

—Mi opinias, ke la urbo estas projektata lerte kaj laŭsperte, kaj fire estos unu el la rimarkindaj ĉefurboj de la mondo—, li diris. —La tenado sub la kontrolo de la komisiono de la tuta urbtero, kaj la fakto ke la parceloj neniam estos vendataj, kaj sekve ke neniu povos malbeligi la urbon, kiel oni jam faris en Vaŝingtono, estas bonega ideo. Commonwealth-avenue en Vaŝingtono ne harmonias kun la originala ideo, ĉar la konstruplano estas diversigita, kaj troviĝas tre altaj konstruaĵoj apud malaltaj. Ĉe Canberra la tuta konstruado estas kontrolata de la komisiono, kiu ne permesos al kiu ajn konstrui, malbelegaĵojn, kiajn oni povas vidi ĉe Vaŝingtono. Alia afero kiu faris impreson al mi—, li diris; —estas ke oni intencas konstrui rondan ĉefurbon kun la parlamentejo en la mezo. Tiu estis la ideo pri Vaŝingtono, sed la konstruprogreso sin direktis okcidenten, kaj nun Vaŝingtono estas nur duone ronda. Eventuale Canberra havos grandan loĝantaron en la industria areo, kaj jam estas difinita de la komisiono tiu areo, kaj ili malpermesos industriajn konstruaĵojn en aliaj partoj de la urbo. La universitata areo certe allogos multajn gepatrojn, kaj tiu ĉi areo estos plene loĝata. La militlernejo ankaŭ allogos ĉirkaŭ si la geparencojn kaj amikojn de la lernantoj, tiel ke la urbo ne kreskados en nur unu direkto, sed ciam konservos la rondecon. La in-

tencoj de la komisiono ĉiam efektiviĝos tial ke oni neniam vendos la parcelojn, kaj ili havas la povon ordoni la laŭplane arkitekturan stilon. La sola loko kie mi vidis tiun ĉi ideon efektivigita estas ĉe Nuremburg, Germanujo, kie la urbestaro havigis la povon malpermesi la konstruon de konstruaĵoj, kiu ne harmonias kun la mezepoka arkitekturo de tiu urbo. Delhi estas la konstruo de nova urbo proksime al malnova. Oni povas gratuli Australion, ke ĝi donis al la komisiono tiajn povojn. Nenie en la mondo oni trovas ion similan, kaj post periodo de 25 jaroj, mi opinias, ke la popolo estos fiera pri sia decido kaj pri la ĉefurbo.

Antaŭ kelkajn tagojn oni aŭkcie vendis parcelojn al tiu, kiu volis doni la plej grandan sumon. La lasta devos pagi po 5 procento de la sumo proponita dum 20 jaroj, ĉar la luprezo de la parceloj estas 5 procento de la nuna tervaluto, kaj post ĉiu 20 jaroj la komisiono havas la rajton plialtigi la luprezon, se ili opinias, ke tiam la parcelo fariĝis plivaltora.

La unua aŭkcia vendado al luantoj okazis dum decembro 1924. Post tiu dato multaj homoj private kontraktis por lui la parcelojn. La lasta aŭkcia vendado tamen alteris multe pli da intereso kaj oni proponis sep mil funtojn sterlingaj por sidloko de kinematografeto; por alia parcelo ĉe angulo de du stratoj longe kaj larĝe je 53 futojn la luprezo estis po 5 procento de 2400 funtoj sterlingaj po jare.

La Canberra distrikto estis aĉetita de la registaro po nur kelkaj ŝilingoj por akreo, kaj nun kaj por ĉiam la registaro ricevos 5 procento de la valoro de la parceloj, kiuj eĉ nun valoras po multaj funtoj sterlingaj por futo en la ĉefstratoj. La projekto estas sukcesa, kaj por ĉiam la registaro ricevos grandegan renton de la nova ĉefurbo Canberra.

Kie nun staras Canberra antaŭ nun kelke da jaroj estis bieno ĉirkaŭita de praarbaro.

Via fidele, P.H.

### STRATO ZAMENHOF.

La urbestro de Dreseno decidis doni la nomon de D-ro Zamenhof aŭtoro de Esperanto, al strato en antaŭurbo Leuben. En la sekvantaj lokoj jam ekzistis strato Zamenhof: Sotteville-lez-Rouen (Francujo), Terrassa, kaj Sabadell (Hispanujo), Bialystok (Polujo) kaj Kaunas (Litovujo).

### KRONIKO.

HOBART, Tasmanujo. — La jara kunveno de la Hobarta Esperanta Grupo okazis je la 7 julio. La oficejoj de la pasinta jaro estis reelektitaj, kiel jene:—Prezidantino, C. M. Hannaford; Secretariino, A. Beckett; Kasisto, K. Simmons.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Nova kaj bonvera signo de progreso troviĝas nune en tiu ĉi urbo: du semajmaj gazetoj publikigas regulajn lecionojn. Ĉis nune ses lecionoj aperis, ĉi tiuj gazetoj ankaŭ enhavas novaĵojn pri Esperanto. La Remuera Klubo aranĝis Esperantan Balon, kio okazis dum 4 aŭgusto.

DUNEDIN, Nov-Zelando:—Ĉar la Ministro de Eduko konsideras fruan ŝanĝon pri la lernoplano de Nov-Zelandaĵ duagradaĵ lernejoj necese, la klubo sendis peton al la Ministro petante la enkondukon de Esperanto kiel anstataŭaĵo por la franca kaj germana lingvoj.

MANGARAO-HYDRO, Nov-Zelando:—La nove starigita klaso funkcias bone. Ĉiuj el la anoj faras laŭindan progreson sub la gvidado de la fratoj McGuigan. Ŝajnis ke la entuziasmo de la gvidantoj estas enirinta la klubanojn.

MASTERTON, Nov-Zelando: — Starigis dum pasinta monato nova klaseto, kiu estas la tria Nov-Zelanda klaso starigita dum la kuranta jaro. Instruisto, sinjoro Dewar, Secretariino, sinjorino L. Payne.

WELLINGTON, Nov-Zelando: — Dum la vespero de la unua de julio, s-ro W. H. King brodkastis sian duan paroladon titolitan, "La Historio kaj Disvastiĝo de la Internacia Lingvo, Esperanto." La parolado daŭris dudek minutojn, kaj estis raportita en la tagjurnaloj ĉe Wellington, Auckland kaj Whangarei. S-ro King brodkastis pluajn paroladojn en la intereso de nia kara lingvo. Vizitantoj al Wellington dum la kuranta monato estis s-ro A. Williamson, Vic-deligito de U.E.A. el Feilding. Gesinjoroj King, el Gisborne, ankaŭ vizitis la ĉefurbon.

MELBURN, V. — La eroj en la Melburna Esperanto Societo programo dum la lastaj semajnoj, estis interesaj por la anoj kiuj partoprenis, speciale instruigaj estis la novaj gramafondiskoj, per kiuj la anoj povas aŭdi la korektan elparoladon de la lingvo laŭ la fama kaj elokventa parolanto, s-ro E. Privat. Interesa

parolado, "La Lando de la Poeto Burns" de s-ro Scurrie, donis plezuron al la aŭskultantoj, precipe al tiuj kiuj konas la lokojn kaj ilin vizitis. —

Laŭ sciigoj ricevitaĵoj de la jenaj gesamideanoj, ili gajnis kun honoro, la Unuagradan Ekzamenon, — Finoj: R. Lane, F. Mulhall, kaj s-roj J. Frawley, J. Robert, J. Byatt. — Gratulojn al ĉiuj!

### PROPOSAL FOR THE USE OF ESPERANTO IN SCIENCE.

200 students of the University of Rio de Janeiro have addressed a petition to the German Ambassador in Brazil proposing that certain standard works in German medicine should be translated into Esperanto for the use of foreigners. The scientific teaching of the great German masters, says the petition, is interpreted to us through a few translations in French, Italian and Spanish, and we are accordingly obliged to learn those languages. In view of the great difficulties in the study of German, the majority of the most important works remain unknown to us. The only possibility of facilitating for us a knowledge of the great scientific labours of German scholars lies in the translation of the principal works into Esperanto. Twenty lessons suffice to enable the learner to read and understand anything that is written in this wonderful and sim-

### ESPERANTO AND SCIENCE.

The society for the study and dissemination of agricultural zoology (Institut zoologique, Bordeaux) at its general meeting on 21st February, 1926, expressed the following desire:

In view of the great variety of languages in which scientific works and reviews are published and of the great advantage which would arise from summaries in a common auxiliary language.

And of the fact that such a language exists in Esperanto, which besides being extremely easy in itself is suitable for the translation of scientific texts, and that the value of this language, which has been proved by long experience, was demonstrated afresh at the International Conference in Paris in 1925;

This meeting expresses the desire, that all scientific treaties and articles should be accompanied by summaries in the auxiliary language Esperanto.

The Universal Esperantist Medical Association (Teka) founded in 1908 by Prof. Dor of the University of Berne and comprising members in 40 countries, publishes a medical review under the name of "Internacia Medicina Revuo" printed entirely in Esperanto.

This review has, since January 1926, been published in Lille under the direction of Dr. Vanverts, Professor in the Faculty of Medicine of Lille and Corresponding Member of the French Academy of Medicine.

—I.E.S.

## SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

HOBART — EASTER, 1927.

Venu al Tasmanio, la Ĝardenata Ŝtato, por via libertempo.

Belegaj vidaĵoj! Reviviganta klimato!

Esperantistoj speciale bonvenotaj.

### HAROLD PUDNEY

### Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## RECENZOJ.

BENJAMENO F. SMITH, Historieto pri Elfarado; de Everett W. Lord, Boston, U.S.A.

Tiu estas lukse presita, l'artenita libreto, kaj ĝi mallonge skizas la travivaĵojn de naŭdekjara riĉulo. La grava punkto rilate la libreton estas, ke la aŭtoro estas Dekano de la Kolegio de Komerca Administrado de la Bostona Universitato, Usono. Gratulinda afero ankaŭ estas, ke Dekano tiel bone scias Esperanton ke li per tiu lingvo povis verki la libreton, kaj plie, ke li elektis Esperanton kiel la ple taŭgan rimedon por atingi vastan rondon. La aŭtoro diras, "Ĉi tiu libreto estis donacata al la lernantoj en la Kolegio de Komerca Administrado de Bostona Universitato pro la sindonemo de s-ro Smith . . . . . Estis la espero de s-ro Smith, ke la studentoj kiuj legas la rakonton povu ricevi el ĝi inspiron, kiu ilin instigos serĉi fundamentojn valorajn; ke ĝi ilin helpu konstati la gravan fakton, ke sukceso ekonomia dependas de la intimaj virtoj: ŝparemo, kuraĝo, kaj laboremo.

Tiom bonvenis la libreton la studentoj kaj ceteraj, ke oni opiniis ke estas dezirinde ĝin eldoni Esperante, kaj pro la malavareco de s-ro Smith ĉi tiu iĝis farebla." La libro ne estas aĉetebla sed oni disdonis ĝin kun la peto, ke ricevinto returne sendos al s-ro Lord mallongan priskribon, kaj en sia propra lingvo kaj en Esperanto, pri sia urbo, komerca aŭ profesia vivo. (C.W.B.)

LA PANNE. Gvidlibreto eldonita okaze de la Kongreso de la Belga Ligo Esperantista, La Panne. Majo, 1926.

La lokaj turismaj organizaĵoj konvinkitaj ke la helpa lingvo, Esperanto, povas multe faciligi la internaciajn rilatojn decidis eldoni tiun gvidlibreton por sin diskonigi al la eblaj vizitantoj.

## ESPERANTO.

Esperanto, the universal language," has made remarkable progress in Adelaide during the past 12 months. A society for its propagation was formed in 1910, but the war seriously interfered with its activities, and the endeavours of only three or four enthusiasts kept it alive. Efforts were made to revive it at the close of the war, and gradual progress was made until the beginning of 1925.

When the classes were re-opened at the Theosophical Society's Hall last year, the attendance increased to 30 members. Since then the movement has continued to grow rapidly. Small study circles have been formed in the suburbs. There are 60 students of Esperanto in the All Nations' Chums movement.

In Adelaide the movement has been fostered since its inception in South Australia by Mr. W. L. Waterman, President, and Mrs. A. W. Porter, Secretary and Treasurer, both of whom take charge of the weekly classes held at the Theosophical Society's rooms.

—Daylight.

## JURNALOJ RICEVITAJ.

Many interesting lantern slides were shown. These were for the most part made in the Institute of Hygiene in Cracow by the lecturer himself, some came from the State Institute of Hygiene in Warsaw.

Dr. Deuel dealt with the Successes of Modern Treatment of Phthisis, laying emphasis on the fact that this disease is not hereditary as was once supposed. He discussed and explained the leading modern methods and was hopeful about the future of the treatment of this disease.

His second lecture was concerned with The Lengthening of Human Life, in which he pointed out that, thanks to the great progress of modern medical science and to successful prophylactics, we have succeeded in increasing the normal duration of human life in the last century by ten years.

The second section—Physical and Technics—was dealt with by Dr. Fournier d'Albe, of London and Birmingham Universities, Mr. Rinaldo Orenigo, of Torino, and Dr. Alfredo Stromboli, of Pisa.

Dr. Fournier d'Albe lectured on Radio and its Future. Among real possibilities of wireless progress, he mentioned a world clock that would be capable of controlling timepieces everywhere by special signals; wireless locating code signals for the use of aircraft; and television. He expressed the belief that every large transmitting station would be compelled to adopt Esperanto as the auxiliary language.

Mr. Orenigo's lecture dealt with the Sun and Solar Phenomena, with special reference to the spectrum and its use for astronomical research, and sun spots. His lecture was illustrated by some interesting and, in some cases, unique lantern slides.

Dr. Stromboli's theme was Electro-

Metallurgy in Italy and was illustrated by lantern slides.

Linguistic Science—the third section—was presented by Professor W. E. Collinson, of Liverpool University, and Mr. Andreo Che, of Cluj. Professor Collinson lectured on Esperanto as a Road to Linguistic Science and Mr. Che dealt with The Direct Method as applied to the Teaching of Esperanto. He said that the direct method was a way of overcoming some of the difficulties inherent in the national tongues, but was not essential in the teaching of Esperanto, for the grammar of Esperanto was so simple that even a child could understand it. He included in his lectures an exposition of the direct method of teaching Esperanto as he had been compelled to use it in Rumania, owing to the diversity of the languages spoken by his pupils.

There were five lecturers in the fourth section—Folklore—Professor Th. Cart, of Paris University, French Folklore; Dr. Immanuel Olšvanger, of London, Jewish Folklore; Mr. Paul Bennemann, of Leipzig University, German Folklore; Mr. S. Grenkamp-Kornfeld, of Poland, Polish Folklore; and Mr. Jaume Grau Casas, of Barcelona, Catalan Folklore. Most of these lectures also dealt with folksong and were illustrated by some excellent singing.

The lecturers under the fifth section—International Law—were Professor Pierre Bovet, Principal of the Institut J. J. Rousseau in Geneva (in the absence of Dr. Edmond Privat), and Mr. C. C. Tarelli, of the International Labour Office, Geneva.

The title of Professor Bovet's lecture was The Education of the Child for Peace. He discussed the nature of the child and the importance of natural games and stated that the chief instinct in the child is the social instinct, with its component parts, the herd instinct and the instincts of conformity and solidarity. These instincts, properly trained, are a valuable assurance on behalf of the future peace of the world.

Mr. Tarelli dealt with the history and work of the International Labour Office.

These lectures are of real educative value and there is no doubt that the Esperanto Summer University is the germ of a permanent international university, the eventual influence of which is incalculable.

At the same time, the work, discussions and amusements of the Universal Congress were in progress.

There were meetings of the Language Committee, the International Central Committee of the Esperanto Movement, the Committee of National Representatives and other official institutions of the Esperanto Movement. On Sunday, the 1st August, there was the Divine Service in Esperanto, in St. Giles' Cathedral, and the dedication of the recently issued Esperanto version of the Bible. There were meetings of members of various sectional interests, such as Y.M.C.A., Anti-Smokers, Red Cross, Teachers, Freethinkers, Bahai-ists, etc., etc.

The lighter side of Congress life was not neglected. On Sunday there were various excursions and a concert in the evening. On Monday evening the Congress members were officially accepted by the Mayor and Town Council of Edinburgh. On Tuesday, the 3rd, occurred a special Scottish concert and on the next evening the famous Orpheus Choir sang a selection of Scottish songs. The foreign visitors were especially impressed by the wonderful singing of this choir and many were heard to declare that nowhere in Europe had they heard finer choral singing.

Thursday's excursion to the Firth of Clyde and the Kyles of Bute was perhaps the chief success; everything was perfect; the weather (nearly), the scenery and arrangements. Friday's International Ball was very fine. It is a wonderful experience for dancers to dance and converse with partners from ten or more nationalities.

It was a wonderful Congress, perfectly arranged, in a beautiful city, and the cheery ĝis revido en Danzig! was not unmixed with sadness for the end of an unforgettable week.

### LA BIBLIO EN ESPERANTO.

De la tempo de la morto de D-ro Zamenhof, antaŭ naŭ jaroj, la esperantistoj pacience atendis la publikigon de la kompleta Malnova Testamento, kiun li tradukis. Diversaj malhelpoj prokrastis la eldonadon. Unue la mondmilito, poste la serĉo por eldonisto kaj por la monrimedoj presigi la verkon kaj ebligi, ke ĝi kostu al la publiko kiel eble plej mal multe. Oni transdonis la manuskripton al brita komitato, kiu sukcesis ne nur trovi eldoniston, sed ankau bon-

koran subtenon, kiu provizis la tutan monon, bezonatan por kompostigi la verkon kaj klišigi la kompostajon.

La konata British and Foreign Bible Society kun la National Bible Society of Scotland entreprenis la eldonadon, sed kun la kondiĉo, ke la manuskripto estu zorge kontrolata kun la fidinda teksto de la hebrea originalo. Tiun taskon oni konfidis al kompetentaj spertuloj kaj al iuj anoj de la Esperanta Akademio, kiuj povus garanti al la eldonistoj kaj al la publiko la fidelecon kaj fideindecon de la traduko.

Oni povas tuj aserti, ke tiu revizado ne faris ian fundamentan ŝanĝon de iu paragrafo, kiun Zamenhof verkis, kaj la legonto povas certigi, ke la traduko estas vere la verko de Zamenhof laŭ lia intenco kaj ideo. Antaŭ sia morto li indikis kelkajn ŝanĝojn, kiujn li volis fari en la jam eldonitaj partoj de la Biblio, kaj la komitato respectis la dezirojn de Zamenhof tiurilate.

Kiam la esperantistoj ricevos la libron, ili akلامos ĝin kiel la gloran kronon de lia vivlaboro. Oni devas esti danka, ke li vivis por kompletigi ĝin, kiel lian lastan heredaĵon al la esperantista popolo, kiun li kreis. Oni ne povas paroli tro laŭde pri ĝi kiel fidinda traduko kaj kiel majstroverko en Esperanto. Estas notinde, ke ĝi estas traduko de hebrea libraro, farita de hebreo konanta detempe de sia juneco la idiomon de la originala teksto. Por la unua fojo post la tradukiĝo de la Malnova Testamento en la grekan lingvon (de la Septuaginto) en la tria jarcento A. K., la Sanktaj Skriboj de la hebreoj estas tradukitaj de hebreo en internacian lingvon. La latina Vulgato (eldonita en la kvara jarcento P. K.) ja estis verkita en la internacia lingvo de la tempo, sed tio estis la verko de spertuloj de la roma eklezio.

La graveco de la traduko por Esperanto estos nekalkulebla, ĉar ĝi fariĝas la ĉefa klasikaĵo de la lingvo. La hebrea Sanktaj Skriboj estas la fundamenta literaturo de la pli granda parto de la civilizita mondo. La Biblio ne estas nura libro sed ĝi estas libraro — aro da libroj. La Malnova Testamento estas kolekto de tridek-naŭ libroj. Ili variaco estas miriga, kiel ajn oni pristudas ilin. Ili ampleksas historion kaj biografion, juron kaj moralajn, filozofion kaj popoldirojn, dramon kaj poezion, profetaĵon kaj psalmon. Ĉiu aparte estas la produk-

tajo de geniulo kaj el diversaj epokoj; kaj ili venas al ni kiel atesto de la morala, spirita kaj intelekta esprimo de tiuj epokoj. Mil jaroj apartigas Genezon de Malahi. Dum ni pasas de libro al libro, ni povas kalkuli la ŝtupojn de la ŝtuparo, laŭ kiu la homoj grimpis al sia nuna civilizeco. La Biblio estas evolua libro. Ĝi bildas la evoluigon ne nur de la homaro, sed de la homa ideo kaj scio de Dio dum la pasato de la jaroj. En la lumo de tiuj faktoj oni povas kompreni, kiel la Biblio fariĝis la ĉefa libro de preskaŭ ĉiuj lingvoj. Ĉiu ŝpertulo en la angla lingvo devas submetiĝi al la disciplino de la angla traduko de la Biblio. La traduko de D-ro Martin Luther estas fundamenta libro de la germana lingvo. Ĉiu popolo, venanta en la lumon de civilizeco kiel rezulto de moderna misiista klopodo, ricevas la Biblion kiel ĝian unuan literaturon. Ĝi fiksas la lingvaĵon, kaj el ĝi ĉiu alia literaturo ĉerpas sian formon kaj esprimon. Oni do ne povas trograndigi la gravecon de la Esperanta Biblio. Esperantistoj jam konstatis el la jam tradukitaj partoj de la Biblio\*) la rimarkindan kapablon de Zamenhof traduki la antikvan tekston en fluan kaj gracian Esperanton. Oni trovas, ke la lingvaĵo de iuj el la lastaj tradukoj rebrilas mirige la stilon, la elokventecon, la fajron kaj la ritmon de la hebrea originalo. Tia fidela traduko estas preskaŭ nebla ĉe iuj el la naciaj lingvoj. Tio efikas multon por konvinki skeptikulojn pri la ebleco esprimi adekvate per Esperanto ĉiujn

variojn de homa penso.

Unu el la kondiĉoj de la eldonado kutime en Britujo estas, ke la Nova Testamento estu bindita kun la Malnova. La traduko de la Nova Testamento ne estas la verko de Zamenhof, sed de komitato, kiu sub la redaktoreco de Pastro John Cyprian Rust el Scham, Cambridge, eldonis la Novan Testamenton antaŭ dektri jaroj pere de la British and Foreign Bible Society kaj la National Bible Society of Scotland. Tamen granda parto de la Malnova Testamento estis tradukita de D-ro Zamenhof, antaŭ ol oni entreprenis la tradukon de la Nova Testamento; kaj la influo de la Malnova troviĝas en la Nova. Plie la revizistoj de la Zamenhofa traduko de la Malnova Testamento kaptis la okazon fari kelkajn ŝanĝojn en la traduko de la Nova, por akordigi ĝin kiel eble plej bone kun la Zamenhofa verko, precipe ĉe tiuj partoj, kiuj estas citaĵoj el la Malnova.

Zorgemaj legantoj de la Biblio en Esperanto eltrovos en ĝi multon, kiu ne vidiĝis en la nacia traduko. La preskaŭ universala regulo en Esperanto: unu vorto, unu ideo, ebligas, ke la esperanta teksto rivelu ĝuste kaj unusence la signifon de la originalo hebrea aŭ greka kaj la traduko do fariĝas ne nur rivelado de la originalo, sed ankaŭ komentario. Al tiuj, kiuj havos la devon en la estonteco traduki la Biblion en indiĝenajn dialektojn, la Esperanta Biblio havos apartan valoron; kaj estas eble, ke ĝi povos mem rapide fariĝi la Biblio por tiuj popoloj, en kies lingvo tradu-

## SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

Tasmanio estas laŭ ĉiu opinio tre bona loko en kiu oni libertempas.

Dum pasko 1927 estos plia alogilo—Esperanto Kongreso.

Venu ni vokas vin.

### HAROLD PUDNEY

### Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

ko ankoraŭ ne ekzistas ĉar per malmulte da instruado pri la internacia lingvo Esperanto provizos ŝlosilon al ĝi. En misia laboro, do, la Esperanta Biblio povas okupi gravan lokon.

Oni uzas ĉi tiun okazon, por esprimi la dankon de la esperantistaro al la amikinoj, kies malavareco ebligis la eldonadon, kaj al D-ro Mc. Fadyen, profesoro de hebrea lingvo en la kolegio de la United Free Church, Glasgovo, kiu agis kiel sperta konsilisto.

La traduko estos dediĉita ĉe la Diservo en la Katedralo de S-ta Giles, Edinburgo, dum la XVIII-a Universala Kongreso de Esperanto. Redaŭrinde pro la halto de laboro dum la ĝenerala striko en Britujo okazis tempoperdo, kiu malebligis, ke sufiĉe da ekzempleroj estus aĉetebraj dum la Kongreso; sed oni povas mendi ekzemplerojn ĉe la British Esperanto-Association, Londono, aŭ ĉe iu agentejo de la Britaj Bibliaj Societoj tra la mondo. —W.M.P.

\*) Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono, Psalmaro, Sentencoj de Salomono kaj La Predikanto.

—El Esperanto.

### KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — La ĉi tiea brodkast-stacio, IYA, nun elsendas lekciojn pri Esperanto. S-ro R. J. Crago liveris sian unuan paroladon dum septembro. Estas anoncita, ke paroladoj okazos regule ĉiusabato je la sepa kaj tridek vespere. Stacio IYA estas la tria Nov-Zelanda radiostacio brodkasti programerojn pri Esperanto.

La aferoj de la Remuera Klubo (kunvenejo 5 Aldred Road) bone progresas. Nune la disvastigo de Esperanto en tiu ĉi urbo estas iom malhelpata pro manko de lernolibroj. Tamen, la Auckland Esperanta Asocio, kiu ja kreskas, jam mendis librojn el Anglujo.

La ĉiusemajna ĵurnalo "The N.Z. Pictorial News" dum pasinta kvar kvin monatoj publikigis Esperantajn lecionojn kun ŝajne bonaj rezultoj. Ĉiutage leteroj de personoj kiuj sekvas la kurson, atingas la gvidanton, kiuj leteroj klare montras ke troviĝas granda intereso.

WELLINGTON, NOV-ZELANDO. —La kvina parolado pri Esperanto de s-ro W. H. King estis brodkastita de stacio 2YK dum 2a de septembro. La radiostacio estas helpanta bonege nian movadon en Wellington kaj provinco. Kvankam la stacio estas favorega ri-

late la enkondukon de regulaj lecionoj de Esperanto, kurso ankoraŭ ne estas aranĝita ĉar malfacilaĵoj devas esti unue flanken metitaj antaŭ ol oni povos komenci. Dume, ni esperu!

MELBURNO. V.—Dum la pasinta monato, okazis en la programo por la Melburna Esperanto Societo, instruata recenon de la Dua Ekzercaro de Dro. Zamenhof. S-ro C. W. Ballard, la parolinto, atentigis la anojn pri la diversaj rimarkindaĵoj en la dua Ekzercaro, kaj kontrastis la du verkojn.

Je 17a, — Pli multe da anoj ĉeestis kaj aŭdis la bonan elparolon de la lingvo per la fonografo. Alian nokton la anoj partoprenis tradukan rondon, kiu bone helpis ilin malpliigi erarerojn en la traduko kaj elparolo de ofte uzataj frazoj.

SYDNEY. — La lastmonate avisita disaŭdigado de semajna Esperanto-kurso de 2FC ne okazis laŭprograme. Anstataŭ komenci je la 15a septembro, ĝi komencis la 22an septembro, kaj la semajnon poste denove mankis pro anstataŭigo de grava longdistanca dissendo. Kvankam ĉagrenigaj, tiuj aliigoj restas sole en la manoj de la radio-stacia administracio, kaj malkontentigitaj aŭdantoj, leginte la avizon en la "Suda Kruc" kaj atente atendante la lekciojn de S-ro Edmonds, nur povas plendi ĉe la stacio pro neplenumo de la originala sciigo. Oni nun avizas, ke la kurso daŭrigos seninterrompe de merkredo, la 13a oktobro; ĝis la 3a novembro ĉiam je 19.30 horo.

La alia Sydney radio-stacio, 2KY, disaŭdigante esperantan kurson, daŭrigas ĉiumarde kun granda sukceso. Inter la ricevitaĵoj leteroj estas kelkaj el Tasmanujo. La unua novaĵo pri la Universala Kongreso en Edinburgh atinganta Sydney'on estis disaŭdigita de tiu stacio.

### LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

En la jaro 1912, sinjoro Francis Birtles faris sian unuan vojaĝon trans Aŭstralio per aŭtomobilo. Li skribis tre interesan rakonton pri tiu vojaĝo, kaj el la rakonto mi elektas la jenon:

—Se oni havas fidindan aŭtomobilon kaj se la vojoj estas bonaj ne estas eble plikomforte vojaĝi ol aŭtomobile, sed kiam la vojoj estas malbonaj . . . aŭ kiam tute mankas la vojo, estas plikomforte resti hejme.

—Mi jam sep fojojn vojaĝis trans Aŭstralio per biciklo, ĉiam laŭ diversaj direktoj, tial, kiam mi pripensadis

fari per aŭtomobilo pluan vojaĝon mi bone sciis la malfacilaĵojn, kiuj atendos min, kaj mi poste eltrovis, ke mi ne troigis ilin.

—Akompanis min sinjoro S. Ferguson kaj mia hundo "Rex." Ni lasis Fremantle per dekĉevalforta, unucilindra aŭtomobilo; ni devis multon porti kaj trovi spacon por abunda provizo da manĝaĵo, petrolo, oleo, hakiloj, ŝoveliloj kaj matoj.

La du unuajn tagojn venkante multajn malfacilaĵojn ni vojaĝis tra la sablaj ebenaĵoj, kiuj troviĝas oriente de York. Estis varmege, sed mankis al ni la tempo rimarki la varmecon, ĉar ni devis streĉi la sentojn por eviti la arbradikojn laŭ la tuta vojo ĝis Southern Cross (Suda Kruco). La proksiman tagon okazis la unuaj malfacilegoj; unue ĝi estis tre kruta monteto. Ni penis malsupren iri malrapidigante la aŭtomobilon per la haltigiloj, kaj kun la tuta pakajaro ĉe unu flanko de la aŭtomobilo, por malhelpi renversiĝo. Ni trovis la monteton tro kruta; la aŭtomobilo pli kaj pli rapidis kaj ni faris la ceteron de la malsupreniro je terura rapideco. Sed tiu estis nur la komenco de la malfacilegoj de tiu tago. Kiam ni duone transiris sallagon la supro ekfendiĝis kaj la aŭtomobilo enprofundiĝis en koton ĝis la risortoj, ni metis la kokosajn matojn sub la radojn, sed la aŭtomobilo rapide subpremis ilin kelkajn futojn en la koton.

—Tiam ni devis forpreni ĉiujn pakajojn, por plimalpezigi la aŭtomobilo, kaj devis porti la pakajojn unu mejlon sur la dorso, al sabla altaĵo. Ni forigis la koton de ĉirkaŭ la radoj, sed ĝi estis tiel glueca, ke ni devis ĉiam forigi ĝin de sur la ŝovelilo ankaŭ, tial la laboro estis longa kaj laciga, kaj nur post penegoj ni povis movi la aŭtomobilon al ŝajne plibona loko, kie ĝi denove penis enkotigi sin. Dum kvin horoj en la varmegeco, ĝenataj de la salpolvo, kaj turmentataj de la muŝoj, ni daŭrigis la laboron ĝis frue posttagmeze, kiam ni fine forlasis la sallagon. Nia akvoprovizo preskaŭ elĉerpiĝis, kaj ni devis rezervi la malmulton, kiu restis al ni por la radiatoro.

Ni haltis ĉe kaveto, kie troviĝas akvo . . . sed ne por ripozi. La muŝoj estis netolereblaj, ili penis eniri en niajn okulojn, en niajn orelojn, en niajn vestojn, en la teon, kaj insistis ke ili estu parto el nia manĝaĵo. La hundo freneze saltadis kaj ekmordadis je la insektoj. Ni mortigis kaj

mortigis ĝis ni estis lacaj, kaj dormis pro laciĝo lasante la monstrojn la venkantoj. La proksiman tagon ni alvenis al Coolgardie; tie ni replenigis nian provizon kaj daŭrigis la veturadon al Norseman. La du proksimajn tagojn ni estis okupata evitante la sallagojn, ĉar post nia lasta sperto ni ĉiam zorge evitas ilin. Kiam ni atingis la montetaro Fraser, pluvegis. Sekve la proksiman tagon la aŭtomobilo kelkfoje enkotigis, kaj aliaj malfacilaĵoj estis ke kelkfoje ni devis trahaki arbojn, kiuj falis sur la vojeton. Tiun tagon ni prezentiĝis al novaodoro. Ni renkontis aron de esplorantoj kiu uzas kamelojn. Tiu kiu ne konas la kamelon ne povas imagi la rafinitan odoron rezultantan el miksaĵo de kamelo kaj aŭtomobilo.

—Ni alvenis al Balladonia, enlanda telegrafstacio kaj lasis tiun lokon dum pluvego por iri al Eucla. La salarbetaj ebenaĵoj estis tre kotaj. La tero, kiu troviĝas sub akvo, estis la plej firma, ĉar ĝi ne fariĝas, kota ĝis ĝi ensorbiĝis de akvo, kaj dum la tuttago ni veturis tra la akvo. La proksiman tagon vento blovegis, kiu rapide sekigis la teron, kaj ni sen malfacilaĵoj atingis Eucla'n, kaj survoje por nin amuzi postkuris bestojn per la aŭtomobilo.

—Per la takimetro ni povis kalkuli la rapidecon de diversaj bestoj. Ni kalkulis, ke la dingo (indigena hundo) povas kuri 25 mejlojn en horo, kaj povas longe daŭrigi tiun rapidecon. Sovagaj hundoj kuras ĉirkaŭ 20 mejlojn en horo, sed ili estas lertaj je la evitarto kaj ne kuras rektlinie. Dromajo, kiun ni persekutis faris finkuregon po 30 mejloj en horo. Jen aliaj: Makropo 15 mejlojn en horo, kaj ili povas daŭrigi tiun rapidecon dum longa tempo. Kunikloj: por la unua cento da jardoj, ĉirkaŭ 18 mejlojn en horo; kiam kurante al sia kaŝejo distanco 400 jardojn ili malpli rapidas ĝis 12 mejloj en horo. Timego multe malpliigas tiun rapidecon, kiam ili devas kuri longan distancon. Lacerto kuras po 12 mejloj en horo por 20 jardojn. Blulanga lacerto: Ni ne povis atendi sufiĉe longe por bone eipruvi ĝian rapidecon, sed ni kalkulis, ke ĝi povas kuri unu mejlon en tago se ĝi havas la volon rapidi.

—Eucla estas ripettelegrafa stacio ĉe la suda marbordo de Okcidenta Aŭstralio, 10 mejlojn de la Suda Aŭstralio ŝtatlimo, ĝi estas unika vilaĝo subtenata de la Federala Registaro; la anaro konsistas el 6 viroj, hundo,

5 kaprinoj, kaj kelkaj kameleoj. Kvan-  
kam la novaĵo de la mondo trairas ĝin  
ĉiutage, nenio tie okazas. La plej  
aĝa ano neniam vidis aŭtomobilon ĝis  
nia alveno.

—La veturado dum la ses sekvan-  
taj tagoj estis sen aventuroj. Las-  
ante Eucla'n ni grimpis kalŝtonajn  
montetojn kaj poste trapasis la ŝtat-  
limon de Suda Aŭstralio. Foste ni  
tra pasis kontraŭ bestetoj barilon,  
kiun konstruis la Sud-Aŭstralia Reg-  
istaro por malebligi ke la indiĝenaj  
hundoj kaj kunikloj atingu la mar-  
bordan teron.

—Kiam mankas la manĝaĵon la  
kunikloj venas el la nordo, kaj pereas  
milionope laŭ longe de tiu barilon.  
Ni plue iris laŭlonge de la transaŭ-  
stralia telegraflinio. Centoj da kaka-  
tuoĵoj sin trovis sur la fadenoj. La  
proksiman tagon ni devis barakte iri  
tra la sablaj montetoj kaj devis mult-  
foje trahaki nian vojon tra la arboj  
kaj arboj. Sanktan vendredon, ni  
lavis niajn solajn pantalonojn en  
kaveto havanta ĉirkaŭ la grandecon  
kaj formon de sitelo. Ĉiam la indiĝ-  
enaj hundoj steliradis en la ĉirkaŭaĵo  
atendante ĝis ni lasis ilian akvoproviz-  
zon. Indiĝena hundo kaŝe alprok-  
simiĝas al akvo, kiam ĝi estas sus-  
pektema. Unue ĝi alproksimiĝas al  
sendanĝera distanco kuŝiĝas, kaj  
atendas dum duonhoron. Tiam ĝi  
alproksimiĝas pluajn 50 jardojn kaj  
denove atendas, kaj same faras ĝis  
ĝi opinias, ke ĝi povas sendanĝere  
trinki. Se oni ilin surpafas ili for-  
kuregas en ĉiun direkton; sed nur por  
denove reveni poste, kiam ili plitrans-  
kviliĝis. Ni daŭrigis la vojaĝon, kaj  
alvenis al Bathurst tre lacaj, ĉar ni  
devis ĉiam zorge observadi la vojon  
pro la multaj malhelpaĵoj, kaj la sek-  
vantan tagon ni atingis Sydney-on.

Kun koraj salutoj de P.H.

### IT PAYS TO ADVERTISE.

An effective means of bringing Es-  
peranto under the notice of the lis-

tening-in public has been adopted by  
a Sydney radio dealer. In a promi-  
nent position in his window, surround-  
ed by wireless appliances of all de-  
scription, is a display card reading:—

LISTEN IN!!

LEARN ESPERANTO

The International Auxiliary Lan-  
guage.

Tune in at 7.40 p.m. to  
2KY on Tuesdays,  
2FC on Wednesdays,  
3LO on First Saturday  
each month.

Hereunder the address of the local  
club is given together with the time  
of meeting—truly a compact and neat  
way of advertising to our mind. We  
commend it to others.

**Melburna Esperanto-Societo**, Presi-  
danto, s-ro C. W. Ballard; sekre-  
tariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso,  
Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Mel-  
bourne. Kunvenejo: Public Benefit  
Bootery Building, 5th Floor, 323-325  
Bourke St., Melbourne. Vendrede  
vespere, je ia oka horo.

**Sydney Esperanto Society**. Kun-  
venas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m.  
ĉe "Rawson Chambers," Rawson  
Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583).  
Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezi-  
danto: S-ro F. T. Simon, Sekretario:  
S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River  
Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobarta Esperanta Grupo**. Kun-  
venejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-  
str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere.  
Prezidantino f-ino C. M. Hannaford.  
Sekretario kaj poŝta adreso f-ino A.  
Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

**Persista Grupo**, Mel-  
burno. Prezidanto: S-ro H. Byatt,  
Sekretariino: f-ino I. Thomas, Kun-  
venejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel  
St., East Malvern, merkrede vespere,  
je la oka horo.

## Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,  
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.  
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 77 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 novembro 1926

## THE UNIVERSAL LANGUAGE & ITS NECESSITY.

The world, in this third decade of the twentieth century, offers a tragic contrast. On the one hand, material obstacles between the remotest parts of the earth are fast crumbling down. On the other, there have never been deeper chasms between race and race, or between nation and nation.

Science is universal in its principles and in its results, cosmopolitan in its personnel, international in its activities. The world is larger to-day than it was a hundred years ago, and infinitely more complex; but it is also infinitely more cohesive. The heart of Asia, Africa, South America, can now be reached in a railroad car; intelligence is flashed from continent to continent in less time than a century ago, news could be carried by the swiftest messenger to a neighbouring city. Thus the interdependence or solidarity of nations has become an actual fact rather than an ideal. Railroads, steamships, telegraphs, wireless stations, have made the whole world immediately sensitive to everything that happens anywhere on its surface: they have created a universal consciousness — the inevitable forerunner of a universal conscience.

These considerations are commonplace enough: we trust that their natural consequences will seem no less obvious. We should work in the sense of this evolution and, by help-

ing it, help ourselves.... Organization for the prevention of waste and conflict, is the order of the day: and organization, to be fully efficient, must be worldwide in its scope....

Whatever your race or nationality may be, if you speak the same language, you have a bond of union, a means of approach. To speak different languages is the one impassible frontier;; You may multiply printing presses, mail service, telegraph, telephone: if the peoples do not speak the same language, these agencies are but a mockery. A common language is the one great invention that is needed to crown all the others and give them their full value....

Such a language, this must be plain at the outset, is not meant to supersede the existing national tongues, any more than the League of Nations is meant to absorb the existing national States. Its ambition is to serve as a mere auxiliary: it will in no wise compete with French, English, German, or even Albanian in their own domains; it will not even interfere with the cultural study of foreign literatures. Artists and patriots, therefore, need entertain no fear. An auxiliary language has, for its purpose, not to suppress diversity, but to promote co-operation.

We do not wish to assert that the organization of the world depends altogether upon the adoption of an international language. By the intensive study of many modern languages

almost the same results could be attained. At the present, an idea has to pay toll at every linguistic frontier; but the most rigid policy of protection never absolutely prevents the international exchange of merchandise or the digusion of thought. Our present method is cumbersome, that is all: it is not unworkable. We shall progress, even with the curse of Babel still upon us. We would have progressed even if the printing press and the steam engine had never been invented. No single discovery is absolutely indispensable to the development of civilization. But should we deny ourselves the use of a wonderful instrument, simply because we could exist without it? Had this spirit prevailed, mankind would not even have taken the trouble of chipping flint.

The international Language problem is not a fad and not a Utopian dream: it is a fact. British and American officers during the Great War had to face it every day: at times it was pressed upon their attention with tragic insistence. Men who speak different languages have business with one another—this cannot be helped. When half a dozen Europeans, who may have been born within a hundred miles of each other, are gathered together, the difficulty arises.

The one insuperable objection to the adoption of a national language, be it French or English, is: *Designatio unius est exclusio alterius*—and cannot be done without giving offence to the majority of mankind. Even if a man were totally free from that which we glorify as patriotism (who knows it may be derided as sectionalism or parochialism within half a century), he would be placed in a position of inferiority if somebody else's mother tongue were used in international transactions. I mean physical inferiority, comparative impotency. Every one who has used a foreign language—even one he has thoroughly mastered, in presence of natives—as appreciative and kindly as you please—has felt that sense of discomfort and danger. One little slip of the tongue—and lo! there flickers that irrepressible smile. It is an unfair handicap, which will not be accepted without chafing.

If neutrality be indeed the first quality required of an international language; the chances of Greek and

Latin ought to be much better than those of French and English. Latin has no lack of supporters. There is in its favour the waning but uninterrupted tradition of two thousand years. No language is more universally studied.... The one formidable objection to the use of Latin is in its intrinsic difficulty and about that difficulty there can be no reasonable doubt.... Eight or nine years of one's life is a heavy price to pay, even for an incomparable instrument of culture; but for mere instrument of intercommunication, such a price is exorbitant and prohibitive.

There is nothing absurd or unscientific about the notion of an artificial language. As we have to combat a somewhat hasty prejudice, we may be allowed to use comparisons.... What is more natural than the growth of a plant? yet we are aware that a careful selection of seed, transplantation, fertilizers, grafting, crossing, steam-heat, are resorted to in order to reach the best results—best, that is, from the human point of view. May we not say that our fairest flowers, our most delicate fruits are artificial, exactly in the same way as the best auxiliary languages, which are also compounded of elements selected from nature, and mixed together in a natural way.

A. L. GUERARD.

(from *A Short History of the International Language Movement*).

### NOW IN STOCK.

#### THE BIBLE IN ESPERANTO.

Every Esperantist should have a copy. This is Zamenhof's Translation of the Old Testament that has been so eagerly awaited. With it is bound the New Testament. Prices:—Ordinary paper, cloth binding, 7/6; India paper, cloth binding, 10/-; Morocco binding, 15/-; Persian Yapp, 25/-; postage extra.

Melbourne Esperanto Society. Box 731f, Elizabeth St. P.O., Melbourne.

#### ERARO.

Mario.. —Amio bedaŭras ke ŝi portis la ringon, kiun ŝi ricevis de Georgo, al la juvelisto por pridemandi ĝian valoron.

Klaro.. Kial?

Mario.. —La juvelisto reprenis ĝin. Li diris, ke Georgo ne revenis por saldi la konton, kiel li promesis.

## LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimato amiko,

Jen kelkaj novaĵoj, kiuj eble interesos vin. Sabaton vespere la 25 septembro estis granda ekscito inter la sportemuloj ĉe Melbourne, kiam sinjoro Ted Thye (Usonano) la mondmajstro de la luktistoj, (kiuj devas pezi ne pli ol 175 funtojn) luktis kontraŭ sinjoro Sam Clapham la majstra luktisto de la Brita Imperio por la mondmajstreco; pli ol 10,000 personoj vidis la lukton, kaj la luktejo estis ja homplena; post 111 minutoj da energiega luktado, la Anglo sukcesis levi la Usonanon kaj ĵeti lin sur la maton, surfalis sur lin kaj premadis liajn ŝultrojn dum tri sekundoj sur la maton kaj venkis. La ĉeestantaro korege aplaudis la venkinton, kaj ankaŭ multego da homoj, kiuj ne povis ĉeesti, ĉar oni lerte brodkastis detale la luktheadon. Laŭ la insista postulo de Thye, kiu volis oportunon por regajnisian titolon, la paro ree luktis la 16 oktobro kaj la Brito ankoraŭfoje estis la venkinto.

De la 17 ĝis 25 septembro okazis la Viktoria Agrikultura Ekspozicio. La vetero dum la naŭ tagoj estis bela, kaj en tiu tempo 231,808 personoj ĉeestis ĝin; ĉiu konsentas, ke la ekspozicio estis granda sukceso, kaj oni rimarkis, ke la nombro da ĉevaloj estis malpli multa, kaj la nombro da aŭtomobiloj pli multa ol en antaŭaj jaroj.

Unu el la plej ambiciaj taskoj entreprenitaj en limigita tempo dum la rekonstruado de la Casino-Grafton fervojo en Nova Suda Kimrujo estis la forigo kaj rekonstruo de la viadukto ĉe Clearfield. Tuj post pasaĝera vagonaro transiris la malnovan viadukton, komencis la laboro forigi ĝin. En malpli ol unu horo la malnova ligna konstruaĵo estis disbatita, kaj ok arkaĵoj de la nova viadukton ĝuste lokitaj. Ses aroj da laboristoj en tute 70 viroj, prilaboris la viadukton, kiu estas longa je 438 futoj, kaj pezas pli ol cent tunojn. En 24 horoj la viadukto estis finkonstruita, kaj preta por la transveturado. Kio superis la rekordon en Nova Suda Kimrujo por fervojo konstruado.

Antaŭ kelke da tagoj sinjoro Black, kiu sin okupas per la kolektado da santallignon en preskaŭ nekonata regiono proksime al Southern Cross, (Suda Kruc) en Okcidenta Aŭstralio,

deponis peton ĉe la departemento de minejoj por ricevi rekompence orhavan terpecon en neproklamita regiono, ĉar li estis la unua trovanto. Tuj kiam la novaĵo disvastiĝis, multe da petoj estis ricevataj ĉe la mineja oficejo por lukontrakti la ĉirkaŭan teron Malsimile al antaŭaj tagoj, kiam oni devis porti la provizaĵon sur la dorso, kaj marŝi longajn distancojn, hodiaŭ la alkuro estas per aŭtomobiloj. Sinjoro Black mem havas sargaŭtomobilon, kiun li uzas por la la santalo-kolektado. Sinjoro Black diris ke la orhava tero etendiĝas norde kaj sude pli ol duonon da mejlo laŭlonge, kun meza larĝo de 440 jardoj. La trovaĵo sidas ses mejlojn okcidente de la 140 mejla foŝto de la kontraŭbesteta barilo, norde de Southern Cross. Akvo estas havebla en la proksimeco en natura akvujo aŭ lageto, kaj troviĝas bona vojo laŭlonge de la kontraŭbesteta barilo, sur kiu oni povas veturigi aŭtomobilon po 30 mejloj en horo.

Samtempe venas novaĵo el rivereto Eadie Creek, Nova Ginio, ke tie troviĝas multe da oro; ĉirkaŭ 40 homoj prilaboras la gruzon, kaj ĉiu ricevas almenaŭ 100 uncojn semajne. Eadie Creek sidas sur altaĵo, kie nokte homo bezonas kvar lankovrilojn por konservi la varmecon. Lastatempe oni trovis du novajn lokojn kie la gruzo estas orhava. Ĉirkaŭ 140 viroj alboridiĝis sur la marbordon ĉe Salamao gulfo, kiu estas la plej proksima haveno al Eadie Creek, sed ili ne povas iri al la rivereto, ĉar ne eble estas havigi portistojn. Permeso por serĉi oron kostas 50 funtojn sterlingajn, kaj oni bezonas krome ankoraŭ 300 funtojn sterlingajn, kaj ankaŭ portistojn por atingi la rivereton Eadie. Portistoj kostas 20 ĝis 50 funtojn sterlingajn, kaj ili estas preskaŭ nehaveblaj. Oni povas ĝungi ilin por unu funto sterlingo krom la nutraĵo semajne kiam ili estas haveblaj.

Sinjoro Gibson la ĉefpoŝtestro de Aŭstralio, diras ke en ses monatoj Adelaide kaj Brisbane povos paroli inter si telefone, kaj ke la telefonlinio estos la plej longa en la mondo.

Pli ol cent mejlojn norde de Roebourne, en Okcidenta Aŭstralio, troviĝas stranga rivereto, nomata la "Mill Stream" (muelo-rivereto.) Ĝi eliras el la kalkŝtono, formiĝas lageton, el la lageto fluas rapide kvar mejlojn sur la supraĵo, fine ekmalsupren iras en alian lageton kaj malaperas.

Speciala eco de tiu ĉi riverto estas, ke ĝi estas la sola en la okcidenta duono de Aŭstralio, kiu ne estas influata de la vetero. Kiom ajn varmega povas esti la vetero, aŭ kiom ajn la aliaj riveroj malpligrandiĝas pro pluvmanka periodo, la "Mill Stream" daŭre elverŝas 40 milionojn galonojn da akvo ĉiutage, iaŭ longe de la kvarmejlan fluadon, kaj denove eniras la sensunan maron, kiu sendube kuŝas sub tiu ĉi parto de la kontinento. La gravecon de tiuj ĉi subteraj akvoj jam rekonis la registaro, kaj aro da esplorantoj jam estas forsendita por esplori ilin., sub la kontrolo de sinjoro Lance Le Souef.

Ke ili ekzistas, jam de longe estas sciata, kaj la fakto, ke en okcidenta Kvinlando fiŝoj longaj da tri coloj jam eliris el la profundeco de 2000 futoj, pravas la saman konkludon. La rezulton de la esploro ni atendas kun multa intereso. Via fidele, P.H.

### NOVEL WEDDING.

It Was In Esperanto.  
(Pictorial World Cables).

LONDON, Sunday. — For the first time in the history of the Church of England, a wedding was conducted in Esperanto at St. George's, Bloomsbury.

The bride was the talented Austrian violinist, Fraulein Schönauf. The clergyman, an Esperantist, read the service from a translated prayer-book. The responses were given in Esperanto.

Many Esperantists attended, wearing the Esperanto green star badge. The best man was the English Esperanto president. —Sun.

### GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 5; Amikeco, 9-10; British Esperantist, 257, 258; Belga Esperantisto, 6-7; Der Arbeiter, 9; Die Einheitsfront, 32, 33, 34; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, sept.; La Unuigita Tuthomara, sept., oct.; La Fervojisto, 9-10-11-12; Litova Stelo, 9; Libera Laboristo, 3; La Ora Epoko, 16; Novaj Tempoj, 8-9; Oomoto, 19; Oomoto Internacia, 3-9; Portugal-Esperanto, 6; Pacifika Espero, 15; Revista del Ateneo, 25; Svenska Esperanto, 7-8.

### LETERO DE VOJAGANTO.

s/s Tugela, Sur Mediteraneo,  
28 de aŭgusto 1926.

Kara amiko,

Ni, s-ro Hyde kaj mi, estis feliĉaj ricevante veturon kiel vojaĝantoj sur norvega ŝipo iranta de Rabaul al Marseilles. La 29 junion ni lasis Rabaul — kaj ankoraŭ estas inter Italio kaj Sardinio. La unua semajno sur la Pacifiko estis sukcesa: la vivado sur la ŝipo komforta por ni, en kelkaj rilatoj eĉ luksa. Sed tiel ne restis longe: vespere la 6 julio, kiam ni kun la kapitano kaj telegrafisto ludis "Kvincenton" sur la ferdeko, ni aŭdis subite signalilon soni, kaj tuj poste pomm pamm krrr — sekvis peza silento. Ni trafis koral-rifon en mezo de la Pacifiko. La rifo estis pli granda ol oni sciis kaj kelkajn mejlojn for de sia surkarto montrita loko — jen la kaŭzo.

Tiam sekvis labortagoj: kvin tagoj ni transportis sargon de la antaŭa parto al la posta kaj eĉ ĵetis kelkajn centojn da tunoj en la maron. Inter tempe holanda ŝipo venis helpi nin, sed povis fari nenion. Fine ni liberiĝis sen iu helpo. Tio okazis dimanĉmatene, sed malgraŭ tio ni trinkis botelon da ĉampano!

Kaŭze de tiu kelktaga penado sur la rifo nia karbo elkonsumiĝis, kaj ni devis veturi en Labuan, ĉe la okcidenta bordo de Borneo, kie tamen pro malbonaj tempoj estis venia karbo. Do ni devis atendi ses tagojn ĝis oni portis karbon el Sandakan, ĉe la orienta bordo. Post tio ni iris en Singapore, kie ni pasigis du interesoplenajn tagojn.

Tiam sekvis trisemajna batalo kontraŭ okcidenta monsuno sur la Hinda Oceano. Dum la tuta tempo mi havis malagrablan dentodoloron, kio certe ne plibriligis la ventegajn tagojn. Fine ni atingis Perim, ĉe la malfermo de la Ruĝa Maro. Se vi iam estis tie, vi sendube samopinias kun mi pri tio, ke ĝi estas la plej mizera loko sur la tero: eĉ ne guto da akvo, eĉ ne koloro de kreskaĵo, nur suno kaj ŝtono. Tiam ni venis al Suez kaj Port Said, kaj lastan nokton ni trairis la markolon de Messina en brila lunlumo. Post tri tagoj ni estos en Marseilles, de kie mi iros al Paris, London, Hull, Helsinki kaj hejmo.

Sincere via LAURI LAIHO.

## KRONIKO.

MELBURNO. V. — Dum la pasintaj du-tri monatoj, kelkaj ekskursoj estis aranĝitaj, kaj tiu kiu okazis dum la monato oktobro, estis granda sukceso. La ekskursanoj ekiris de Kew, la rendevuo, kaj marŝis tra la kampoj ĝis la rivero Yarra kie nova ponto estas antaŭ ne longe konstruita. Post mallonga ĉirkaŭrigardo la anoj daŭrigis la marŝadon inter la "Feinaj Montetoj," de kiu altaĵo ili vidis belan valon tra kiu la rivero serpentumis kaj briletis en la sunlumo. Poste ili atingis la malnovan urbon Heidelberg, kaj revenis hejmen per vagonaro, post tre ĝuebla posttagmezo. Okazis dum la monato, traduka rondo, kaj ĉiu ano ricevis unu paragrafon de fabelo, kaj poste legis la tradukitan pecon laŭ ĝusta ordo. — La debato "Ĉu oni permesu al la Leĝo la rajton reguli la modojn?" estis bona sukceso, kaj elvokis multajn amuzajn opiniojn.

SYDNEY. — Sur unua paĝo, sub rubriko "En Esperanto — Unika Edziĝo" vesperjurnalo "The Sun," lastmonate publikigis depeŝon pri tutesperanta edziĝceremonio en Londono. Aperas, ke talenta aŭstria violonistino, F-ino Schonau, edziĝis en anglikana preĝejo, kie la pastro estas esperantisto. Portante verdajn stelojn la gastoj alveturis en omnibusoj kaj aŭdis esperantlingvan diservon, kiel ankaŭ la respondojn faritajn en Esperanto.

Kiel propaganda materialo tiu estas bonvenata, certe multaj el la tagjurnala legantaro atentigis al nia afero, sed ĝuste tia novaĵo postlasas la ideon, ke Esperanto ankoraŭ estas "unika" kaj apartenas al stranga sektoro. Kial serioza, edukinda informo pri universalaj kongresoj, gravaj decidoj kaj progres-raportoj ne povas estis kablita de tempo al tempo, estas malfacile kompreni. Ŝajnas, ke oni evitas tian klerigan novaĵon. Plenaj dektri monatoj forpasis de kiam iuj el niaj ses Sidnejaĵ tagjurnaloj enhavis ian kablitan aludon al Esperanto. Kiel necesa estas la gazet-servado de lokaj grupoj en Aŭstralio!

Post trimonata seninterrompa instruado, la esperanta kurso por komencantoj ĉesis ĉe 2KY Radio Stacio. Je la lasta tiurilata disaŭdiĝado, kiu okazis la 19a. oktobro, la administracio aere dankis la gvidanton, s-ron F. T. Simon, kaj konstatis sian tutan kontentigon pri la sukceso de tiu eksperimento esperante, ke alia kurso baldaŭ sekvos. S-ro Simon tiam anoncis, ke li aranĝos duan kurson por la fino de somero.

AUCKLAND, Nov-Zelando. — S-ro R. J. Grago daŭras brodkasti pri Esperanto de sendstacio 1YA; li paroladis dume ĉiudusemajne sabatojn je 7.30 ĝis 7.45 vespere.

La anaro de la Remuera Klubo nombras tridekkvin; f-ino Joyce Dewing (ĉe 5 Aldred Road) estas la nuna sekretarino.

Bonega informa raporto rilate la

## SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS

Tasmanio estas laŭ ĉiu opinio tre bona loko en kiu oni libertempas.

Dum pasko 1927 estos plia alogilo—Esperanto Kongreso.

Venu ni vokas vin.

### HAROLD PUDNEY

### Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poste. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

15an Esperanto — Kongreson estas publikigita en la Aucklanda gazeto — "The N.Z. Pictorial News."

The Nov-Zelanda delegito al la 18a Kongreso (s-ro S. Andrew, el Feilding) entusiasme raportis pri sia agado kongresa al la Aucklanda Esperantista Asocio, samtempe sciigante ke li spertis nenian malfacilaĵon.

**MANGAHAO—HYDRO, N.Z.** — Pro translokiĝo de kelkaj klasanoj, la flaso iom suferis, sed la gvidantoj atendas la kreskon de la radikoj, la semojn de kiuj ili mem unue enplantis.

**WELLINGTON, N.Z.** — De post la aperigo de la nomoj de la delegito kaj vic-delegito de U.E.A. en "Esperanto" kaj la Oficiala Jarlibro, la laboro de tiuj sinjoroj plimultiĝis. Estas notinde ke la surskriboj en la nomoj de la Asocio plifortigas kaj plifaciligas la lingvan laboron, kaj havigas pli da atento kaj respekto de ĵurnalistoj.

Vizitantoj al tiu—ĉi urbo dum oktobro estis: F-ino Anderson (Melbourne); rusa sinjorino (nomo ne konata); s-ino Watkins (Auckland); kaj s-ro J. McGuigan, (Mangahao-Hydro).

